

## The Project Gutenberg eBook of Rolandkanto, by

This ebook is for the use of anyone anywhere in the United States and most other parts of the world at no cost and with almost no restrictions whatsoever. You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this ebook or online at [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org). If you are not located in the United States, you'll have to check the laws of the country where you are located before using this eBook.

**Title:** Rolandkanto

**Translator:** Eugène Noël

**Release Date:** November 24, 2009 [EBook #30536]

**Language:** Esperanto

**Credits:** Produced by Andrew Sly, Eric Brown, and the Online Distributed Proofreading Team.  
Thanks to the Toronto Esperanto Circle for providing the original book.

\*\*\* START OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK ROLANDKANTO \*\*\*

KOLEKTO DE «LINGVO INTERNACIA»

# Rolandkanto

TRADUKIS

Doktoro NOËL



PARIS

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE

1906

Traduko de «La Chanson de Roland» laŭ oficiala klasika teksto de Léon Gautier (24-a eldono, ĉe Alfred Marne, Tours, 1899) estas reviviĝo de manuskripto de Oxford (Oksfordo), kaj enhavas la originalan verkon kune kun franca traduko.

Vortoj, versoj aŭ strofoj presitaj per klinitaj literoj ne troviĝas sur la Oksforda manuskripto, sed estas reeldonitaj el diversaj tekstoj, el kiuj ĉefa estas la manuskripto de Venizo.

*Al Sinjoro Th. Cart*

*Profesoro en Liceo Henri IV  
kaj en la Lernejo de politikaj Sciencoj*

## ANTAŬPAROLO

Parolante pri Rolandkanto, eminenta scienculo kaj akademiano Gaston Paris diras: «tiu infano jam fortika kaj sana, plena je forteco, boneco kaj kuraĝo... estas jam la granda franca popolo.»

Tute bone, ĉar, efektive, en tiu mezepoka poemo oni jam trovas la ĉefajn ecojn de nia franca nacio:

unuflanke, tiun deziron porti al aliaj la proprajn ideojn, tiun *emon propagandi*, kion oni kredas la vero, kaj tiun inklinon batali por la progreso en vicaj unuaj, kiel protagonisto: tiel batalas por Kristo kontraŭ Sarazenoj Rolando, glora nepo de Karlo granda!

aliflanke, profundan senton de *nacia unueco*, dank' al kiu, kvankam multaj ekzistas Francujoj malsamaj, kvankam ĉe ni ankaŭ la kutimoj kiel la kostumoj, la moroj kiel la lingvaĵoj ofte estas tre diversaj, tamen pli ol iu ajn nacio ni sentas nin antaŭ la fremdo nur *unu* popolo, kaj faras eksterlande tiun saman impreson: neniuj landoj malpli ol Francujo estas «geografia esprimo» kaj jam en tempo de nia Rolando.

Vere franca kaj eĉ france «klasika» estas plie la Rolanda kanto laŭ la simpleco de la agado, laŭ la sobereco aŭ, pli ĝuste, laŭ la malesto de epizodoj—oni nur komparu ĝin kun alia belega poemo, la Nibelungenkanto de la Germanoj—kaj, fine, laŭ la malmulteco de personaĵoj, super kiuj ĉiam aperas tiu nobla figuro: dolĉa Franclando.

---

D-ro Noël agis tre prave, kiam, kun mirinda lerteco, li tradukis por Esperantistaro la kanton pri Rolando, kiu en mezepoko ĝuis universalan famon kaj estis ĉie tradukata aŭ imitata.

Ĉar, vere, granda estas devo kaj tasko de esperanta beletristiko. Ĝi devas konigi al ni la ĉefverkojn de naciaj literaturoj, kiuj estas kvazaŭ morala vivo, kvazaŭ konscienco de ĉiu popolo. Dank' al tiu kono ne nur ni pli ĝuste ŝatos unu la alian,—kio jam estas granda profito,—sed ankaŭ, per internacia lingvo Esperanto, plej «konvena» tradukilo, post multaj, multaj jaroj, iom post iom sed tre certe, kolektiĝos trezoro komuna de l' homa literatura kulturo kaj konstruiĝos kiel muzeo de niaj plej ŝatindaj intelektaj riĉecoj, kien, apud tiu genie tradukita angla Hamleto (por nomi nur ĝin), oni metos sendube, kun aliaj belaj tradukaĵoj, kanton francan pri Rolando.

Samtempe aŭ nur poste, sub influo de tiaj verkoj, naciaj laŭ la deveno, internaciaj laŭ la komuna formo, naskiĝos pure esperanta literaturo. Geniaj aŭtoroj venos, kiuj, senpere pensante kaj skribante internacie, esprimos en siaj verkoj novajn internaciajn sentojn, novan komun-intelektan vivon, novan homan konsciencon.

Kiel Esperanto *jam* ekzistas apud la aliaj vivaj lingvoj, tiel ekzistos internacia literaturo apud la naciaj, ĉiam vivaj.

Revo! diros kelkaj.

Jes, eble!...

---

Brave batalinte, mortis Rolando, kaj lia revo efektiviĝis.

Kiel li, brave ni bataladu:

«Munĝojo! krios ni, deviz' de venko»

Hometoj, *homunculi*, baldaŭ ni malaperos, sed glorie efektiviĝos nia revo!

Th. CART.

Oktobro 1905.

## ROLANDKANTO

# PERFIDO DE GENO

Komenco de kanto.

## 1

Jam Reĝo Karlo, nia glora Estro  
En Hispanujo restis dum sep jaroj,  
Akiris altan landon ĝis la maro  
Kaj submetadis ĉion. Nek kastelo  
Nek urbo, nek remparo kontraŭstaras,  
Krom monta Saraguso; ĝin defendas  
Marsilo, reĝo Dion malamanta,  
Mahometano kaj Apolonano.  
Sed nepre malfeliĉo lin atingos. *Aŭdu.*

Konsiliĝo ĉe Marsilo.

## 2

10 En Saraguso estas Reĝ' Marsilo;  
Sub ombro de ĝardeno fruktodona  
Li sidas sur seĝego blumarmora.  
Pli ol dudek mil viroj ĉirkaŭstaras;  
Li diras: «Dukoj, Grafoj, vidu, kia  
«Malfeliĉego nin premegas! Karlo,  
«Imperiestro de Francujo dolĉa,  
«Ĉi-tien venis por nin neniigi;  
«Armeon mi ne havas por batali,  
«Nek virojn por dispeli liajn virojn!  
20 «Konsilu min, mi petis vin, Saĝuloj,  
«Kaj savu min de morto kaj de honto!»  
Neniu eĉ respondas unu vorton,  
Krom Blankandrino de Val-Fond' Kastelo. *Aŭdu.*

p. 2

## 3

Ĉi-tiu estas plej elturniĝema  
El Idolanoj, brava Kavaliro,  
Bonkonsilant' por Reĝo; li ekkrias:  
«Nun, via Reĝa Moŝto, trankviliĝu;  
«Al Karl' fiera, aroganta, skribu;  
«Promesu amikecon kaj fervoron;  
30 «Donacu hundojn, ursojn kaj leonojn,  
«Sepcent kamelojn, kaj mil akcipitrojn  
«Plenaĝajn, kvarcent mulojn ŝarĝigitajn  
«Je oro kaj arĝento, *tiom, kiom*  
«Forporti povas kvindek veturiloj,  
«Por ke li superpagu siajn anojn.  
«Li jam de longe tie ĉi militas.  
«Francujon baldaŭ, Ajkson li revenos.  
«Vi, diru, ke vi sekvos lin je festo  
«De Sankta Miĉjo kaj Kristan' fariĝos,  
«Kaj estos lia volebonservanto.  
40 «Garantiulojn al li ne rifuzu,  
«Dek, dudek, por lin plene konfidigi.  
«Ni sendu filojn de edzinoj niaj,  
«Mi mem oferos riske mian filon.  
«Pli bone estos ili perdu kapon,  
«Ol ni majstraĵon kaj propaĵon nian,  
«Vivonte nur per peto pri almozo!»  
*Respondas Idolanoj: «Ni aprobas!» Aŭdu.*

p. 3

## 4

Sed Blankandrin': «Pro dekstra man' kaj barbo  
«Je vento antaŭ mi disbloviĝanta  
«Vi tuj ekvidos Francojn translokiĝi,  
50 «Reiri al Francuj', ilia lando.  
«Kaj kiam ĉiu estos reveninta  
«En hejmon, Karlo en kapelo sia  
«Ĉe Ajkso solenigos Sanktan Miĉjon.  
«Li vane vin atendas al kunveno;  
«Pri ni malestos vortoj kaj novaĵoj.  
«Fiera estas Karlo, kormalbone  
«Garantiulajn kapojn li tranĉigos!  
«Pli bone certe ili perdu *kapon*,  
«Ol ni belegan, gloran Hispanujon,  
60 «Kaj tiom da malbonoj ni suferu!»  
Ekkrias Idolanoj: «Povas esti!» *Aŭdu.*

Sendo de deligitoj.

## 5

Marsilo reĝo konsiliĝon finis.  
Kunvokas li Klarinon Balageran,  
Estramarinon, ankaŭ Eŭdropinon,  
Priamon kaj Garlanon la barbulon,  
Kaj Makinieron, lian onklon Mahon,  
Transmaran Malbienon, Ĵoimeron,  
Kaj Blankandrinon, por *elmontri* celon.  
Li tiel vokas dek plej perfidulojn:  
70 «Sinjoroj kaj baronoj, vi kuniru  
«Al Karlo, nun Kordovon sieĝanta;  
«Vi, en la mano portos olivbranĉojn,  
«Montrante tiel pacon, submetiĝon;  
«Kaj se vi scios interkonsentigi,  
«Mi donos al vi (kiom vi deziros)  
«Arĝenton, oron, kampojn kaj majstraĵojn.»  
«*Vi estas prava!*» diras Idolanoj. *Aŭdu.*

p. 4

## 6

Marsilo reĝo finis konsiliĝon.  
Li diras: «Nun, Sinjoroj, vi foriru,  
80 «Portante en la mano olivbranĉojn;  
«Al Reĝo Karlo mianome diru,  
«Ke li, pro Dio lia, min indulgu.  
«Ne pasos tiu ĉi monato, antaŭ  
«Ol mi lin sekvos kun mil fideluloj.  
«Mi tuj aliĝos al Kristana leĝo,  
«Servonte lin fidele, ame. Mi ja  
«Garantiulojn sendos, se li volos!»  
—«Traktaĵo lerta!» diras Blankandrino. *Aŭdu.*

## 7

Marsil' venigas dek mulinojn blankajn  
90 *De Reĝ' de Sicilio* donacitajn.  
Jen orbridiloj, kaj jen arĝentsejoj,  
Jen rajdas la dek viroj delegitaj,  
Portante en la mano olivbranĉojn,  
*Montrante tiel pacon, submetiĝon*,  
Al Karlo, al Francestro ili venas...  
Sin gardu Karlo!... Tuj lin ili trompos!... *Aŭdu.*

Kortego de Karlo.

## 8

La Reĝo estas ĝoja, bonhumora;  
Kordovon prenis li, rompinte murojn,  
Kaj disĵetinte turojn per maŝinoj.

- Forprenis kavaliroj grandakiron,  
 100 Arĝenton, oron, kaj armaĵojn riĉajn.  
 Ne restas tie unu idolano  
 Se ne li mortis aŭ Kristan' fariĝis.  
 La Reĝo sidas en fruktoĝardeno  
 Grandega, kun Rolando, Oliviro,  
 Sansuno duko, kaj Ansejs' fiera,  
 Gefrejz' de Anĵo, reĝa standardisto;  
 Gerin' kaj Gerier' ĉi-tie estas;  
 Kun ili ankaŭ, multe da aliaj  
*Barbulaj kaj maljunaj viroj*, kvindek  
 Mil kavaliroj, *Francoj* de Francujo.  
 110 Ĉi-tiuj sidas sur tapiŝoj blankaj;  
 Sin distras ili, je tabuloj vetas,  
 Plej saĝaj kaj maljunaj ŝakojn ludas,  
 Baŝelieroj plaĉamove skermas...  
 Jen, sub abio, apud roz' sovaĝa,  
 Seĝego ora hele brilas; sidas  
 Ĉi-tie Estro de Francujo dolĉa.  
 Per lia blanka barbo, bela kapo,  
 Altkreska kaj fiera eksteraĵo,  
 Lin oni konas, je rigard' unua.  
 120 Al li senditoj piediras, kaj tuj  
 Salutas lin per kora bondeziro. *Aŭdu.*

### Alveno de Marsilanoj.

#### 9

- L' unua Blankandrino ekparolas:  
 «Al via Reĝa Moŝto, altsaluto  
 «Je Dio, la Glorulo, adorinda!  
 «Jen kion diras brava Reĝ' Marsilo.  
 «Esploris li pri via leĝ' de l' Savo;  
 «Li volas al vi partodoni havon,  
 «Leonojn, ursojn, hundojn kunligitajn,  
 «Sepcent kamelojn kaj mil akcipitrojn  
 130 «Plenaĝajn, kvarcent mulojn ŝarĝigitajn  
 «Je oro kaj arĝento, tiom kiom  
 «Forporti povas kvindek veturiloj,  
 «Por ke vi superpagu viajn anojn.  
 «Jam de tre longe vi ĉi-tie estas,  
 «Francujon, Ajkson vi reiru; tien  
 «Li sekvos vin; ĉi-tion li promesas.  
 «*Al via leĝo tiam li aliĝos,*  
 «*Manplekte, li fariĝos ano via:*  
 «*Per vi, li estos Reĝ' de Hispanujo.»*  
 Al Di', Imperiestro levas manojn,  
 Kaj, mallevinte kapon, ekpripensas. *Aŭdu.*

#### 10

- La Reĝo sidas, kapon mallevinte:  
 140 Por parolado li ne tro rapidas,  
 Kaj nur parolas post pripenso plena.  
 Li restariĝas kaj fiere diras  
 Al la senditoj: «Vi ja estas pravaj;  
 «Sed Reĝ' Marsilo multe min malamas!  
 «Pri tio kion vi al mi raportis,  
 «Je kia grado povas mi konfidi?»  
 —Kaj Sarazeno: «Per garantiuloj;  
 «Fordonos ni al vi dek, dek kvin, dudek;  
 «El ili estos riske filo mia;  
 150 «Vi ja ne havos pli nobelan ol li.  
 «Je fest' de Sankta Miĉjo de l' danĝero,  
 «Sinjoro mia, laŭ promeso, sekvos  
 «Vin revenintan en palacon reĝan  
 «En Ajkso (kie por vi Dio fontojn  
 «Ŝprucigis); li Kristano ekfariĝos.»  
 —Kaj Reĝo: «Tiel li sin savi povos!» *Aŭdu.*

Belega tago *de nun ekfinaĝas*.  
La dek mulinojn Karlo enstaligas,  
Kaj en ĝardeno fruktodona tendon  
160 Starigas por loĝigi dek senditojn.  
Pri ili zorgas dek du el serĝentoj,  
Dum nokt' gardantoj ĝis tagiĝo hela.  
Sin levas Estro Karlo frumatene,  
Al meso kaj matinoj li ĉeestas...  
Imperiestro sidas sub abio;  
Li vokas la baronojn al kunveno,  
Ĉar nur per Francoj ĉion li plenumos. *Aŭdu.*

## Konsiliĝo ĉe Karlo.

### 12

Imperiestro sidas sub abio;  
Li vokas la baronojn al kunveno.  
170 Ogiro duk', Turpin' ĉefepiskopo,  
Riŝard' maljuna, lia nev' Henriko,  
Aslino, brava grafo de Gaskujo,  
Tedbaldo Rejmisa, kaj Milun' la kuzo,  
Gerin' kaj Gerier' ĉi-tie estas,  
Kun ili ankaŭ venas Graf' Rolando  
Kaj Oliviro nobla, brava; tie  
Pli estas ol mil Francoj de Francujo,  
Kaj ankaŭ Geno, perfidonto. Tiam  
Malbena konsiliĝo komenciĝas. *Aŭdu.*

### 13

180 «Baronoj noblaj», diras Estro Karlo,  
«Marsilo reĝo skribis al mi jenajn:  
«Li volas al mi partodoni havon,  
«Leonojn, ursojn, hundojn kunligitajn,  
«Sepcent kamelojn, kaj mil akcipitrojn  
«Plenaĝajn, kvarcent mulojn ŝarĝigitajn  
«Je or', kaj pli ol kvindek veturilojn,  
«Kondiĉe ke Francujon mi reiru.  
«Li sekvos min en Ajkson, en palacon;  
«Aliĝos li al nia leĝ' de l' Savo,  
190 «Kristan' fariĝos, kaj de mi ordonos.  
«Mi tamen dubas, ĉu li diris veron!»  
—Ekkrias Francoj: «Ni nin gardu bone!» *Aŭdu.*

p. 8

## Paroladoj.

### 14

La Reĝo finis sian paroladon.  
Rolando graf' neniel lin aprobas,  
Sin levas, staras, kaj lin kontraŭdiras:  
«Malprave estus fidi al Marsilo!  
«Ni, de sep jaroj, venis Hispanujon!  
«Por vi, mi prenis Noplion kaj Komiblon,  
«Akiris Pinolandon kaj Valternon  
200 «Tuelon, Balageron, Sebilion!  
«Pri reĝ' Marsilo, ĉiam li perfidis!  
«Li jam alsendis dek kvin idolanojn,  
«El ili, ĉiu portis olivbranĉon,  
«Parolis ili al vi samajn vortojn.  
«Kun viaj Francoj vi konsiliĝadis,  
«Ĉi-tiuj malsaĝege vin aplaŭdis.  
«Du grafojn sendis vi al l' Idolano,  
«Basanz' kaj Basilio estis tiuj.  
«Li senkapigis ilin, apud Haltoj!  
210 «Vi, kiel ekbatalis, bataladu!  
«Al Saragus' armeon alkonduku,  
«Sieĝu urbon, eĉ dum tuta vivo!

15

Jen Karlo, kun la kapo mallevita!  
Li elkareas barbon kaj lipharojn,  
Li nek aprobas nek mallaŭdas nevon.  
Silentas ĉiuj Francoj; sed jen Geno  
Sin levas; li al Reĝo proksimiĝas  
Kaj fierege tiel ekparolas:

- 220 «Malprave estas kredi malsaĝulojn,  
«Min aŭ l' aliajn; nur profiton celu.  
«Nu, kiam vin sciigas Reĝ' Marsilo,  
«Ke li, manplekte, submetiĝos al vi,  
«Ke, *de vi*, li ricevos hispanujan  
«Estrecon, kaj alprenos kredon nian,  
«Ĉi-tiu kiu volas lin mallaŭdi  
«Je mort' elfariĝonta ne pripensas!  
«Konsiloj vantaj ne plu superregu!  
«Malsaĝajn lasu ni, kaj saĝajn gardu!» *Aŭdu.*

16

- 230 Alvenas siavice duk' Naimo,  
*Barbulo kaj harulo heleblanka,*  
Pli bona kortegano ne troviĝas.  
Al Reĝo diras li: «Vi aŭdis bone  
«Ĉi-tion, kion Gen' al vi respondis;  
«Konsilo saĝa, bona kaj ŝatinda;  
«En la milito vi Marsilon venkis,  
«Kastelojn ĉiujn vi forprenis de li,  
«Per la maŝinoj murojn disĵetinte,  
«Vi urbojn bruligadis, virojn venkis;  
«Sed nun de vi, li petas nur kompaton!  
240 «Ja, estus peko pli postuli de li  
«Pruvinta dirojn per garantiuloj.  
«*Ni devas nur baronon sendi al li,*  
«Por ke finiĝu tiu militado!»  
Kaj Francoj diras: «Duko estas prava!» *Aŭdu.*

17

- «Baronoj noblaj, kiun ni alsendus  
«En Saraguson al Marsilo reĝo?»  
Jen duk' Naim': «Mi iros, se vi jesos;  
«Fordonu tuj al mi bastonon, ganton!»  
Sed Reĝo diras: «Vi, saĝulo estas;  
«Pro barbo kaj lipharoj, mi al vi ne  
250 «Permesos tiel malproksimen iri!  
«Sidiĝu; tion mi ordonas al vi!» *Aŭdu.*

18

- «Baronoj noblaj, kiun ni alsendus  
«Al Sarazeno, Saragusa estro?»  
Rolando diras: «Mi ja povas iri!»  
—«Ne, certe», diras grafo Oliviro,  
«Ĉar bola kaj fera via koro,  
«(mi tion timas) vin malbonkondukus;  
«Mi vole iros, se al Reĝo plaĉas.»  
*Imperiestro mallevetas kapon,*  
*Kaj tiam diras:* «Ambaŭ vi silentu!  
260 «Nek unu nek l' alia forvojaĝos!  
«Pro tiu barbo blankiĝinta, unu  
«El dek du konsilistoj ne eliru!»  
Silentas Francoj; ili aŭskultadas. *Aŭdu.*

19

Turpin' de Rejms' sin levas siavice;  
*Li diras laŭte kaj sonore:* «Paco  
«Al viaj Francoj, *Via Reĝa Moŝto.*  
«Vi, de sep jaroj estas en la lando,

- «Baronoj multsuferis kaj klopodis.  
 «Fordonu al mi ganton kaj bastonon;  
 «Mi al hispana Sarazen' aliros,  
 270 «La taŭgajn vortojn *al li parolonte.*»  
 —Imperiestro diras kun kolero:  
 «*Pro tiu barbo, vi neniel faros;*  
 «Sidiĝu sur ĉi-tiun blankan ŝtofon.  
 «Silentu, se ne mi mem vin demandis!» *Aŭdu.*

Delegado.

## 20

- «Vi Francaj Kavaliroj», diras Karlo,  
 «Voĉdonu pri baron' el mia tero,  
 «Por ke li portu al Marsil' la skribon,  
 «*Kaj, se necese estos, li ekbatu.*»  
 —Roland': «Jen Geno, mia duonpatro;  
 «Se restos li, pli bonan vi ne sendos.»  
 —Kaj Francoj: «Li je tio estas inda;  
 «Se Reĝo volos, li sukcese iros!» *Aŭdu.*

## 21

- 280 «Alproksimiĝu Geno», diras Reĝo,  
 «Vi tuj ricevos ganton kaj bastonon.  
 «Vi aŭdis, vin elektis voĉ' de Francoj.»  
 —Sed Geno: «Tion ĉi Rolando faris!  
 «Neniam plu, dum vivo, mi lin amos,  
 «Nek plu kolegon lian Oliviron,  
 «Nek (lin amantajn) dek du Konsilistojn;  
 «Mi ilin, antaŭ vi, provokas, Reĝo!»  
 —Sed Reĝo diras: «Vi ja tro koleras!  
 «Vi tien iru, jen ordono mia!»  
 290 —«Mi povas iri, sed ne trovos helpon!  
 «Basanz' kaj Basilio tion montris!» *Aŭdu.*

## 22

- «Mi nepre devas iri Saraguson!  
 «Ve! kiu iras tien ... ne revenos!...  
 «Memoru pri l' edzin', fratino via,<sup>[1]</sup>  
 «Pri l' filo, ja, el ĉiuj la plej bela,  
 «Baldvino, *se li vivos*, estos brava.  
 «Mi testamentas al li havon, terojn;  
 «Vi gardu lin, mi lin plu ne revidos!»  
 Nun Karl': «Tro mola estas via koro!  
 «Ĉar mi ordonas, vi foriri devas!» *Aŭdu.*

[1] Ŝia nomo estas «Berta»; ŝi estas patrino de Rolando.

## 23

- Pro tio, korŝirite, Grafo Geno  
 De siaj ŝultroj prenas mustelfelojn,  
 Vestata nur per silktolaĵa veŝto.  
 Jen *helrigardo* kaj vizaĝ' fiera,  
 Gracia korpo, larĝa eksteraĵo!  
 Li tiel bela! Ĉiuj lin rigardas!  
 Li diras: «Kial vi, Roland', koleras?  
 «Ve! Ke mi estas via duonpatro!  
 «Vi min devigis iri al Marsilo!  
 310 «Se Di' el tie savos min, mi kreos  
 «Al vi *ĉagrenojn kaj malhelpojn* tiajn,  
 «Ke ili daŭros tutan vian vivon!»  
 —Rolando: «Fierec' kaj malsaĝaĵo!  
 «Jes, vere, mi ne zorgas pri minacoj;  
 «Sed, se saĝulon oni devas sendi,  
 «Ĉu Reĝo jesos, mi vin anstataŭos.» *Aŭdu.*



## 24

Sed Gen' respondas: «Vi ne iros pro mi!  
«Servisto?... Nek mi via, nek vi mia!  
«Ordonas Karlo fari lian servon;  
320 «Mi iros Saraguson al Marsilo.  
«Mi faros tie ian malsaĝaĵon,  
«Por kvietigi mian koleregon!»  
—Roland', aŭdinte tion, ekridetas. *Aŭdu.*

p. 13

## 25

Ĉar Geno vidis ridon de Rolando,  
Dolore li koleras, korŝiriĝas,  
Kaj preskaŭ svenas, sed rediras: «Grafo  
«Roland' mi certe vin neniel amas;  
«Sur min vi ekfaligis tiun sorton!...  
«Imperiestro prava ... jen mi estas,  
«Kaj preta por plenumi vian servon!» *Aŭdu.*

## 26

«Sinjoro Geno, diras Karlo, aŭdu:  
«Mi scias, tiun sendon vi plenumos.  
«Je mia nomo, al Marsilo diru,  
«Ke li, manplekte, mia an' fariĝu,  
«Kaj ankaŭ li ricevu sanktan bapton.  
«Al li mi donos duonhispanujon,  
«L' alia estos al Roland' barono.  
«Ĉu li ne volas interkonsentiĝi,  
«Mi iros por sieĝi Saraguson;  
«Li estos ekkaptita, katenita,  
«En Ajkson la ĉefurbon kondukita,  
«Per juĝo tie li elperdos vivon,  
«Li mortos kun doloroj kaj kun honto.  
«Leteron tiun sigelitan donu  
«Al l' idolano en la dekstran manon.» *Aŭdu.*

## 27

Al Geno, Karlo montras dekstran ganton.  
Pli volus grafo esti for de tie.  
Li volas preni ganton, sed ĝi falas  
Sur teron.—Francoj: «Dio! Kio estos!  
«De tio nur malbono ekfariĝos.»  
—Kaj Geno: «Vi pri tio eksciĝos!» *Aŭdu.*

p. 14

## 28

Li diras: «Reĝo, donu forpermeson:  
«Ĉar forironta mi plu ne prokrastos.»  
La Reĝo diras: «Pro Jesuo, pro mi!»  
340 Per dekstra mano benas, krucalsignas,  
Kaj donas la leteron kaj bastonon. *Aŭdu.*

## 29

En sian hejmon iras Grafo Geno;  
Kaj tuj li sin vestigas per armaĵoj  
Plej belaj el la eltroveblaj tie;  
El oro spronoj al piedoj ligas,  
Murglejson, glavon, al si alflankigas,  
Sur Taŝebrun', ĉevalo, li ekrajdas.  
Ginmer', la onklo, tenas piedingon.  
Da Kavaliroj vidu kiom ploras!  
350 «Barono, diras ili, malfeliĉa!  
«Vi jam de longe estas kortegano,  
«Vin oni juĝas nobla kaj fidela.  
«Pri tiu kiu vin devigis iri,  
«Eĉ Karlo ne kapablos lin defendi.  
«Rolando grafo vin malprave trafis,  
«Ĉar via parencaro estas nobla!»  
—Kaj ankaŭ diras: «Grafo, ni kuniru!»

—«Sinjoro Dio! Ne!—respondas Geno,  
«Mi mortu, jes, sed ne vi, tiel *kleraj!*  
360 «Sinjoroj, vi Francujon dolĉan iru;  
«De mi salutu ja edzinon mian,  
«L' amikon kaj samulon Pinabelon,  
«Baldvinon mian filon; vi lin konas,  
«Lin gardu, kaj *defendu lian havon!*»  
Vojiras li, celante Saraguson. *Aŭdu.*

p. 15

Foriro de Geno.

### 30

Rajdadis Gen' tra altaj olivarboj,  
Atingis li senditojn sarazenajn.  
Ĉar Blankandrin' haltetis en irado,  
Lertege ambaŭ interparoladas.  
370 Ekdiras Blankandrin': «Miriga Karlo!  
«Li al militis Pujlon kaj Kalabron,  
«*Konstentinnoblon kaj Saksujon vastan,*  
«Tra l' sala maro li Anglujon iris,  
«Por Sankta Petro ĝin depagigante;  
«Sed kial, ĉe ni, li nin persekutas?»  
Rediras Geno: «Ĉar li tiel volas.  
«Ne estas, kiu lin renkonte venkos.» *Aŭdu.*

### 31

Kaj Blankandrin': «Bravuloj estas Francoj;  
«Sed grafoj, dukoj, tute domaĝigas  
«Imperiestron, per konsiloj tiaj  
380 «Lin kaj l' aliajn ili ruinigas!»  
—«Kulpulon mi ne scias», diras Geno,  
«Se ne Rolandon, al li honto estu!  
«Nelonge antaŭ, Reĝ' sub ombro sidis,  
«La nevo venas, kun kiraso bela,  
«(Li multakiris apud Karkasuno),  
«En mano, li ruĝegan pomon tenas,  
«Al l' onklo diras: Via Reĝa Moŝt', jen  
«De ĉiuj reĝoj mi prezentas kronojn.»  
«Puninda estus tia fiereco!  
390 «Li, ĉiutage, riskas morton, iu  
«Mortigu lin, ni tiel trankviliĝos!» *Aŭdu.*

p. 16

### 32

Kaj Blankandrin': «Roland' terura estas!  
«Li kiu volas submetadi ĉiujn,  
«Kaj tiel ekokupi ĉiujn terojn!  
«Per kiu pensas li la celon trafi?»  
Respondas Geno: «Per la franca gento.  
«Ĝi amas lin, neniam ĝi malestos.  
«Al ĝi elspezas li arĝente, ore,  
«Ĉevale, mule, silke kaj armaĵe.  
400 «Al l' Estro mem li donas, laŭ deziro.  
«Ĝis Oriento, li la mondon prenos!» *Aŭdu.*

### 33 (?)

*Esploras Blankandrin' de Geno belan  
Mienon kaj perfidan rigardeton.  
Tremetas Geno per la tuta korpo;  
Al li parolas jenajn Blankandrino:  
«Sinjoro Geno, min aŭskultu bone,  
«Ĉu volas vi venĝegi al Rolando?  
«Pro Mahometo, lin fordonu al ni.  
«Marsilo Reĝo estas multĝentila,  
«La tutan havon al vi li forlasos».  
Aŭdinte tion, Gen' mallevas kapon. *Aŭdu.**

34

Rajdadis Blankandrin' kaj Geno tiel,  
Ke ambaŭ konsentiĝis serĉi eblon  
Por okazigi morton de Rolando.  
Tra vojoj, tra vojetoj ili rajdas  
Ĝis Saragus' kaj haltas sub taksuso.  
Ĉe ombro de abio kuŝas trono  
Per silk' Aleksandria drapirita;  
La Reĝ' de Hispanujo sidas tie,  
410 Kaj, ĉirkaŭ li, dudek mil Sarazenoj.  
Aŭdata estas nek parol' nek sono,  
Ĉar pri novaĵoj ĉiu volus scii.  
Jen venas Geno, ankaŭ Blankandrino.     *Aŭdu.*

p. 17

35

Aliras Blankandrino al *Marsilo*,  
Per mano li kondukas grafon Genon  
Kaj diras: «Reĝ', salut' je Mahometo  
«Kaj Apolono, kies leĝ' nin regas.  
«Al Karlo, vian servon ni plenumis;  
«La manojn li levadis al ĉielo,  
420 «Al Dio dankis, kaj nenion diris.  
«Sed sendis li al vi baronon noblan,  
«Ĉi-tiun francon, kaj plej potenculon;  
«Per li, vi scios pri milit' aŭ paco.»  
Kaj Reĝo: «Li parolu, ni aŭskultu.»     *Aŭdu.*

Interdisputo.

36

Jen Geno, post momento da pripenso,  
Lertege ekparolas, kiel *homo*  
Spertulo pleje por la parolado.  
Li diras al la Reĝ': «Salut' je Dio  
«Glorulo, kiun devas ni adori.  
«Jen kion al vi diras Karl' barono:  
«Alprenu vi Kristanan sanktan leĝon;  
«Al vi li donos duonhispanujon,  
430 «*L' alia estos al Roland' barono,*  
«*(Kolego tre fiera por vi tie).*  
«Se vi ne volos interkonsentiĝi,  
«*Li iros por sieĝi Saraguson,*  
«Vi estos ekkaptita, katenita,  
«En Ajkson la ĉefurbon kondukita,  
«Per juĝo tie vi elperdos vivon,  
«Vi mortos kun malĝloro kaj kun honto!»  
Marsilo Reĝo tuj ekkoleregas,  
Kaj, per pikstang' je oro ornamita,  
Li frapus Genon, se ne malhelpita.     *Aŭdu.*

p. 18

37

Marsilo Reĝo staras paliĝinta;  
Li svingas per la mano sagovergon.  
Sed Gen' lin vidas, tuj ekprenas glavon,  
Eltiras ĝin je longo da du fingroj,  
Kaj diras: «Glavo bela! Glavo hela!  
«Dum mi vin tenos ĉe ĉi-tiu reĝo,  
«Ne diros, ja, la Estro de Francujo,  
«Ke sola mortis mi en fremdolando!  
«Plej bonaj pagos vin per sia sango!»  
Kaj Idolanoj: «Ni disigu ilin!»     *Aŭdu.*

38

Marsilon petas la Ĉefsarazenoj  
 Ĝis fine li sidiĝas sur la tronon.  
 Kalifo diras: «Vi malprava estis,  
 «Volinte ekataki tiun francon!  
 «Pli taŭge, vi lin aŭdu kaj aŭskultu.»  
 Kaj Geno: «Reĝo, tion mi elportos!  
 «Ne volus mi, eĉ por la oro tuta  
 «De Di' kreita, aŭ riĉaĵoj ĉiuj  
 «De land' ĉi-tiu (se nur vi permesos  
 460 «Al mi paroli), ne plenumi sendon  
 «De glora Karlo al vi malamiko!»  
 Demetas Geno la zibelmantelon  
 Je silk' Aleksandria ornamitan;  
 Ĝin ĵetas teren; Blankandrin' ĝin levas.  
 Sed Gen' ne volas lasi sian glavon,  
 Per dekstra mano prenas l' orprenilon.  
 Kaj Idolanoj: «Jen barono nobla!» *Aŭdu.*

p. 19

### 39

Al Reĝo nun alproksimiĝas Geno;  
 Li diras: «Vi malprave koleregas!  
 470 «Jen kion al vi diras Karl' Francestro:  
 «Kristanan leĝon vi alpreni devas,  
 «Al vi li donos duonhispanujon,  
 «L' alia estos al Roland' la nevo,  
 «Kolego tre fiero por vi tie.  
 «Ĉu vi ne volos interkonsentiĝi,  
 «Li iros por sieĝi Saraguson,  
 «Vi estos ekkaptita, katenita,  
 «En Ajkson la ĉefurbon kondukita,  
 «Ĉevalon por batali, por vojiri,  
 480 «Aŭ mulon, aŭ mulinon vi ne rajdos;  
 «Vin oni ĵetos sur portilan bruton;  
 «Per juĝo tie vi elperdos kapon...  
 «Jen la letero de l' Imperiestro.»  
 En dekstran manon li ĝin donas al li. *Aŭdu.*

### 40

Marsil' lertulo estas kaj klerulo,  
 La idolanan leĝon li ellernis.  
 Sigelon li disrompas, sigelvakson  
 Li ĵetas, kaj leteron tuj tralegas...  
 Li ploras, tiras sian blankan barbon,  
 Sin levas, kaj per laŭta voĉ' ekkrias:  
 «Sinjoroj, vidu! kia malsaĝaĵo!  
 «Francestro Karlo ĵus alskribis al mi,  
 «Ke mi memoru pri kolero *grava*,—  
 490 «Ĝi pri Basanz' kaj Basilio, kiujn  
 «Mi senkapigis apud montoj Haltoj.  
 «Ĉu mi mem volos vivon deaĉeti,  
 «Kalifon, onklon, mi alsendi devas;  
 «Alie, Karl' kun mi ne konsentiĝos!»  
 Ne diras unu vorton *Idolanoj*,  
 Krom Marsilido. Tiu ĉi respondas  
 Al Reĝo: «Geno tiel malprudente  
 «Al vi *parolis*, ke li devas morti.  
 «Fordonu lin al mi, kaj mi lin punos.»  
 Aŭdinte tion, Geno svingas glavon  
 Kaj alflankiĝas al abia trunko. *Aŭdu.*

p. 20

### 41 (?)

*Saragusanoj maltrankviliĝadas.*  
*Ĉeestas tie batalanto nobla,*  
*Potenca, filo de Mahometano.*  
*Prudente li parolas al la Reĝo:*  
 «Ja, trankviliĝu, Via Reĝa Moŝto,  
 «Jen perfidulo!... kiel li paliĝis!...» *Aŭdu.*

## Konsentiĝo.

### 42

Nun, en fruktoĝardenon iras Reĝo;  
Plej bonajn el la viroj kun si prenas.  
Blankhara Blankandrino venas tien,  
Ĵurfalo ankaŭ, heredonta fil', kaj  
Kalifo, lia onklo kaj amiko.

«La francon voku», diras Blankandrino.

«Li ĵuris al mi por afero nia.»

La Reĝo diras: «Lin konduku al mi!»

Lin prenas Blankandrin' per dekstra mano.

510 Al Reĝ' irante en fruktoĝardenon,  
Parolas ili pri perfid' hontiga. *Aŭdu.*

p. 21

### 43

«Sinjoro Geno», diras Reĝ' Marsilo,  
«Mi agis kontraŭ vi malprave, kiam  
«Mi volis bati vin pro kolerego;  
«Kompensu vin per tiuj zibelfeloj,  
«*Hodiaŭ kunkudritaj, pretigitaj,*  
«Je pli ol kvincent funtoj orvalore.  
«Tuj prenu ilin, bela kompensaĵo!»  
*Al lia kol' Marsilo ligas ilin.*

«Mi tute ne rifuzas», diras Geno,

«Kaj Dio volu Mem vin rekompenci.» *Aŭdu.*

### 44

520 Marsilo diras: «Geno *sciu vere,*  
«Ke mi deziras vin tre kore ami;  
«*Sekreta restos nia konsiliĝo,*  
«Mi tre dezirus aŭdi vin pri Karlo  
«Grandaĝa, vivotempon li transpasis,  
«Li estas, ŝajne, pli ol ducentjara;  
«Li tiom da fremdlandoj trapaŝadis,  
«Da *batoj* sentis sur la bulan ŝildon,  
«Da gloraj reĝoj igis mizeruloj!  
«Nu! Kiam ĉesos li batali tiel?  
«*Francujen, Ajksen, trovus li ripozon!*»  
Respondas Geno: «Karl' ne estas tia;

530 «Ja, ĉiuj kiuj lin ekvidas, konas,  
«Ripetas, ke la Reĝo estas nobla.  
«Ne povus mi lin inde ŝati, laŭdi;  
«Pli nobla kaj pli bona ne troviĝas;  
«Valoron lian kiu povus diri?  
«Lin Dio faris tiom superulo!  
«Mi volus morti pli ol lin forlasi!» *Aŭdu.*

p. 22

### 45

«Mi multe miras», diras l' Idolano,  
«Pri Karlo tiel blanka kaj grandaĝa;  
«Li estas, ŝajne, pli ol ducentjara;

540 «Sur tiom da fremdlandoj klopodadis,  
«Da *batoj* per pikstangoj ricevadis,  
«Da gloraj reĝoj igis mizeruloj!  
«Nu! Kiam ĉesos li batali tiel?»  
Kaj Gen': «Ne, certe, dum la nevo vivas,  
«La plej kuraĝa sub Ĉielarkaĵo;  
«L' amiko Oliviro estas brava,  
«La dek du konsilistoj, la amataj,  
«Antaŭgvardias kun dudek mil anoj.  
«Konfidu Karlo, li neniun timas!» *Aŭdu.*

### 46

550 Rediras l' Idolano: «Mi miregas  
«Pri Karlo tiel blanka kaj grandaĝa,

«Li estas, ŝajne, pli ol ducentjara;  
«Li tiom da fremdlandoj almilitis,  
«Da batoj per tranĉegaj lancoj sentis,  
«Da gloraj reĝoj venkis kaj mortigis;  
«Nu! Kiam ĉesos li batali tiel?»  
Kaj Gen': «Ne, certe, dum Rolando vivas  
«La plej kuraĝa ĝis la Oriento;  
«L' amiko Oliviro estas brava,  
560 «La dek du konsilistoj, la amataj,  
«Antaŭgardias kun dudek mil Francoj.  
«Konfidu Karlo, li neniun timas!» *Aŭdu.*

#### 47

—«Sinjoro Geno», diras Reĝ' Marsilo,  
«Ne estas gento bela pli ol mia.  
«Mi povas per kvarcent mil kavaliroj  
«Elbataladi Karlon, ankaŭ Francojn.»  
—Respondas Geno: «Vi ne kredu tion;  
«Multegajn Idolanojn vi nur perdos!  
«Ne malsaĝaĵon, sed saĝaĵon faru!  
570 «Al Karlo donu tiom da riĉaĵoj,  
«Ke Francoj estu tute mirigitaj.  
«Preninte dudek el garantiuloj,  
«La Reĝo iros al Francujo dolĉa,  
«Kaj malantaŭe lasos postgardion,  
«En kiu estos graf' Roland', mi kredas,  
«Kaj Oliviro brava kaj nobela.  
«Du grafoj mortos, mi certigas tion;  
«Kaj tiel malfieriĝinta Karlo  
«Plu ne kuraĝos iam vin batali.» *Aŭdu.*

### Montroj.

#### 48

580 «Sinjoro Geno», *diras Reĝ' Marsilo*,  
«Rolandon kiel povos mi mortigi?»  
—Kaj Gen': «Mi scios tion al vi diri.  
«Trairos Karlo Sizrajn intermontojn;  
«Li, malantaŭe, lasos postgardion.  
«Kun nevo graf' Rolando, potenculo,  
«Kaj Oliviro, tiel konfidinda;  
«Dudek mil Francoj ankaŭ estos tie.  
«*Sed vi, kunigu vian belan genton*,  
«Al Francoj sendu centmil Idolanojn  
«Por batalegi je l' unua fojo;  
590 «La francan genton ili forte vundos;  
«Jes, viaj, eble, estos disĵetitaj;  
«Sed, duan fojon, bataladu same;  
«El tiuj du, Roland' ne elturniĝos.  
«Vi tiel faros belan elmiliton,  
«Kaj vi plu ne batalos vivodaŭre!» *Aŭdu.*

#### 49

«Rolandon, kiu povus pereigi  
«Senigus Karlon je la dekstra brako!  
«Jes! Plu ne estos la belegaj aroj!  
«Anarojn tiajn Karl' ne kunigante,  
«*Ne portos plu sur frunto oran kronon*,  
600 «*Kaj tuta Hispanujo* trankviliĝos!»  
Aŭdinte, Reĝo kisas lin sur kolo.  
Kaj tuj trezorojn siajn ekmalfermas. *Aŭdu.*

### Ĵuroj.

#### 50

Marsilo diras: «Kial paroladi?  
«Ne estas konsilant' *se ne* fidinda!  
«Tuj ĵuru al mi, ke Rolando *mortos*,  
«Ke mi lin trovos en la postgardio;  
«Sur mia leĝo mi promesos al vi,  
«Ke mi batalos lin, se mi lin trovos.»  
—Respondas Gen': «Laŭ via volo estu!»  
Sur sanktrestaĵoj en Murglejso glavo  
Li ĵuras!... Perfidaĵo plenumiĝis!... *Aŭdu.*

## 51

Ĉi-tie staras tron' elefantosta  
*Sub olivujo kaj sur blanka ŝildo.*  
610 Marsilo tien alportigas libron  
Sur kiu estas leĝ' Tervaga, Maha;  
Sur ĝi l' hispana Sarazeno ĵuras:  
«Se mi Rolandon trovos postgardie,  
«Mi lin batalos per la tuta gento;  
«Rolandon mi mortigos se mi povos,  
«La dek du konsilistoj juĝe mortos!»  
—Kaj Gen': «*Traktaĵo nia* bonsukcesu!» *Aŭdu.*

p. 25

## 52

Jen venas idolano Valdabruno,  
*En majstr' ordeno patro* de Marsilo,  
Li afablege diras: «Gen', Sinjoro,  
620 «Ĉi-glavon prenu, la plej el efikaj,  
«Valoras la prenil' pli ol mil skudojn;  
«Pro amikec' mi ĝin donacas al vi;  
«Sed helpu kontraŭ la baron' Rolando,  
«Ke ni lin trovi en la postgardio.»  
—«Tiele estos», diras grafo Geno,  
«*Jes, mi certigas, ni lin ekbatalos,*  
«*Kaj mi promesas, ke ni lin mortigos.*»  
Kaj ili kisas sur menton' kaj vango. *Aŭdu.*

Donacoj.

## 53

Jen venas idolano Klimborino;  
Li afablege diras: «Gen', Sinjoro,  
«Ĉi-kaskon prenu, la plej el fortikaj,  
630 «*Sur nazŝirmilo brilas karbunkolo;*  
«Nin helpu kontraŭ la markiz' Rolando,  
«Kaj diru, kiel ni lin malglorigos.»  
—«Tiele estos», diras *al li* Geno.  
Sur buŝ' kaj vango interkisas ili. *Aŭdu.*

p. 26

## 54

Alvenas nun Reĝino Bramimundo.  
«Sinjoro, diras ŝi, mi vin amegas.  
«Ĉar l' edzo, ĉiuj anoj, vin tre ŝatas.  
«Mi donas al vi, por edzino via,  
«Du ĉirkaŭmanojn, oro kaj juveloj  
640 «Valoras pli ol la trezor' de Romo.  
«Neniam via Estro vidis tiajn,  
«*Kaj ĉiutage al vi mi donacos.*»  
—*Nun Geno: «Ni plenumos vian servon.»*  
Li metas ĉirkaŭmanojn en la boton. *Aŭdu.*

## 55

Alvokas Reĝ' Maldujton, la kasiston:  
«Nu? Ĉu pretigis vi por Karl' donacojn?»  
—Kasisto diras: «Via Reĝa Moŝto,  
«Jen l' or', l' arĝento, sur sepcent kameloj;  
«Garantiuloj dudek el plej noblaj.»

*Marsil' al Geno ĵus alproksimiĝis,  
Sur sia kor' lin dolĉe ĉirkaŭpremis,  
Kaj diris: «Mi ja devas vin tre ami,  
«Kaj ĉiutage al vi mi donacos,  
«Se, por Rolandon frapi, vi kunhelpos.»  
Respondas Geno: «Jes! mi ne prokrastos!» Aŭdu.*

## 56

Marsilo tuŝas Genon sur la ŝultro,  
Dirante: «Vi tre brava, saĝa, estas;  
«Sed pro la leĝo (laŭ vi) la plej bona,  
650 «Vin gardu, ke vi aliiĝu pri ni.  
«Mi malavaros por vi mian havon,  
«Dek mulojn per araba or' ŝarĝitajn,  
«Kaj ĉiujare tiel mi donacos.  
«Ŝlosilojn prenu de l' urbego nia,  
«Al Karlo donu, je mi, riĉegaĵojn,  
«Kaj ankaŭ dudek ĉi-garantiulojn.  
«Sed igu, ke Rolando postgvardiu.  
«Se mi lin trovos intermontirantan,  
«Mi kontraŭ li batalos ĝis la morto.»  
—Kaj Gen': «Mi pensas, ke mi tro prokrastas!»  
Ekrajdas li, kaj iras sian vojon. Aŭdu.

p. 27

## Reveno de Geno.

## 57

La Reĝo proksimiĝas sian Regnon,  
Li ĵus alvenis al *Valterno*, urbo  
Ekokupita iam de Rolando,  
Ruinigita ankaŭ de cent jaroj.  
Pri Gen' novaĵojn Reĝ' atendas tie.  
Ĉu submetiĝos granda Hispanujo?  
Tagiĝe, je l' unua matenruĝo,  
Jen Grafo Geno venas al tendaro. Aŭdu.

## 58

*Belega tago kaj brilega suno.*  
Sin levis Reĝo Karlo frumatene;  
670 Al meso kaj matinoj li ĉeestis;  
Sur verda herbo, apud tendo, sidas  
Rolando; brava Olivir' alestas,  
Kaj duk' Naimo, kaj grandnombraj anoj  
Kaj Geno, perfidulo, ĵurrompinto.  
Li perfidege alparolas Reĝon:  
«Salut' je Dio, Via Reĝa Moŝto,  
«De Saragus' ŝlosilojn mi alportas;  
«Jen grandaj trezoraĵoj, kaj jen dudek  
«Garantiuloj; bone gardu ilin.  
680 «Marsilo Reĝo petas vin, ke vi ne  
«Riproĉu lin pri manko de l' kalifo;  
«Ĉar mi mem vidis tricent mil soldatojn,  
«(Kaj la kirasojn, kaj la *ŝtalajn* kaskojn,  
«Kaj oregravuritajn glavprenilojn),  
«Kun la kalifo ili enŝipiĝis;  
«Foriris ili, tute malvolinte  
«Ricevi kaj konservi nian kredon.  
«Ne marveturis ili tra kvar mejloj,  
«Jen ekbruegas fulmotondr' ventego...  
690 «Vi ilin plu ne vidos... ili dronis...  
«*Pro tio nun kalifo ne ĉeestas.*  
«Se li postvivis, mi lin kunkondukus.  
«Sed, l' idolana Reĝo vin certigas,  
«Ke, antaŭ ol finiĝas ĉi-monato,  
«Li sekvos vin al franca Reĝolando;  
«Al leĝ' kristana tiam li aliĝos,  
«Manplekte, li fariĝos ano via,  
«Per vi, li estos Reĝ' de Hispanujo.»

p. 28



—Kaj Reĝo diras: «Ni al Dio danku;  
«Vi agis bone, Gen', mi ŝuldas al vi.»  
700 —Nun, mil trumpetoj tra kampar' sonoradas...  
Deloĝas Francoj; ili ŝarĝas brutojn;  
Jen ĉiuj iras al Francujo dolĉa... *Aŭdu.*

Malamikoj.

59

Nun Reĝo Karlo venkis Hispanujon,  
Kastelojn *ruinigis*, urbojn prenis;  
Li diras: «Mi ja finis militadon!»,  
Kaj li rajdadas al Francujo dolĉa.  
*Jam tago malheliĝas, krepuskiĝas;*  
Rolando graf' starigis la standardon  
Sur altaĵeton, rekte al ĉielo;  
Ripozas Francoj sur kamparo vasta.  
710 Jen, tra la valoj, Idolanoj rajdas,  
Vestitaj per kiraso, *ferkiteloj*,  
Sur kapo kaskoj, kaj ĉe flanko glavoj,  
Je kolo ŝildoj kaj pikstangoj akraj...  
Sur monto, en arbaro ili haltas;  
Kvarcent mil viroj staras ĝis tagiĝo!  
Ho Dio, ve! ne scias tion Francoj! *Aŭdu.*

p. 29

Unuaj sonĝoj de Karlo.

60

La tago malheliĝis, nun noktiĝas;  
Ekdormas tie glora Estro Karlo;  
Li sonĝas: En la Sizraj intermontoj  
720 Li tenas sian fraksenlignan lancon.  
Jen grafo Geno ĝin forprenas de li,  
Svingante ĝin kaj skuadante tiel,  
*Ke li ĝin rompas, kaj eĉ ĝin frakasas;*  
Ĝis la ĉielo flugas la rompaĵoj...  
Dormadas Karlo, ĉar li ne vekigis... *Aŭdu.*

61

Sonĝinte tiel, li denove sonĝas.  
Jen en Francujo, en kapel' de Ajkso  
La dekstran brakon urso mordis tiel,  
*Ke tranĉis ĝi la karnon ĝis la ostoj:*  
Jen, el Ardeno, kuras leopardo;  
Ĝi ankaŭ kruise lin atakos...  
730 Sed jen, el ĉambro, tuj ĉashundo kuras  
Al Karl' per galopegoj, risortiĝoj;  
Elmordas hundo dekstran ursorelon,  
Kaj brave ekatakas leopardon.  
—«Batalo granda—diras Francoj; ili  
«Ne scias, kiu estas la venkonto...»  
Dormadas Karlo, ĉar li ne vekigis. *Aŭdu.*

p. 30

Ordono.

62

Post nokto, la tagiĝo hele venas.  
Imperiestro tre fiere rajdas;  
*Nun mil trumpetoj tra la gent' sonoradas.*  
740 «Baronoj noblaj, diras Estro Karlo,  
«Rigardu tien, intermontvojetojn...  
«Decidu, kiu marŝos postgwardie.»  
Sed Gen': «Rolando, mia duonfilo;

«Neniu estas pli kuraĝa ol li;  
«*Li estas la savonto de la gento.*»  
Aŭdinte, Reĝ' fiere lin rigardas,  
Kaj diras: «Vi ja estas mem Diablo;  
«Ekscit' mortiga prenis vian korpon;  
«Sed kiu do por mi antaŭgvardios?»  
Respondas Gen': «Ogiro de Danujo  
Plej bona estas por plenumi tion.» *Aŭdu.*

### 63

Aŭdinte, ke lin oni nomas, Grafo  
Rolando ekparolas kiel Estro:  
«Mi, duonpatro, devas vin tre ami,  
«Mi, ŝuldos al vi, ke mi postgvardios.  
«Francestro Karlo, ja, nenion perdos,  
«Ĉar mi zorgeme gardos pri ĉevaloj  
«Pri muloj kaj mulinoj surrajdeblaj,  
«Kaj pri portilaj brutoj. Kiu ilin  
«Forprenus, ilin pagos per glavbato.»  
—Gen': «Vi ja veron diris, mi vin konas.» *Aŭdu.*

p. 31

### 64

Roland' aŭdinte, ke li postgvardios,  
Parolas kun koler' al duonpatro:  
«Perfido kaj malbon' de via sango  
«Kredigis vin, ke mi ellasos ganton,  
«Ĉar antaŭ Karl' faligis vi bastonon!» *Aŭdu.*

### 65

Rolando grafo alparolas Karlon:  
«El via mano, donu la pafarkon;  
«Mi kredas, mi riproĉon ne meritos.  
«Ĝi, ja, ne falos de mi, kiel falis  
770 «De Geno dekstra *ganto* kaj bastono.»  
La Reĝo staras, kapon mallevinte,  
Li elkaresas barbon kaj lipharojn,  
Kaj li ne povas sin deteni plori. *Aŭdu.*

### 66

Alvenas siavice Duk' Naimo,  
*Barbulo kaj harulo heleblanka.*  
Li estas plej ŝatinda kortegano;  
Li diras al la Reĝo: «Vi lin aŭdis;  
«Rolando grafo estas kolerega,  
«*Kaj furioza, ankaŭ terurega;*  
«Al li vi komisiis postgvardion;  
«Baronon tian vi neniam trovos.  
780 «Streĉitan de vi, donu la pafarkon  
«Al li, kaj li kunprenu bonhelpantojn.»  
Pafarkon donas Reĝ'—Roland' ĝin prenas. *Aŭdu.*

p. 32

### 67

Kaj Reĝo Karlo diras al Rolando:  
«Sinjoro nevo, ja, vi scias, al vi  
«Duonon de l' anaro mi fordonos;  
«Ĝin gardu, ĉar ĝi estas la savonto.»  
—Sed Grafo: «Ne! Mi tion ĉi ne faros;  
«Pro Di' je mia gent' mi restos inda.  
«Nur restu dudek mil kuraĝaj Francoj;  
790 «Senriske, vi trairu intermontojn;  
«Neniun timu, dum mi estas viva!» *Aŭdu.*

### 68

*Rolando grafo staras sur altaĵo;  
Li vestis sin per la kiras' plej bela,  
Surmetis kaskon indan je barono,  
Ĉe l' flanko orprenilan Durendalon,*

*Al kolo sian ŝildon florpentritan;  
Li volas rajdi nur sur Vejlantifo;  
En man' pikstango; la standardo blanka  
Per oraj franĝoj tuŝas glavprenilon.  
Montriĝos kiu lin amegas aŭ ne!  
Ekkrias Francoj: «Ni vin sekvos tien!» Aŭdu.*

## Postgvardio.

### 69

Rolando graf' ekrajdas sur ĉevalo;  
Ĉe lia flank', kolego Oliviro,  
Gerin' kaj Gerier' la nobla grafo,  
Otuno ankaŭ, kaj Berengiero  
Kaj duk' Sansuno, kaj Ansejs' *fiera*,  
*Ivono, Ivori' de Reĝ' amataj*,  
Girard' de Rusiluno, la *grandaĝa*  
*Engeliero Gaskujano*. Diras  
Ĉefepiskop': «Pro mia kap'! mi iros!»  
800 Kaj Galtiero: «Ankaŭ mi kuniros,  
«Mi Rolandano, mi lin ne *forlasu!*»  
Jen estas tuj dudek mil kavaliroj. Aŭdu.

p. 33

### 70

Roland' alvokas Human<sup>[2]</sup> Galtieron:  
«Vi, kun mil Francoj de Francujo nia,  
«Okupu intermontojn kaj altaĵojn,  
«Por ke Imperiestr' neniun perdu.»  
—Kaj Galtier': «Pro vi, mi faros tion!»  
Kun tiuj ĉi mil Francoj de Francujo  
Li iras tra altaĵojn, intermontojn.  
810 De tie, kiaj ajn novaĵoj estos,  
Li ne revenos, antaŭ ol vidvigi<sup>[3]</sup>  
Sepcent glavingojn. Reĝo Almariso  
Belferna lin hodiaŭ batalegos<sup>[4]</sup>. Aŭdu.

[2] De urbo «Humo».

[3] Senigi je glavo.

[4] Sekvo de tiu epizodo post versoj 1411-a kaj 2040-a.

## Foriro de Karlo.

### 71

*Jen Estro Karl' trairas Rencesvalon.  
Barono Duk' Ogir' antaŭgvardias;  
El tie do, nenio timeginda.  
Rolando malantaŭe postgvardias  
Kun Oliviro, dek du konsilistoj,  
Dudek mil anoj, Francoj de Francujo.  
Al ili helpu Dio dum batalo  
Proksima. Tion scias Gen' perfida;  
Sed li ricevis oron, kaj silentas! Aŭdu.*

### 72

Montaro estas alta! Val' malluma!  
Stonego nigra! intermont' terura!  
Jen Francoj iras, ne sen dolorego!  
Ĝis dek kvin mejloj sonas forirado!  
Sed, alveninte Teron Altan, ili  
Je vido de Gaskuja patrolando  
820 Rememoriĝas pri propraĵo, hejmo,

p. 34

Pri junulinoj, pri edzinoj ĉastaj;  
Je kortuŝeco ili ĉiuj ploras!  
La plej sentema estas Karlo, lasis  
Li nevon en Hispanaj intermontoj!  
Dolore, li ne sin detenas plori! *Aŭdu.*

### 73

En Hispanujo restis Konsilistoj,  
Dudek mil Francoj ankaŭ estas tie.  
Ne tremas ili, kaj ne timas morton.  
Imperiestro iras al Francujo,  
*Li ploras, tiras sian blankan barbon,*  
830 Malĝojan frunton kaŝas per mantelo,  
Ĉe lia flanko rajdas Duk' Naimo  
Dirante: «Reĝo, kia pens' vin premas?»  
Respondas Karlo: «Ve! Demand' ofenda!  
«Mi estas kortuŝita ĝis la larmoj!  
«De Gen' Francujo estos detruita!  
«Ĉi-tiun nokton sonĝis mi, ke Geno  
«En miaj manoj rompas mian lancon.  
«Al postgvardio li irigis *nevon*  
«Rolandon, mi lin lasis en fremdlando!  
«Ve! se li mortos, kiu helpas al mi?» *Aŭdu.*

p. 35

Kunveno ĉe Marsilo.

### 74

Ne povas Karlo sin deteni plori;  
Kunkompatadas kun li cent mil Francoj  
Timante terurege pri Rolando  
Danĝerigita de perfida Geno...  
De fremda Reĝ' ricevis li donacojn,  
Arĝenton, oron, silkvestaĵojn, mulojn,  
Ĉevalojn, kaj kamelojn, kaj leonojn...  
Marsil' alvokas de l' anar' baronojn,  
Vicgrafojn, grafojn, dukojn, almasurojn,  
850 Emirojn, kaj la filojn de la grafoj,  
Kvarcent mil li kunigis post tri tagoj,  
Urbanojn alvokinte per tamburoj.  
Mahomstatuon starigitan alten  
Sur turo ĉiuj preĝas kaj adoras.  
Furiozege tiam ili rajdas  
Tra la kampar', la valoj kaj la montoj.  
Jen ili vidas la standardojn francajn,  
Kun postgvardio, dek du konsilistojn...  
Ho! nepre batalado ekfariĝos! *Aŭdu.*

Paroladoj.

### 75

860 Jen nevo de Marsil' antaŭe rajdas  
Sur mulo; li ĝin per bastono pikas.  
Al l' onklo afablege li parolas:  
«Por mia serv' al Via Reĝa Moŝto,  
«Elportis mi dolorojn kaj klopodojn,  
«Batalis, kaj, venkinto, mi revenis;  
«Permesu, ke Rolandon mi ataku;  
«Mi lin mortigos per tranĉega lanco;  
«Se Mahomet' bonvolos helpi al mi,  
«Mi liberigos tutan Hispanujon,  
870 «De Aspraj intermontoj ĝis Duresto.  
«For Karlo, Francoj tuj kapitulacos,  
«Kaj vi plu ne batalos vivodaŭre!»  
Marsilo Reĝo donas al li ganton. *Aŭdu.*

p. 36

### 76

La ganton tenas nevo de Marsilo,  
Li fierege diras al la Onklo:  
«Ĵus min honoris Via Reĝa Moŝto!  
«Elektu nun dek unu estrojn, por ke  
«Ni ekataku dek du konsilistojn.»  
L' unua ekparolas Falsaruno;  
880 (Ĉi-tiu estas frato de Marsilo),  
«Sinjoro nevo, mi kaj vi kuniros.  
«Ni ambaŭ certe, tie, batalados  
«La postgvardion de anar' de Karlo.  
«Ni ĝin mortigos; tio certa estas!» *Aŭdu.*

## 77

Jen siavice Korsablino, Reĝo  
De Barbarujo; kvankam malvirtulo,  
Li ekparolas kiel kuraĝulo:  
«Por tuta Dia or', mi ne forkuros.  
«*Roland' ĉeestu, tuj mi lin atakos.*  
«*Mi estas tria, vi elektu kvaran.*»  
Sed vidu, jen Malprimo de Brigalo;  
890 Li kuras, pli rapide ol ĉevalo,  
Kaj per laŭtvoĉo krias al Marsilo:  
«Al Rencesvalo, jes, mi tien iros!  
«*Roland' ĉeestu, tuj mi lin mortigos!*» *Aŭdu.*

## 78

Ĉeestas la Emir' de Balagero,  
Belkorpa kaj vizaĝ' fiera, hela,  
Kaj kiam sur ĉevalo li rajdadas,  
Nobele, brave, li armilojn portas.  
Famulo pro kuraĝo, se li estus  
Kristan', barono estus fariĝinta.  
900 Li venas al Marsil' kaj laŭte diras:  
«Al Rencesvalo, jes, mi iros tien;  
«*Roland' ĉeestu, morte li finiĝos,*  
«Kaj Oliviro, dek du konsilistoj,  
«Kaj Francoj mortos kun doloro, honto!  
«Pri Karlo, li, grandaĝa, babiladas;  
«De nun li ĉesos nin kontraŭbatali;  
«*Libera Hispanujo restos al ni.*»  
Marsilo Reĝo lin tre multe dankas. *Aŭdu.*

## 79

Ĉeestas tie Estr' de Moriano,  
910 Plej perfidulo en Hispanolando;  
Li al Marsilo fanfaronas jenajn:  
«Al Rencesvalo mi kondukos genton,  
«Dudek mil virojn kun pikstangoj, ŝildoj.  
«*Roland' ĉeestu, li certege mortos,*  
«*Kaj Francoj mortos, kun doloro, honto.*  
«*Pri ili ĉiutage Karlo ploros!*» *Aŭdu.*

## 80

Kaj ankaŭ jen Turgiz' de Turteluso.  
Li estas grafo, Estro de la urbo;  
Kristanojn ruinigi li volegas.  
Al la aliaj li alproksimiĝas,  
920 Kaj diras: «Reĝ' ne timu; Maho estas  
«Pli forta, ol, en Romo, Sankta Petro;  
«Se vi lin servos, *ni akiros* venkon;  
«Al Rencesval' mi iros al Rolando;  
«Neniu povos savi lin de morto.  
«Rigardu mian glavon, bonan, longan,  
«Mi ĝin prezentos kontraŭ Durendalo;  
«Vi scios, kiu estos la venkinto.  
«Se Francoj ekbatalos, ili mortos.  
«Maljuna Karl' dolore, honte vivos,  
«Neniam plu *sur kap'* portante kronon!» *Aŭdu.*

## 81

Jen ankaŭ Eskremizo de Valterno;  
Li, idolana Estro de ĉi-lando,  
Al Reĝo diras, meze de l' anaro:  
«En Rencesval' mi humiligos Francojn.  
«Roland' ĉeestu, li la kapon perdos;  
«Kaj Oliviro, l' Estro de l' aliaj,  
«Konsilistaro *iros* al la morto;  
«Francujo dezertiĝos, Francoj mortos,  
«Anaron Karlo havos plu neniam!» *Aŭdu.*

## 82

940 Jen ankaŭ idolano Esturganto,  
Kun li, Estramarin' kolego lia;  
Plej perfiduloj ili ambaŭ estas:  
«Sinjoroj, diras Reĝ', antaŭenrajdu,  
«Al Rencesvalaj intermontoj iru,  
«Kaj helpu al irad' de mia gento.»  
—Kaj ili: «Ni plenumos la ordonon;  
«Al Oliviro kaj Roland' ni iros,  
«Neniu savos dek du Konsilistojn.  
«Ĉar niaj glavoj estas bonaj, tranĉaj,  
950 «Ruĝiĝos ili per varmega sango;  
«Kaj Francoj mortos, Karl' pri ili ploros,  
«Kaj grandan Landon ni donacos al vi;  
«Vi ĝin posedos, jes, Sinjoro, venu;  
«Imperiestron al vi *ni submetos!*» *Aŭdu.*

p. 39

## 83

Alkuras Margariz' de Sebilio,  
Li superregas landon ĝis *la maro*.  
Virinoj amindumas ĉi-belulon.  
Se *sinjorino* vidas lin, ŝi ĝojas,  
Kaj, *vole aŭ nevole*, dolĉridetas.  
960 Nenia idolano lin egalas.  
En mezo de l' anaro, li, pli laŭte  
Ol la aliaj diras: «Reĝ', ne timu;  
«En Rencesval' Rolandon mi mortigos,  
«Kaj Oliviro ne eliros viva,  
«Kaj dek du Konsilistoj ankaŭ mortos.  
«Jen vidu mian orprenilan glavon,  
«Emir' de Primo ĝin donacis al mi.  
«Mi, ja, enigis ĝin en ruĝan sangon!  
«Al Francoj morto! Al Francujo honto!  
970 «Maljuna Reĝo Karlo, florbarbulo,  
«Kun larmoj kaj koler' travivos tagojn!  
«Ĉi-jaron, ni, venkintoj de Francujo,  
«En urbo San Deniz' kviete dormos!»  
Pripense, idolana Reĝ' sin klinas. *Aŭdu.*

## 84

Kaj jen Ŝernublo de la *Nigra Valo*.  
Ĝis tero pendas lia kaphararo.  
Pli pezan ŝarĝon portas li, ludante,  
Ol tiu por kvar muloj ŝarĝegitaj.  
*Ĉi-brava graf' forlasis landon, kie*  
980 Ne brilas suno, kaj ne kreskas greno,  
Ne pluvas, roso ne akvumas teron,  
Kaj ne troviĝas ŝtono, se ne nigra.  
Ĝi ŝajnas esti Hejmo de Diablo!  
Kaj li: «Mi zonis mian bonan glavon,  
«Mi ja ruĝiĝos ĝin en Rencesvalo!  
«Roland' bravul' ĉeestu, mi lin frapos;  
«Alie, oni kredu min neniam!  
«Per glavo, mi akiros Durendalon!  
«Francujo *ruiniĝos*, Francoj mortos!»  
990 Kunvenas dek du fremdaj *Konsilistoj*,  
Alprenas al si cent mil Sarazenojn,  
Kaj rapidege kuras al batalo.  
Sub abiaro ili sin pretigas. *Aŭdu.*

p. 40

Pretiĝado por la batalo.

85

Nun ili vestas sin per sarazenaj  
Kirasoj, (ofte je subaj' triobla).  
Jen ili metas Saragusajn kaskojn,  
Kaj zonas glavajn el Viena ŝtalo;  
Jen ŝildoj belaj, lancoj de Valenco,  
Kaj jen standardoj blankaj, bluaj, ruĝaj!  
1000 Ŝarĝilajn brutojn, mulojn ili lasas,  
Kaj rajdas sur ĉevaloj, flank' ĉe flanko...  
La tago estas hela, suno bela,  
Armaĵoj ĉie brilas kaj flamiĝas,  
Mil kornoj miriginde trumpetas.  
Grandega *estas* bru'! Ĝin aŭdas Francoj.  
Jen Olivir': «Sinjor', koleg', mi kredas,  
«Ke Sarazenoj eble nin batalos!»  
—Roland': «Per tio, Dio nin favoru!  
«Ni devas kontraŭstari por la Reĝo,  
1010 «Suferi oni devas por la Estro,  
«Por li, elporti varmon kaj malvarmon,  
«Kaj perdi ankaŭ haŭton kaj hararon!  
«Bategi estas ĉiuhoma devo;  
«Ne oni kantu pri ni malbonaĵon!  
«Ni estas pravaj kontraŭ Idolanoj;  
«Ekzemplo kulpa ja ne estos de mi!» *Aŭdu.*

p. 41

## MORTO DE ROLANDO

Komenco de batalego.

86

Altaĵon Olivir' suprenirinte  
Rigardas dekstren tra la herba valo;  
Li vidas Idolanan tutan genton.  
1020 Rolandon la amikon li alvokas:  
«El Hispanujo, kiom da bruado!  
«Da kaskoj brilaj, kaj kirasoj helaj!  
«Tuj nepre Francoj multe batalegos!  
«*Ĉi-tio estas perfidaĵ' de Geno.*  
«Dejoriginte tie nin de l' Estro!»  
Rolando diras: «Vi, la buŝon bridu,  
«Al mi li estas duonpatr'... silentu!» *Aŭdu.*

87

Altaĵon supreniris Oliviro,  
El tie li rigardas Hispanujon.  
1030 Kaj Sarazenan densan anaregon.  
Jen brilas oraj, juvelhavaj kaskoj,  
Kaj ŝildoj, kaj broditaj subkirasoj,  
Pikstangoj, kaj standardoj sur la hastoj!  
La rotojn li ne povas kunkalkuli!  
Ilian nombron kiu povus diri?  
Li mem fariĝas tute miriĝinta.  
Penade de monteto li revenis;  
Al Francoj li raportas pri l' vidaĵo! *Aŭdu.*

p. 44

88

Li diras: «Ili estas tiom kiom

1040 «Ne eble estas dungi pli ol ilin.  
«Ĉeestas *ja pli ol* cent mil, kun ŝildoj,  
«Kaj kaskoj kaj kirasoj brilegantaj,  
«Pikstangoj rektaj, kaj brunhelaj hastoj!  
«Vi nepre miriginde batalegos.  
«Sinjoroj francaj, Dio helpu al vi!  
«Ni ĉiuj kontraŭstaru por la venko!»  
—«Malben' al forkuranto, diras Francoj,  
«Ni ĉiuj estas pretaj, eĉ por mortoj!» *Aŭdu.*

Fiereco de Rolando.

## 89

Jen Olivir': «Grandnombraj Idolanoj,  
1050 «Kaj nur malmultaj Francoj, al mi ŝajnas!  
«Roland' amiko, sonorigu kornon;  
«Ĝin aŭdos Karlo, kaj reiros gento.»  
Roland' respondas: «Mi malsaĝa estus,  
«Kaj perdus gloron en Francujo dolĉa!  
«Per Durendalo mi fortege batos;  
«Ruĝiĝos ĝia plat' ĝis l' orprenilo,  
«*Kaj ankaŭ Francoj frapos kuraĝege!*  
«Jes! pentos Idolanoj intermontojn  
«Irinte; ili ĉiuj nepre mortos!» *Aŭdu.*

## 90

«Roland' amiko, prenu Olifanton;  
1060 «Aŭdinte, Karlo reirigos genton.  
«La Reĝo kaj baronoj helpos al ni!»  
—Rolando: «Dio gardu, ke mi estu  
«Al parencaro kaŭzo de mallaŭdo  
«Pro malhonoro al Francujo dolĉa!  
«Fortege batos mi per Durendalo,  
«La bona glavo, tie ĉi je l' flanko.  
«Ruĝiĝos ĝia ŝtala plat' per sango  
«De Idolanoj tien ĉi malprave  
«Venintaj; ili ĉiuj nepre mortos!» *Aŭdu.*

p. 45

## 91

1070 «Roland' amiko, prenu Olifanton;  
«Ĝin aŭdos Karlo intermontiranta,  
«Kaj kun li Francoj ja returnen iros!»  
—Rolando: «Dio gardu! kaj neniam,  
«Tra mondo, iu povu diri, *ke mi*  
«Pro Idolanoj sonorigis kornon!  
«Mi tiel ne hontigos parencaron!  
«Sed kiam estos mi en batalego  
«Mi tranĉefrapos mil kaj sepcent foje!  
«Ruĝiĝos ŝtala Durendal' per sango!  
1080 «Kuraĝe batalegos bravaj Francoj;  
«Kaj Sarazenoj ne evitos morton!» *Aŭdu.*

## 92

Kaj Olivir': «Ne estus hontindaĵo!  
«Mi vidis la hispanajn Sarazenojn;  
«De ili plenaj estas valoj, montoj,  
«Kaj ankaŭ stepoj, ĉiuj ebenaĵoj!  
«Potenca estas fremda anarego,  
«Kaj nur malmultenombra nia gento!»  
—Roland': «El tio la fervoro kreskas!  
«Min gardu Dio kaj Anĝeloj *sanktaj,*  
1090 «Ke iam mi Francujon malaltigu!  
«Pli bona morto ol malhonoriĝo!  
«Ni frapu, Karlo ŝatas kuraĝulojn!» *Aŭdu.*

p. 46

## 93



Rolando estas nobla, Oliviro  
 Prudenta; ambaŭ miriginde bravaj,  
 Rajdante, armiĝinte, multplivolus  
 Mortiĝi ol seniĝi je batalo!  
 Belkoraj grafoj noble ekparolas...  
 Ĉar Idolanoj fervorege rajdas,  
 Ekkrias Olivir': «Rolando, vidu,  
 1100 «Ĉeestas ili, tro malestas Karlo!  
 «Ho! Kial vi ne sonorigis kornon?  
 «Alestus Reĝo, kaj ni estus fortaj!  
 «*Al ili, tie, oni ne riproĉu!*  
 «Rigardu supren, *Asprajn* intermontojn,  
 «Vi vidos plendan postgvardion!... kiu  
 «Nun estas tie, estos plu nenie!»  
 —«He, babilaĵo! diras graf' Rolando,  
 «Malbeno estu al malkuraĝulo!  
 «Sur kampo ni fortege kontraŭstaros;  
 «De ni devenos battoj kaj batalo!» *Aŭdu.*

#### 94

1110 Roland' vidante bataladon certan,  
 Pli ol leon' aŭ leopard' fieraj,  
 Al Francoj kaj al Oliviro diras:  
 «Koleg' amiko, ne parolu tiel;  
 «Ĉar Karlo kiu lasis al ni Francojn  
 «Kunigis tiujn dudek mil el ili.  
 «Li scias, ke ni ĉiuj estas bravaj.  
 «Por l' Estro multe ni suferi devas,  
 «Elporti varmon ankaŭ la malvarmon,  
 «Kaj malavari sangon kaj eĉ karnon!  
 1120 «Al vi *la* hasto, al mi Durendalo  
 «La bona glavo, de la Reĝ' donaco;  
 «Post mi la posedanto povos diri,  
 «Ke ĝi al nobla grafo apartenis!» *Aŭdu.*

p. 47

#### 95

Turpin' ĉefepiskopo estas tie,  
 Ĉevalon pikas, monton supreniras,  
 Alvokas Francojn kaj predikas tiel:  
 «Baronoj noblaj, Karl' ĉi-tie lasis  
 «Nin; por li ni bravege morti devas,  
 «Por helpi al defend' de Kristanaro!  
 1130 «Vi tuj batalos, tio certa estas;  
 «Vi vidas, tie estas Sarazenoj.  
 «Pri pekoj, petu Dion por pardono!  
 «Animojn viajn mi tuj senpekigos;  
 «Kaj se vi mortos, vi, martiroj sanktaj,  
 «Sidiĝos en altaĵoj Paradizaj.»  
 —Nun Francoj piediras, genufleksas;  
 Ĉefepiskop', je Dio, ilin benas:  
 «Vi pentofaru per fortegaj battoj!» *Aŭdu.*

#### 96

Nun Francoj releviĝas *sur* piedoj,  
 1140 Senkulpigitaj, kvitaj je la pekoj;  
 Ĉefepiskop' je Dio benis ilin.  
 Ekrajdas ili sur ĉevaloj viglaj,  
 Armaĵojn portas, kiel kavaliroj  
 Por la batalo tute pretiĝintaj.  
 Rolando graf' alvokas Oliviron:  
 «Sinjor' kolego, vi pravege *diris*,  
 «Ke grafo Geno ĉiujn nin *perfidis!*  
 «Li prenis donojn, oron kaj arĝenton!  
 «Imperiestro prave nin venĝegus!  
 1150 «Marsilo Reĝo, komercinte pri ni,  
 «Per niaj glavoj nur ricevos pagon!» *Aŭdu.*

p. 48

#### 97

Roland' trairas hispanintermontojn

Sur Vejlantif' ĉevalo sia bona.  
 Plej taŭga estas lia armilaro,  
 Li noble tenas per la pugn' pikstangon  
 Al la ĉielo direktatan; pendas,  
 Je supr', standardo tute blanka, kies  
 Franĝaĵoj oraj *kovras* lian *manon*,  
 Rolando estas vigla, ĝoja, gaja.  
 1160 Amiko Oliviro sekvas lin, kaj  
 Francanoj krias: «Li savonto estas!»  
 Li tiam fierege Sarazenojn  
 Rigardas ... sed pasie, dolĉe, Francojn;  
 Ĝentilan vorton li al ili diras:  
 «Baronoj noblaj, paŝu malrapide;  
 «Al sia perdo iras Idolanoj!  
 «Hodiaŭ ni akiron prenos ... riĉan  
 «Pli ol akiris iam franca reĝo!»  
 De tiam la anaroj renkontiĝas. *Aŭdu.*

## 98

1170 Jen Oliviro: «Mi ne parolados!...  
 «Ĉar vi ne volis sonorigi kornon,  
 «Neniam helpon Reĝo donos al vi.  
 «Ne scias Karlo, li do estas prava!  
 «Al ili tie oni ne riproĉu!  
 «Baronoj noblaj, laŭ la povo rajdu;  
 «De nun, neniu iru malantaŭen!  
 «Pro Dio! Pensu nur pri du aferoj:  
 «Kaj doni, kaj ricevi fortajn batojn!  
 «Nu, ni memoru pri deviz' de Karlo!»  
 1180 Je tiu vorto, Francoj ekkriadas:  
 «Munĝojo!» —Kiu aŭdus ilin, povus  
 Nur pensi pri plej alta kuraĝeco!  
 Ho Dio! Kiel bela la rajdado!  
 Rapidigante marŝon per spronbatoj  
 Tuj ekfrapagos ili ... (Ĉu ne pravaj?),  
 Sed Sarazenoj pro nenio timas...  
 Jen Francoj, Idolanoj, brust' ĉe brusto. *Aŭdu.*

p. 49

## Interpuŝo.

## 99

La nevo de Marsilo, Aelroto,  
 Unue rajdas antaŭ la anaro.  
 (*Armiloj bonaj kaj ĉevalo forta*).  
 1190 Li tiel ekinsultas niajn Francojn:  
 «Perfidaj Francoj, tuj vin ni batalos!  
 «Perfidis, kiu devus vin defendi!  
 «Malsaĝa Reĝo vin ĉi-tie lasis!  
 «Francujo dolĉa perdos tuj la gloron,  
 «Kaj granda Karl' de korpo dekstran brakon!  
 «*Hispanaj montoj fine kvietiĝos!*»  
 Roland' lin aŭdas; Dio! kia bato!  
 Per oraj spronoj li ĉevalon pikas,  
 Furiozege frapas l' Idolanon;  
 Kirason rompas, ŝildon dispecigas,  
*Tra l' korpo puŝas sian grandan glavon,*  
 1200 Distranĉas bruston, kaj disrompas ostojn,  
 Disigas tutan spinon de la dorso;  
 Per hasto li forpelas la animon,  
 Kaj tiel li ŝanceliĝintan korpon  
 Faligas de ĉeval' per unu bato.  
 La kolo distranĉiĝas en du pecoj!  
 Ne lasas lin Roland', sed al li diras:  
 «For, malŝatinda! Karlo ne malsaĝa,  
 «Ĉar li neniam amis perfidaĵon!  
 «En Intermontoj prave li nin lasis!  
 1210 «Francujo dolĉa tuj ne perdos gloron!  
 «Frapadu, Francoj, jen komenco estas!  
 «Ni pravaj, malsatuloj-ĉi malpravaj!» *Aŭdu.*

p. 50

- Jen estas tie Duko Falsaruno.  
 Ĉi-tiu estas frato de Marsilo,  
 Kaj Estro super Dato, Abiruno;  
 El ĉiuj plej malnobla kaj perfida.  
 Tro larĝa lia frunto inter la du  
 Okuloj almezuras duon futon.  
 Je vido de mortinta nev', dolore  
 1220 Li ĝemas, el amas' antaŭenkuras,  
 Ekkrias idolanan signaldiron,  
 Kaj kolerege kontraŭ Francoj, diras:  
 «Francujo dolĉa perdos tuj honoron!»  
 Lin aŭdas Olivir' kun kora bato!  
 Per oraj spronoj li ĉevalon pikas,  
 Kaj tuj majstrece frapas Falsarunon;  
 Kirason rompas, ŝildon dispecigas,  
 Trapikas lin per pinto de standardo,  
 Faligas lin de selo unubate,  
 1230 Kaj al sternita tere malsatulo  
 Li fierege alparolas tiel:  
 «Malnobla! mi ne zorgas pri minacoj!  
 «Frapadu, Francoj, ĉar ni certe venkos!  
 «Munĝojo» krias li, «Deviz' de Karlo!» *Aŭdu.*

p. 51

## 101

- Jen estas tie Korsablino, Reĝo  
 De Barbarujo, malproksima lando.  
 Aliajn Sarazenojn li alvokas:  
 «En la batalo, ni ja povas venki,  
 «Ĉar Francoj estas nur malmultenombraj,  
 1240 «Kaj ĉiuj ĉeestantoj malŝatindaj!  
 «Neniam unu eĉ al Karl' eliros,  
 «Dum tiu tago, ili nepre mortos!»  
 Turpin' ĉefepiskop' lin aŭdas, kaj lin  
 Malamas *pli ol* kiun ajn sur tero.  
 Per oraj spronoj li ĉevalon pikas,  
 Kaj terurege frapas Korsablinon;  
 Kirason rompas, ŝildon dispecigas,  
 Trapikas lian bruston per pikstango,  
 Kaj tiel forte, ke ŝancelas teren  
 1250 La korpon mortigitan unubate!  
 Nun al sternita tere malsatulo,  
 Turpin' ne povas sin deteni diri:  
 «Malnobla idolano, vi mensogis!  
 «Sinjoro Karlo ĉiam nin defendas!  
 «Neniam Francoj volos forkuradi!  
 «Anaron vian ni haltigos tie!  
 «Vi ankaŭ devos suferadi morton!  
 «Frapadu, Francoj, jes, sen interrompo!  
 «Jen nia komencaĵ', ni danku Dion!  
 «Munĝojo!» krias li, «Deviz' de venko!» *Aŭdu.*

## 102

Malprimon de Brigal' Gerin' ekfrapas.  
 Ne unu groŝon bona ŝild' valoras,  
 Ĉar disrompiĝis ĝia centra bulo  
 Kristala, kies peco falas teren.  
 Kiraso ekfendiĝas ĝis sur karno,  
 Jen la pikstango akra ĝin trapikas,  
 Jen l' Idolano teren, unubate!  
 Satano prenu for animon lian! *Aŭdu.*

p. 52

## 103

- Kaj Gerier' ekfrapas Amuraflon,  
 1270 Kirason rompas, ŝildon dispecigas,  
 En koron li enigas akran haston,  
 Trapikas korpon per fortega bato.  
 Jen mortigito teren, unubate.  
 Jen Olivir': «Batalo nia bela!» *Aŭdu.*

### 104

Ekfrapas Almasuron Duk' Sansuno.  
Li rompas oran kaj floretan ŝildon.  
Kiraso servas por nenio. Koro,  
Hepato, pulmo estas distranĉitaj!  
*Mortinto* teren! (Pri li ploru aŭ ne!).  
Ĉefepiskopo diras: «Jen majstrajo!» *Aŭdu.*

### 105

Ansejs' forlasas bridon al ĉevalo,  
Kaj kuras al Turgiz' de Turteluso.  
Li rompas ŝildon sub orita bulo,  
Kaj, sub kiras', duoblan ŝtofon fendas.  
Eniĝas bona hasto tra la korpon,  
Tiele, ke feraĵo ĝin trapikas!  
Jen mortigito teren, unubate.  
Rolando diras: «Jen kuraĝulaĵo!» *Aŭdu.*

p. 53

### 106

Engelier', Burdela Gaskujano,  
1290 Per spronoj pikas, kaj forlasas bridon;  
Atakas Eskremizon de Valterno.  
Sur lia kol' disrompas lian ŝildon,  
Disŝiras mentonumon de kiraso,  
Kaj frapas tra la brusto, inter ŝultroj;  
Faligas lin de selo, unubate,  
Kaj diras: «Ĉiuĵ vi al morto iros!» *Aŭdu.*

### 107

Otun' ekfrapas fremdan Esturganton  
Sur ledon de antaŭa ŝildsupraĵo,  
Fortranĉas ruĝajn, blankajn ornamaĵojn,  
1300 Kaj disrompinte pecojn de kiraso,  
Tra lian bruston puŝas fortan haston;  
Faligas lin senvivan de ĉevalo,  
Kaj ankaŭ diras: «Vin neniu savos!» *Aŭdu.*

### 108

Berengier' Estramarinon frapas,  
Kirason rompas, ŝildon dispecigas,  
Tra lian korpon puŝas fortan haston,  
Kaj lin mortigas ĉe mil Sarazenoj...  
El dek du Konsilistoj, jam dek mortis,  
El ili du vivantoj nur postrestas:  
Ŝernublo, ankaŭ grafo Margarizo. *Aŭdu.*

### 109

Jen Margariz' tre nobla kavaliro,  
Rapida, vigla, forta, bela, pikas  
Per spronoj. Li atakas Oliviron;  
Sub ora bulo li disrompas ŝildon,  
Kaj frapas lin laŭlonge de la ripoj.  
Sed Dio gardas ... bato ne efikas...  
Kaj hast' tuŝetas sed ne tranĉas karnon!...  
*Ne malhelpite*, Margariz' foriras;  
Por voki anojn, sonorigas kornon. *Aŭdu.*

p. 54

### 110

1320 Batalo estas ĉie miriginda!  
Rolando graf' ne timas riski morton.  
Li frapas dum en mano restas hasto.  
Ĝin dek kvin batoj *rompis* kaj frakasis!  
Li elingigas bonan Durendalon,  
Per spronoj pikas, kuras al Ŝernublo,  
Pecigas karbunkole brilan kaskon,  
Disigas same ĉapon kaj hararon,

Detranĉas la okulojn kaj vizaĝon,  
Kirason blankan lerte laboritan,  
1330 Kaj tutan korpon ĝis tra la femuroj,  
Ĝis selo ornamita per oraĵoj;  
Tra dorson de ĉevalo glavon puŝas,  
Disigas spinon, malgraŭ interosto;  
Faligas ambaŭ sur la densan herbon,  
Kaj diras: «Vi, malnobla, eraregis!  
«Al vi ne helpas Mahometo via!  
«Neniam tia malsatulo venkos!» *Aŭdu.*

### 111

Rolando graf' trarajdas batalejon.  
En mano, Durendalon akran, tranĉan,  
1340 Mortigan ĉie, inter Sarazenoj.  
Mortintoj amasiĝas sur mortintojn;  
Sur teron disverŝiĝas varma sango!  
Ruĝiĝas brakoj kaj kiras' de l' Estro,  
Ruĝiĝas kol' kaj ŝultroj de l' ĉevalo!  
Jen Oliviro ne prokrastas frapi,  
Jen dek du konsilistoj laŭdindegaj,  
Jen ĉiuj Francoj frapas kaj mortigas,  
Jen Idolanoj svenas aŭ mortiĝas!  
Ĉefepiskopo: «Brave por baronoj!  
«Munĝojo!» diras li, «Deviz' de Karlo!» *Aŭdu.*

p. 55

### 112

Trarajdas Oliviro batalejon,  
(En mano restas nur rompaj' de hasto!),  
Atakas Idolanon Malsarunon,  
Disrompas oran kaj floretan ŝildon,  
Elĵetas el la kapo du okulojn,  
(Cerbaĵo defaladas sur piedojn),  
Mortigas lin kun sepcent samgentulojn,  
El kiuj Estorguzon kaj Turgizon.  
Proksime de la man' rompiĝas hasto!  
1360 —Rolando: «Kion faras vi, kolego?  
«Batali per bastono vi ne povas!  
«Per fer' kaj ŝtalo vi pli bone agas!  
«Ĉu vi forgesis glavon Haltekleron  
Je orprenilo kaj kristala bulo?  
—Kaj Olivir': «Ĝin kiel elingigi?  
«Ne povas mi, ĉar mi ne ĉesas frapi!» *Aŭdu.*

### 113

Eltiras Oliviro bonan glavon  
Pri kiu tiom petis lin Rolando,  
Kaj montras ĝin al li per nobla gesto.  
Justinon de Fervalo li ekfrapas,  
De lia kapo faras du pecajojn,  
Distranĉas korpon kaj kirason flavan,  
Kaj selon, kie brilas or', belŝtonoj;  
Samtempe spinon de ĉeval' *distranĉas*,  
Kaj ekfaligas ilin ambaŭ teren.  
—Rolando: «*Nun*, en vi mi vidas fraton,  
«Ĉar tiaj battoj plezurigas Karlon!»  
«Munĝojo!», oni krias ĉiuflanke. *Aŭdu.*

p. 56

### 114

Gerino rajdas sur ĉeval' Sorelo,  
1380 Kaj Gerier', l' amik', sur Pasacervo;  
Forlasas bridojn kaj per spronoj pikas,  
Atakas idolanon Timozelon;  
Unua ŝildon, dua la kirason  
Ekrompas; ambaŭ tranĉas bruston,  
Faligas lin senvivan sur la kampon.  
(Ĉar mi ne aŭdis, mi ne scias, kiu  
El ili tiam estis pli rapida).  
*Engeliero de Burdel' mortigas*

Esperverinon, filon *de Borelo*,  
1390 Ĉefepiskopo same Siglorelon,  
Sorĉiston revenintan de Infero,  
Ĉar Ĉefdiabl' lin alkondukis tien.  
—Turpin': «Ĉi-tiu *estis perfidulo!*»  
—Roland': «Venkita estas malnoblulo!  
«Frat' Olivir' mi ŝatas tiajn batojn!» *Aŭdu.*

Interpuŝego.

### 115

Batalo de nun pligrandiĝas, Francoj  
Kaj Idolanoj frapas per glavbatoj;  
Atakas aŭ kontraŭbatalas ĉiuj!  
Ho! Kiom da standardoj, lancoj, hastoj,  
1400 Per sango makulitaj aŭ rompitaĵaj!  
Kaj kiom da bonegaj Francoj mortas,  
Ne vidos plu patrinojn nek edzinojn,  
Nek francanaron tie sopirantan!  
Pri ili, glora Karlo ploras, ĝemas!  
Por kio? Ve! Nenia helpo venos!  
Ĉar Gen' al ili malutilis, kiam  
En Saragus' li vendis patronomon!  
De nun, li perdos membrojn, ankaŭ vivon,  
En Ajks' li juĝe estos disŝirata,  
1410 Kaj kun li tridek el parencoj liaj,  
Al kiuj morto estos devigata! *Aŭdu.*

p. 57

### 116 (??)

*Kun la korpuso, Reĝo Almariso*<sup>[5]</sup>  
*Per flankaj kaj mirinda trairejo,*  
*Aliras Galtieron, kiu monton*  
*Gvardias en hispanaj intermontoj.*  
*Ekdiras Galtier': «Perfida Geno*  
*«Nin interŝanĝis por domaĝo nia!»* *Aŭdu.*

[5] Pri tiu epizodo estas parolate ĉe verso 812-a.

### 117 (??)

*Sur monton iras Reĝo Almariso;*  
*Sesdek mil Idolanoj ĉeestantaj*  
*Atakas forte, furioze Francojn,*  
*Kolere frapas ilin, kaj mortigas*  
*Aŭ forkurigas ĉiujn ilin. Pli ol*  
*Aliaj, Galtiero koleregas.*  
*Li tiras glavon, kaj kunpremas ŝildon,*  
*Antaŭan vicon malrapidirante,*  
*Malbone li salutas, kaj stariĝas.* *Aŭdu.*

### 118 (??)

*Apenaŭ Galtier' ĉi-tie staras,*  
*Sur ĉiujn flankojn ili lin atakas;*  
*Fortegan ŝildon ili ekdisrompas,*  
*Kirason blankan ŝiras, senornamas.*  
*Li, de kvar hastoj trapikita, resti*  
*Ne povas; li kvarfoje ŝanceliĝas,*  
*Kaj, vole aŭ nevole, li foriras!*  
*Laŭ povo, li malsupreniras monton,*  
*Kaj krias al Roland': «Baron'! Por helpo!»*<sup>[6]</sup> *Aŭdu.*

[6] Sekvo de tiu epizodo ĉe verso 2040.

p. 58

## Fulmotondro.

### 119

Batalo estas granda, mireginda!  
Roland' kaj Olivir' fervore frapas,  
Ĉefepiskop' pli ol milfoje batas,  
Kaj dek du konsilistoj rapidegas,  
Kaj Francoj kontraŭbatas ĉiuflanken...  
Po cent kaj po mil, Idolanoj mortas.  
Jes! kiu ne forkuras ne evitos  
La morton! Nepre ili ĉiuj mortas.  
1420 Sed Francoj perdas la plej bonajn ilojn,  
*La hastojn fortajn kaj la lancojn tranĉajn,*  
*Kaj la standardojn bluajn, ruĝajn, blankajn!*  
*De glavoj ekrompiĝis ŝtala plato!*  
*Da bravaj kavaliroj kiom mortis!*  
Ne vidos ili plu parencojn, patrojn,  
Nek Karlon atendantan ilin tie!...

Renverso stranga regas sur Francujo.  
Jen estas fulmotondroj, turnoventoj,  
Pluvegoj, kaj hajladoj eksterordaj!  
Jen estas akraj, oftaj fulmotondroj!  
Kaj (tio tute certa) jen tertremo!  
De Sankta Miĉjo de l' danĝer' ĝis Kølno,  
De Besancuno ĝis Gitsand' *haveno*,  
1430 En ĉiuj *urboj*, muroj disjетиĝas,  
Je la tagmezo, mallumiĝas. Oni  
Ekvidas nur se *nubo* ekfendiĝas!  
Tremegas ĉiuj kiuj vidas tion!  
Kaj kelkaj diras: «Jen finiĝ' de mondo!  
«Konsumo de centjaroj plenumiĝas!»  
Eraro! ĉar neniel scias ili  
Funebron pro la morto de Rolando! *Aŭdu.*

### 120

*Teruraj mirindaĵoj, fulmotondroj*  
*Aperas antaŭsignoj en Francujo:*  
*De la tagmez' ĝis horo de la Vesproj,*  
*Densega, mallumega nokto regas;*  
*Ne brilas suno kaj ne lumas luno.*  
*Je tia vido, oni nur ekpensas*  
*Pri mort'; kaj tute prave, ĉar mortiĝas*  
*Rolando, kondukinto de l' aliaj!...*  
*Neniam egalulo Idolanojn*  
*Batalis kaj Reĝlandojn al militis!* *Aŭdu.*

## Daŭrigo de Interpuŝego.

### 121

*Grandega, terurega batalado!*  
*Per tranĉaj glavoj ĉiuj Francoj frapas.*  
*Per sango ruĝiginte glavojn, ĉiuj*  
*Ekkrias: «Je Munĝoj', devizo glora!»*  
*Forkuras Sarazenoj tra kamparo.*  
*El batalejo Francoj sekvas ilin.*  
*Jes, certe, estis batalad' terura!* *Aŭdu.*

### 122

*Malgaje kaj kolere, Idolanoj*  
*Eliras el batalo kaj forkuras...*  
*Sed viglaj Francoj persekutas ilin.*  
*Vi kredus, ke kamparo drapiriĝis;*  
*Ĉar tere kuŝas multaj Sarazenoj,*  
*Fervestoj helaj kaj kirasoj brilaj,*  
*Rompitaj hastoj, kaj standardaj pecoj.*

*En la batalo, Francoj certe venkis,  
Sed, ve! penad' ankoraŭ pligrandiĝos!  
Kaj Karlo iom perdos forton, gloron!  
Francujo dolorege ekfrapiĝos! Aŭdu.*

### 123

Kuraĝe kaj fervore Francoj *frapas*;  
Po mil, po masoj Idolanoj mortis.  
1440 El cent mil, nun apenaŭ du mil vivas.  
*Ĉefepiskop'*: «Bravuloj estas niaj,  
«Nenie ia *Reĝo* havas tiajn!  
«En franca Gesto estas priskribite:  
—«*Estiĝas plena rajt' en Franca Tero*,  
«Ke niaj estroj *havu bravajn* anojn.»—  
Tra kampo ili iras, serĉas fratojn,  
Dolore, kortuŝite, ploras larmojn  
Pro kora amo al parencoj. Baldaŭ  
Marsil' al ili venos kun anaro! Aŭdu.

### 124

*Rolando estas brava kavaliro,  
Kaj Olivir' kaj dek du konsilistoj,  
Kaj ankaŭ Francoj estas laŭdegindaj.  
Jes, ili mortigadis Idolanojn,  
El cent mil ne nur unu mil postvivas,  
Kun Margarizo ... sed jen li forkuras...  
Vi ne riproĉu lin pri tio, ĉar li  
Sur korpo povas montri noblajn vundojn.  
Li estas trapikata de kvar battoj...  
Al Hispanujo li returnen iras;  
Al Reĝ' Marsilo li rakontos ĉion. Aŭdu.*

p. 61

### 125

*Forkuris sola Reĝo Margarizo.  
Rompiĝis hasto; ŝildo, traborita,  
Sub centr' nur almezuras duonfuton,  
Per sang' ruĝiĝis ŝtalo de la glavo,  
Fervesto disŝiriĝis, disrompiĝis.  
Li estas trapikita de kvar battoj,  
Kaj brave batalinte, li revenas!  
Ho! Kiel nobla se Kristan' li estus!  
Al Reĝ' Marsilo li rakontas ĉion.  
Subite, antaŭ Reĝ' li genufleksas,  
Kaj diras: «Via Reĝa Moŝto, rajdu,  
«Vi trovos Francojn de Francujo lacajn;  
«Ĉar ili nin frapadis kaj batadis;  
«Iliaj hastoj estas disrompitaj,  
«El ili pli ol la duono mortis,  
«Kaj nunvivantoj estas nur malfortaj.  
«Ruĝiĝis la plimulto per vundsango;  
«De nun malestas helpaj armilaĵoj,  
«Kaj vi facile venĝos niajn. Francoj  
«Venkeblaj estas, Via Reĝa Moŝto!»*

*Sed Francoj krias: «Olivir', Rolando,  
«Kaj dek du konsilistoj, donu helpon!»  
Ĉefepiskop' unua ekparolas:  
«Dianoj! Estu viglaj kaj fieraj;  
«Hodiaŭ vi kroniĝos per glorlaŭroj,  
«Kaj Sankta Paradizo vin ricevos!»  
En korkuneco kaj doloro, ili  
Pro amikeco ploras reciproke,  
Kompate kisas nun la alian!  
—Rolando diras: «Vi, baronoj, rajdu  
«Ĉar jen Marsilo kun cent mil rajdantoj!» Aŭdu.*

p. 62

Alveno de Marsilo.



Marsilo Reĝo trairadas valon.  
 Armeon multenombran li kunigis;  
 Korpusojn dudek dispartigis de ĝi.  
 Rebrilas oraj kaj belŝtonaj kaskoj,  
*Pikstangoj, hastoj kaj standardoj rektaj,*  
 Kaj ŝildo kaj fervestoj ornamitaj.  
 Sep mil trumpetoj «Por atak'» sonoras.  
 Tra la kamparo, kia granda bruoj!  
 —Rolando: «Olivir', kolego, frato,  
 «Perfida Geno ĵuris, ke ni mortu;  
 «Videbla estas lia perfidaĵo;  
 «Imperiestro nin venĝegos al li.  
 1460 «Hodiaŭ ni fortege batos; oni  
 «Neniam vidis tian renkontiĝon!  
 «Ni frapu, mi per glavo Durendalo,  
 «Kaj vi, koleg', per via Halteklero.  
 «(Ni ilin tiom portis tra fremdlandoj,  
 «Per ili tiom venkis en bataloj!)  
 «Ne oni kantu pri ni malbonaĵon!» *Aŭdu.*

## 127

*Ĉar* Francoj vidas Idolanojn tiom  
 Amasiĝintajn sur kamparo, ili  
 Alvokas Oliviron kaj Rolandon,  
 1470 Kaj dek du konsilistojn por la helpo,  
 Ĉefepiskopo diras taŭgajn vortojn:  
 «Sinjoroj kaj baronoj, vi ne timu;  
 «Je Dio! Ne forkuru, por ke pri vi  
 «Koruloj ne kantadu malbonaĵojn!  
 «Pli bone estas en batalo morti!  
 «Jes! Certe estas, ke ni tuj mortiĝos!  
 «Post tiu tago ni ne restos vivaj!  
 «Mi tamen povas certe diri al vi,  
 «Ke Sankta Paradizo vin ricevos,  
 1480 «Ke morgaŭ vi sidiĝos ĉe Sanktuloj!»...  
 Aŭdinte, Francoj viglaj kaj fieraj  
*Per spronoj pikas, kaj antaŭenrajdas,*  
 Kaj ĉiuj ekkriegas: «Je Munĝojo!» *Aŭdu.*

## 128

*Marsilo Reĝo estas Reĝ' malbona;*  
 Li diras: «Idolanoj, vi min aŭdu;  
 «Rolando grafo estas potenculo,  
 «Ni povus venki lin nur malfacile,  
 «Kaj du bataloj, ŝajne, ne sufiĉos;  
 «Trifoje ni batalos, ĉu vi volos.  
 «Unue, dek korpusoj atakados,  
 «La dek aliaj restos tie kun mi.  
 «Hodiaŭ Karlo iom perdos povon,  
 «Kaj vidos malgloreĝon de Francujo!»  
 Li donas al Grandojn' standardon oran,  
 Por ke li gvidu genton kontraŭ Francoj,  
 Kaj al li donas altestrecon reĝan. *Aŭdu.*

## 129

*Marsilo Reĝo restis sur monteto.*  
 Grandojn' malsupreniras en la valon;  
 Tri oraj najloj fiksas la standardon;  
 Li laŭte krias: «Nun, baronoj, rajdu!»  
 Mil kornoj tiam hele sonoradas;  
 Kaj Francoj diras: «Patra Dio! kion  
 «Ni faros? Ve al ni! pro Grafo Geno!  
 «Ĉar certe li nin perfidege vendis,  
 «Por helpo venu dek du konsilistoj!»  
 —Ĉefepiskop' unua ekrespondas:  
 «Hodiaŭ kuraĝuloj honoriĝos;  
 «Al vi disdonos Dio kronojn, florojn,  
 «En Paradizo, inter la Gloruloj;  
 «Malkuraĝuloj ne eniros tien!»

—Kaj Francoj diras: «Ni kuniru kune!  
«Ni ne perfidos Dion, malgraŭ morto!»  
Jen ili pikas per oritaj spronoj,  
Kaj kuras al malnoblaj perfiduloj. Aŭdu.

Dubataloj.

### 130

Marsil' dividas genton en du partojn;  
Ordonas dek korpusoj restu kun li,  
Kaj dek aliaj rajdu por batali.  
Kaj Francoj: «Dio! Nepre ni tuj mortos!  
«Ĉu eksaviĝos dek du konsilistoj?»  
Ĉefepiskop' Turpin' unua diras:  
«Vi kuraĝuloj, kiuj amas Dion,  
«Hodiaŭ vi ricevos kronojn, florojn,  
«Vi sidos en ĉielaj sanktaj floroj,  
«Malkuraĝuloj ne eniros tien!»  
—Respondas Francoj: «Ni kuraĝaj estos!  
«Al Dia Volo ni ne kontraŭstaros!  
«Ni batalados kontraŭ malamikoj!  
«Malmultaj estas ni, jes, sed kuraĝaj!»  
Per spronoj ili pikas por ataki.  
Jen Francoj, Sarazenoj, brust' ĉe brusto! Aŭdu.

p. 65

### 131

En Saraguso, ia Idolano  
Posedas la duonon de la urbo  
Li estas Klimborin', *neniel* nobla.  
De grafo Geno li ricevis ĵuron,  
Pro amikeco kisis lin sur buŝo,  
Al li donacis glavon, karbunkolon.  
Ekdiras li: «Mi volas malhonor  
1490 «Francujon kaj de kron' seniĝi Karlon!»  
Li rajdas sur ĉevalo Barbamuŝo,  
Rapida pli ol nizo aŭ hirundo;  
Per spronoj pikas kaj forlasas bridon;  
Engelieron de Gaskuj' atakas,  
Kaj malŝatante ŝildon kaj kirason,  
Trapikas lian korpon per pikstango,  
Kaj tiel forte, ke ferpint' transiras,  
Faligas lin senvivan unubate,  
Kaj diras: «Ĉiuj estas elvenkeblaj,  
1500 «Por rompi vicojn, Idolanoj frapu!»  
—Kaj Francoj: «Ve! Doloro pri bravulo! Aŭdu.

### 132

Al Oliviro, graf' Rolando diras:  
«Amik', Engeliĝero ja mortiĝis!  
«Pli brava kavaliro ne troviĝis!»  
—Kaj Olivir': «Pro Dio, mi lin venĝos!»  
Per oraj spronoj li ĉevalon pikas;  
Li tenas sangoruĝan Haltekleron,  
Atakas kuraĝege l' idolanon;  
Ĉevalon li mortigas per glavbato,  
Kaj svingas glavon... Sarazeno falas...  
1510 Demonoj prenu for animon lian!  
Kaj li mortigas dukon Alfainon,  
Eltranĉas kapon de Eskababio,  
Kaj elseligas sep Arabojn, kiuj  
Neniam plu ekrajdos por batali!  
—Rolando: «Jen, l' amiko ekscitiĝas,  
«Kaj apud mi batalas laŭdeginde!  
«Pro tiaj batoj Karlo nin pli amos!»  
—Kaj, laŭte: «Nu! frapadu, kavaliroj!» Aŭdu.

p. 66

### 133

Jen estas idolano Valdabruno,  
1520 En majstr' ordeno patro de Marsilo.  
Sur maro, li posedas kvarcent ŝipojn,  
Maristoj rekomendas sin nur de li;  
Jerusalemon li perfide prenis,  
Eniris malrespekto Sliman templon,  
Mortigis Patriarkon apud fontoj;  
De grafo Geno li ricevis ĵuron,  
Al li donacis glavon kaj mil skudojn.  
Li rajdas sur ĉevalo Gramimundo,  
(Gi estas rapidmova pli ol falko),  
1530 Li pikas ĝin per siaj oraj spronoj;  
Sansunon gravan dukon li atakas,  
Kirason rompas, ŝildon dispecigas,  
Trapikas lin per pinto de standardo,  
Faligas lin de selo unubate,  
*Kaj diras: «Vi, malnoblaj, ĉiuj mortos,  
«Frapadu, Idolanoj, ni ja venkos!»*  
—Kaj Francoj: «Ve! Doloro pri barono!»

*Aŭdu.*

p. 67

### 134

Rolando vidas, ke Sansuno mortis,  
Dolore li premiĝas, (kompreneble),  
Per spronoj pikas, kontraŭ Valdabruno  
1540 Sin ĵetas, frapas tiel forte kiel  
Li povas (per multkosta Durendalo),  
Sur oran kaj belŝtonan lian kaskon;  
Li tranĉas kapon, bruston kaj kirason,  
Kaj ankaŭ oran kaj juvelan selon,  
Kaj, tre profunde, dorson de ĉevalo;  
Mortigas ambaŭ (lin aprobu aŭ ne).  
Kaj Idolanoj: «Terurega bato!»  
—Rolando diras: «Mi ja vin malamas,  
Ĉar vi malsaĝaj estas, kaj malpravaj!»

*Aŭdu.*

### 135

1550 Alvenis de Afriko, afrikano,  
Li Malkvidido (fil' de Reĝ' Malkvido)  
El oro estas lia armilaro,  
Pli ol aliaj ĝi je sun' rebrilas.  
Li rajdas sur ĉevalo Saltperduto,  
(Rapida pli ol ĝi ne estas, certe).  
*Li pikas ĝin per siaj akraj spronoj,*  
Ansejson li ekfrapas sur la ŝildon,  
Eltranĉas ruĝajn, blujn ornamaĵojn,  
Disŝiras la flankajon de kiraso,  
Trapikas lian korpon per pikstango.  
1560 Ansejs' mortiĝas... li la vivon finis!  
Kaj Francoj: Ve, barono malfeliĉa!»

*Aŭdu.*

p. 68

### 136

Ĉefepiskop' Turpin' trairas ĉien.  
Neniam tia pastro kantis meson,  
Kaj faris tiajn mirindaĵojn. Jen li  
Al l' Idolano: «Dio vin malbenu!  
«Vi ĵus mortigis, kiun mi amegis!»  
Li ekgalopas sur ĉevalo vigla,  
Frapegas lin sur ŝildon de Toledo,  
Faligas lin senvivan sur herbejon.  
—Kaj Francoj: «Brave al ĉefepiskopo!»

*Aŭdu.*

### 137

1570 Kaj jen Grandojno, idolano, filo  
De Kapuelo, reĝ' de Kapadoco.  
Li rajdas sur ĉevalo Marmorio,  
(Pli rapidmova ol fluganta birdo),  
Forlasas bridon kaj per spronoj pikas,  
Gerinon furioze ekatakas,  
*Mirindan* baton frapas, ŝildon rompas,

Sambate *tutan* la kirason ŝiras,  
Kaj lin trapikas per standardo blua,  
Lin faligante apud alta ŝtono.  
1580 Kaj li mortigas ankaŭ Gerieron,  
Berengieron, Gion, Antonion;  
Ekfrapas gravan dukon Aŭstorion,  
De Rono *kaj Valenco estron*, kaj lin  
Mortigas. Idolanoj ĝojegadas;  
Sed Francoj: «Granda nia defalaĵo!» *Aŭdu.*

### 138

Rolando tenas sangoruĝan glavon,  
*Ĝin suprenlevas, ĉiuflanken montras.*  
Sed, ĉar li aŭdis Francojn ploregantajn,  
Premiĝas pro doloro lia koro.  
Li diras al Grandojno: «Dio venĝu!  
1590 «Vi kare pagos kiun vi mortigis!»  
Per spronoj pikas kaj antaŭenkuras.  
Jen ambaŭ ĉeestantaj por duelo. *Aŭdu.*

p. 69

### 139

Grandojno estas saĝa kaj kuraĝa,  
Kaj multimema en batalo. Jen li  
Tra vojo renkontiĝas kun Rolando;  
Neniam lin vidinte, li lin konas  
Pro lia fiereco, korpbeleco,  
Kaj pro rigard' kaj nobla eksterajaĵo.  
*Li vidas sangoruĝan Durendalon,*  
Ne povas sin deteni ektimegi,  
1600 Kaj volus kuri for. Sed li ne povas.  
Roland' atakas tiel forte, ke li  
Ekrompas kaskon ĝis nazŝirmileto,  
Disrompas nazon, buŝon kaj makzelon,  
Kaj tutan korpon, kaj kirason retan,  
El ora selo du arĝentajn pletojn,  
Kaj, tre profunde, dorson de ĉevalo;  
Kaj li mortigas ambaŭ senespere....  
Dolorokrias la Hispanujanoj;  
—Kaj Francoj: «Nia estro brave frapas!» *Aŭdu.*

Batala kampo.

### 140

1610 Mirinda la batalo kaj rapida.  
Varmege, kolerege Francoj frapas,  
Eltranĉas manradikojn, ripojn, spinojn,  
Vestaĵojn ĝis la karno sangoruĝa!  
*Ho Dio! Kiom da tranĉitaj kapoj!*  
*Kaj kiom da kiraso disŝiritaj!*  
Sur verdan herbon sango defluadas!  
—Kaj Idolanoj: «Ni ne povas resti!  
«Ho Tero Granda! Maho vin malbenu!  
«Ĉar viaj filoj estas plej kuraĝaj!»  
—Kaj ĉiuj ekkriadas: «Ho, Marsilo,  
«Ekrajdu, Reĝo, ni bezonas helpon!» *Aŭdu.*

p. 70

### 141

1620 Mirinda kaj grandega batalado!  
Per ŝtalaj hastoj Francoj ekfrapegas!  
Vi povus vidi multojn suferantajn,  
Vunditajn, sangadantajn kaj mortintajn,  
Sur ĉiuj flankoj, unu sur l' alia!  
*Kaj kiom da ĉevaloj tra kamparo*  
*Kun bridoj ellasitaj antaŭ brusto!*  
Nun Idolanoj plu ne povas resti,  
Kaj vole aŭ nevole forkuradas.  
Sed Francoj varme persekutas ilin;

142

*Rolando frapas forte, kuraĝege;  
Ne haltas nek ripozas lia gento,  
Ĉar Francoj rapidrajdas sur ĉevaloj,  
Galope, trote, sekvas Idolanojn  
Per sango ruĝiĝintaj ĝis la zono,  
Ĉar glavoj malrektiĝis aŭ rompiĝis,  
Armiloj nun malestas por sin gardi!  
Sed ili memoriĝas pri trumpetoj,  
Pri kornoj, kaj pli fortaj refariĝas  
—Jen Idolanoj: «Ni malprave venis  
«En intermontojn por domaĝo nia!»  
Kaj turniĝante, ili forkuradas...  
Frapegas ilin Francoj. De mortintoj  
Puŝado iras ĝis la Reĝ' Marsilo! Aŭdu.*

p. 71

143

Vidinte tian mortiĝadon, Reĝo  
Ordonas sonorigi ĉiujn kornojn.  
1630 Li mem ekrajdas kun anaro tuta.  
Abismo, Sarazen', unue rajdas;  
Pli perfidulo ol li ne troviĝas  
Nek pli krimulo. Li neniel kredas  
En Dio, fil' de Sankta Manjo. Nigra  
Li estas, kiel peĉ' fluidiĝinta;  
Perfidon *kaj mensogon* li preferas  
Pli ol riĉaĵojn de Galico; kaj lin  
Neniu iam vidis ridi, ŝerci!  
Li estas kuraĝega kaj bravega;  
1640 Pro tio amas lin Marsil' perfida.  
Li portas standarddrakon, kunvensignon.  
Ĉefepiskopo lin ne povus ami,  
Ĉar lin vidinte, li lin volas frapi.  
En sia koro li kviete pensas:  
«Ĉi-tiu al mi ŝajnas herezulo!  
«Mi ŝatas nek timulojn nek timecon,  
«Mi mortu, se mi mem lin ne mortigos!» Aŭdu.

Daŭrigo de batalego.

144

Ĉefepiskop' atakas. Li rajdadas  
Sur la ĉeval' prenita jam al Reĝo  
1650 Grosajo, mortigita en Danujo.  
Ĉevalo estas vigla kaj rapida;  
Al ĝi piedoj belaj, kruroj plataj,  
Femur' mallonga kaj postaĵo larĝa,  
Riparo longa kaj dorsspino alta,  
*Belforma ĝia kol', de kap' ĝis brusto,*  
Kaj vosto blanka, kolhararo flava,  
Orel' malgranda kaj brunruĝa kapo.  
Nenia besto kun ĝi komparebla.  
Ĉefepiskopo ĝin per spronoj pikas,  
*Forlasas oran bridon kaj gvidilojn.*  
Bravege li alkuras al Abismo;  
1660 Ekfrapas sur la miregindan ŝildon  
Brilantan per belŝtonoj, ametistoj,  
Topazoj, karbunkoloj kaj kristaloj,  
Donacon de Emir' Galafr', al kiu  
El Valmetaso ĝin Diablo donis.  
Turpin' ĝin frapas (post fortega bato  
Ne unu groŝon plu valoras ŝildo);  
Li tranĉas korpon, transpuŝante lancon,  
Kaj teren faligante lin senvivan,  
*Li krias: «Je Munĝoj', deviz' de Karlo!»*  
—Kaj Francoj: «Jen bravulo, la bastono

p. 72

**145**

Rolando graf' alvokas Oliviron:  
«Sinjor' amiko, ĉu ne pensas vi, ke  
«Ĉefepiskopo estas vera majstro!  
«Pli nobla ol li ne troviĝas, tiom  
«Li frapas per pikstango kaj per hasto!»  
—Kaj Olivir': «Ni iru helpi al li!»  
Jen tiam Francoj ree bataladas;  
Fortega estas bata interpuŝo!  
Kristanoj dolorege suferadas! Aŭdu.

p. 73

**146**

*Armilojn perdis Francoj de Francujo;  
Sed restas tricent tranĉaj glavoj; ili  
Ankoraŭ povas frapi brilajn kaskojn.  
Ho Dio! Kiom da rompitaĵoj,  
Kirasoj, kaj fervestoj, kaj piedoj,  
Kaj pugnoj, kaj vizaĝoj disŝiritaj!  
—Jen Idolanoj: «Francoj nin difektas,  
«Kontraŭstaranto nur prokrastas morton!  
Aliras ili rekte al Marsilo,  
Kaj diras: «Bona Reĝa Moŝto, helpu!»  
Marsilo aŭdas ilin kaj respondas:  
«Ho Granda Tero! Maho vin detruu,  
«Ĉar via gento venkis mian genton,  
«Preninte tiel multajn urbojn, kiujn  
«Hodiaŭ tenas blankabarba Karlo!  
«Akiris li Kalabron, Pujlon, Romon,  
«Kostentinnoblon kaj Saksujon fortan!  
«Mi mortu pli ol kuri for de Francoj!...  
«Ne pripensante vian savon, frapu;  
«Ni venkos Karlon se Rolando mortis;  
«Sed, se li vivas, estos ni venkitaj!» Aŭdu.*

**147**

*Perfidaj Sarazenoj, per pikstangoj  
Frapegas ŝildojn, rebrilantajn kaskojn.  
Nur feran, ŝtalan bruon oni aŭdas;  
Fajreroj elflugadas ĝis ĉielo!  
Jen cerboj, sango, kvazaŭ per riveroj!  
Roland' en sia koro ekpremiĝas  
Vidante morti tiom da bravuloj;  
Sed ĉar li memoriĝas pri Francujo,  
Pri sia Onklo, bona Reĝo Karlo,  
Li, vole aŭ nevole, elreviĝas. Aŭdu.*

p. 74

**148**

*Rolando kuras en la interpuŝo.  
Kaj tie li ne ĉesas batalegi.  
Li tenas Durendalon, eltiritan  
El ingo, rompas kaskojn kaj kirasojn,  
Distranĉas korpojn, manradikojn, kapojn,  
Mortigas Idolanojn, kiuj falas  
Po centoj, ĉiuj sin juĝinte bravaj! Aŭdu.*

**149**

*Jen aliflanke staras Oliviro;  
Por atakado li antaŭenkuras,  
El ingo tiras karan Haltekleron,  
(Krom Durendal' ne estas pli efika).  
Ĝin tenas grafo; li varmege frapas;  
Je ruĝa sang' kovriĝis liaj brakoj.  
—Rolando diras: «Dio! Jen bravulo!  
«He! Nobla grafo, tiel prava, brava!  
«Hodiaŭ nia amikec' finiĝos!*

«Disiĝo dolorega ekfariĝos!  
«Imperiestro nin plu ne revidos!  
«Neniam estos en Francujo dolĉa  
«Doloro tia! Kaj neniam Franco  
«Por ni preĝados plu en monaĥejoj!  
«Animoj niaj estos en ĉielo!»  
Aŭdinte, Olivir' per spronoj pikas,  
Aliras al Roland' tra interpuŝo:  
«Ĉi-tien venu, diras ambaŭ, Dio  
«Permesu, ni ne mortu, se ne kune!» Aŭdu.

p. 75

### 150

1680 Ho! vidu Oliviron kaj Rolandon  
Batadi per tranĉrando de glavegoj!  
Ĉefepiskopo frapas per pikstango.  
La kvanton da mortintoj oni scias:  
Ilia nombro estas sur nomaroj;  
Sur Gesto enskribiĝis pli ol kvar mil.  
Jam kvar unuaj puŝoj bonsukcesis,  
Sed kvina terurege malprosperas!  
Mortiĝis tiam ĉiuj francaj estroj,  
Krom sesdek, kiujn Dio gardis; antaŭ  
Ol morti, ili bondefendos vivon! Aŭdu.

Sonora korno.

### 151

Rolando vidas francan defalaĵon!  
Li diras al kolego Oliviro:  
«Sinjor' amik', vin benu Dio! Vidu  
«Falintajn teren ĉiujn kuraĝulojn!  
«Ni ploru pri Francujo dolĉa, bela,  
«De nun vidvinigita je bravuloj!  
«Ho! Reĝ' amiko, se nur vi ĉeestus!  
«Ho! Frato Oliviro! Kion fari  
«Por sendi al li pri novaĵoj niaj?»  
1700 —Kaj Olivir': «Mi tion ĉi ne scias!  
«Sed mort' pli bona ol malhonoriĝo!» Aŭdu.

### 152

Rolando: «Mi tuj sonorigos kornon,  
«Ĝin aŭdos Karlo intermontiranta,  
«Kaj kun li Francoj, ja, returnen, iros!»  
—Sed Olivir': «Hontiga tio estus!  
«Kaj hont' al tuta via parencaro  
«Malhonorigus ĝin dum tuta vivo!  
«Pli frue mi konsilis vin, nenion  
«Vi faris; sed nun, mi vin ne aprobas,  
1710 «Ĉar sonorigi nun ne estus brave!  
«Rigardu viajn brakojn sangoruĝajn!»  
—Rolando: «Jes! fervore mi batalis!» Aŭdu.

p. 76

### 153

Rolando diras: «Varma batalego!  
«Mi sonorigos kornon, Karl' ĝin aŭdos!»  
—Sed Olivir': «Ne estus kuraĝaĵo!  
«Ve! kiam mi konsilis, vi ne volis!  
«Se Karl' ĉi-tie estus ĉeestinta,  
«Nun ni ne estus tiel domaĝitaj!  
«Al ili tie oni ne riproĉu!»  
«Pro mia barb', rediras Oliviro,  
1720 «Se mi fratinton, belan Aldon vidos,  
«En ŝiajn brakojn vi neniam iros!» Aŭdu.

### 154

Rolando: «Kial pri mi vi koleras?»

—Kaj Oliviro: «Vi mem estas kulpa;  
«Kuraĝo saĝa pelas malprudenton;  
«Deteno pli valoras ol kolero;  
«Pro via malsingardo Francoj mortis!  
«Neniam Karl' de ni ricevos servon!  
«Neniel vi min kredis! Reĝo estus  
«Estinta kun ni, kaj ni... elvenkintoj,  
1730 «Kaj Reĝ' Marsil' kaptita, mortigita!  
«Braveco via ĵus malhelpis al ni!  
«Vi mem ne helpos plu al Karlo glora,  
«(Plej glora kiel eble ĝis finjuĝo)  
«Francuj' malhonorigos, vi mortiĝos,  
«Tuj nia nobla amikec' finiĝos!  
«Ni estos dolorege disigitaj!»  
*Jen ili ploras unu pri l' alia! Aŭdu.*

p. 77

### 155

Ĉefepiskopo aŭdas inter ili  
Disputon; li per oraj spronoj pikas,  
Alproksimiĝas ilin por riproĉi.  
1740 «Rolando kaj vi Oliviro, mi vin  
«Petegas, tiel vi ne *ekscitiĝu!*  
«*Sed vidu Francojn nepre mortiĝontajn!*  
«Sonora korn' nin ne sendanĝerigos,  
«*Ĉar Karlo tro forestas, tro prokrastos!*  
«Pli bone tamen estas sonorigi,  
«Ĉar alveninte, Reĝ' nin venĝi povos,  
«Kaj Idolanoj ne foriros ĝoje!  
«Piedirante de ĉevaloj, Francoj  
«Nin trovos mortigitajn, disŝiritajn,  
«*Kunigos niajn brustojn, niajn kapojn,*  
«Nin mortdrapiros sur portilaj bestoj,  
«Plorados pro doloro kaj kompatato,  
1750 «Nin enterigos en preĝejajn sojlojn;...  
«Nin ne manĝados lupoj, aproj, hundoj!»  
—Roland': «Sinjor', vi estas tute prava!» *Aŭdu.*

### 156

*«Roland' amiko, sonorigu kornon,  
«Ĝin aŭdos Karlo intermontiranta,  
«Mirinda anareg' returnen iros:  
«Ĝi trovos nin mortintajn, disŝirintajn;  
«Sed Francoj povos venĝi mortigitajn  
«De Hispananoj en la batalado!  
«Forportos ili kune niajn korpojn;  
«Ne manĝos ilin hundoj, lupoj, aproj!»  
—Roland': «Jen estas, ja, parolo prava!»* *Aŭdu.*

p. 78

Franca anaro.

### 157

Rolando prenas sian Olifanton  
Al buŝo, kaj fortege sonorigas.  
Tra altaj montoj flugas sonorado;  
Je tridek mejloj oni ĝin aŭdadas.  
Ĝin aŭdas Karlo kaj anaro tuta.  
Kaj Reĝo: «Jen batalas niaj anoj!»  
—Sed Geno: «Se alia tion estus  
«Dirinta, oni kredus, li mensogis!» *Aŭdu.*

### 158

Rolando graf', dolore, malfacile  
Kaj pene sonorigas Olifanton;  
El lia buŝo ŝprucas ruĝa sango,  
Tempio ekfendiĝas, sed el korno  
Trairas sonorado malproksimen...  
Ĝin aŭdas Karlo intermontiranta,



- Naimo aŭdas, Francoj aŭskultadas;  
 —Kaj Reĝ': «Mi aŭdas vokon de Rolando!  
 «Ne sonorigus li, se ne batalus!»
- 1770 —Sed Geno: «Ne, ne estas eĉ batalo!  
 «Grandaĝa estas *vi* kaj heleblanka  
 «Kaj viaj vortoj indaj je infano!  
 «Vi konas memestimon de Rolando,  
 «*Li, forta, brava, granda kaj mirinda;*  
 «Plej strange estas, ke Di' lin toleru!  
 «Li prenis Noplon sen ordono via!  
 «Ĉar, post forir' de urbo, Sarazenoj  
 «Rolandon la bravulon ekbatalis,  
 «*Per Durendalo li mortigis ilin,*  
 «Lavigis kvazaŭ per riveroj sangon  
 «Sur tero por forigi eĉ postsignojn.
- 1780 «Nur pro leporo li sonorigadus!  
 «Kun konsilistoj eble li ŝercadas!  
 «Neniu, ja, kuraĝus lin ataki!  
 «Rajdadu, Via Reĝa Moŝto, kial  
 «Nun halti, malproksime de Francujo?» *Aŭdu.*

p. 79

### 159

- Rolando graf' kun buŝo sangadanta,  
 Tempio sur la frunto ekfendita,  
 Dolore, pene, prenas Olifanton.  
 Ĝin aŭdas Karlo, ĝin aŭskultas Francoj!  
 —Kaj Reĝo: «Tiu korno longspiradas!»
- 1790 —Naimo: «*Tie, ja, Roland'* suferas!  
 «Li bataladas ... tio certa ... jes, lin  
 «Perfidis tiu ĉi hipokritulo!...  
 «Armilojn prenu, krii kunvenvorton,  
 «Kaj helpu al nobela via gento!  
 «Vi aŭdis ja ĝemadon de Rolando!» *Aŭdu.*

### 160

- Ordonas Karlo sonorigi kornojn.  
 Malsupreniris Francoj, kaj sin armas  
 Per kaskoj kaj kiraso, oraj glavoj,  
 Kaj belaj ŝildoj, grandaj, fortaj hastoj,
- 1800 Kaj per standardoj blankaj, ruĝaj, bluaj.  
 Ekrajdas ĉiuj estroj de anaro,  
 Per spronoj pikas; dum intermontiro,  
 Diradas ĉiuj unu al l' alia:  
 «Se ni alvenos al Rolando viva  
 «Kun li mirindajn batojn ni frapados!»  
 Por kio servas?... Ili tro prokrastis!... *Aŭdu.*

p. 80

Unua puno al Geno.

### 161

- Foriĝis noktmallumo, nun tagiĝas.  
 Je suno armilaĵoj rebrilegas,  
 Kaj kaskoj kaj fervestoj ekfajriĝas,
- 1810 Kaj ankaŭ brilas flordeseĝnaj ŝildoj,  
 Kaj ankaŭ hastoj kaj standardoj oraj.  
 Imperiestro rajdas kolerege;  
 Malĝojas, korpremiĝas ĉiuj Francoj,  
 Jen ĉiuj varme, dolorege ploras!  
 Jen ĉiuj *mult*timegas pri Rolando!
- 
- Nun Reĝo ekkaptigas grafon Genon,  
 Fordonas lin al kuirejservistoj,  
 Kaj diras al Besgun' ilia estro:  
 «Vi zorge gardu tiun perfidulon,
- 1820 «Ĉar li perfidis tutan mian genton!»  
 Besgun' ekkaptas Genon, kontraŭmetas  
 Al li cent malhumanajn kuiristojn.  
 Eltiras ili barbon kaj lipharojn,

Kvarfoje ĉiu batas lin per pugno,  
Frapegas lin per vergoj kaj bastono,  
Ŝnuregon volvas ĉirkaŭ lia kolo,  
Lin ligas per katenoj kvazaŭ urson;  
Lin hontan metas sur portilan bruton.  
Lin ili gardos ĝis redon' al Karlo. *Aŭdu.*

p. 81

Reiro de Karlo.

### 162

1830 Mallumaj, longaj, altaj estas montoj!  
Profundaj valoj! fortaj akvofaloj!  
Antaŭe, malantaŭe sonoradas  
Ripetas kornoj Olifantan vokon.  
Imperiestro rajdas kolerege,  
Kun furiozaj kaj malĝojaj Francoj;  
Kaj ĉiuj senescepte ploras, ĝemas,  
Al Dio preĝas por Roland', ĝis kiam  
Alvenos ili sur batalan kampon,  
Kaj kun Rolando fierege frapos...  
1840 Por kio servas tio?... Por nenio!  
Ĉar ili ne alvenos ĝustatempe! *Aŭdu.*

### 163

*Nun Reĝo Karlo kolerege rajdas.*  
Ho! kiel blanka barbo sur kirasoj!  
Baronoj de Francuj' per spronoj pikas,  
Kaj ĉiuj malĝojegas kaj bedaŭras  
Ne esti ĉe Rolando, l' Estro, kiu  
Batalas nun hispanajn Sarazenojn!  
Se estos li vundita, ĉiuj mortos!  
Kun li nur sesdek restas! jes, sed kiaj?  
Neniam Reĝ' aŭ Estro havis tiajn! *Aŭdu.*

### 164

*Tra longaj intermontoj Karlo rajdas,  
Dolore kaj kolere premegita!  
Li diras: «Sankta Manĝo, helpu al ni!  
«Per Geno, mi en malĝojegon falis!  
«Malnova historio diras jenajn:  
«De Gen' prapatroj estis perfiduloj;  
«Je perfidaĵoj ili nur kutimis.  
«En Roma Kapitol' eĉ ili kaŭzis  
«Mortigon de Cesaro grandaĝulo!  
«Sed ili terurege estingiĝis!  
«Dolore ili mortis per fajrpuno.  
«El sang' ilia estas vere Geno.  
«Mortigis li Rolandon, mian genton,  
«De mia kapo li fortiras kronon!  
«Ne restas defendonto por Francujo!»  
Li ploras, tiras sian blankan barbon.  
«Ve! diras Francoj, malfeliĉo sur nin!»  
Spronpikas ili; dum intermontiro  
Neniu de ĉeval' retiras bridon.  
Sed antaŭ ol alvenos Francoj tien,  
Rolando estos akirinta venkon,  
Marsilon, lian genton elvenkinte. *Aŭdu.**

p. 82

Malvenkego.

### 165

Roland' sur montojn, stepojn, trarigardas  
Mortintajn Francojn! Kiom kuŝas tie!  
Pri ili grandanime li ploradas:  
«Baronoj noblaj, Dio al vi estu

«Favora, kaj en Paradizon metu  
«Animojn viajn, inter sanktajn florojn!  
«Pli bonajn ol vi, mi neniam vidis;  
«Ĉar vi utilis al mi ĉiam, ĉiel,  
«Por almiliti tiom al la Reĝo!  
1860 «Ve! Li malprave vin alprenis al si!  
«Ho, Franca Tero, dolĉa lando! Vi nun  
«*Je la plej bonaj estroj* vidviniĝas!  
«Baronoj, mi vin vidas morti por mi!  
«Ve! mi ne povas vin defendi, savi!  
«Ho! helpu al mi Dio, Li Memvero!  
«Mi restos kun vi, Oliviro, Frato!  
«Doloro (se ne malamika bato),  
«Mortigos min! Ni iru rebatali!» *Aŭdu.*

p. 83

## 166

*Roland' sur montojn, valojn, trarigardas.  
Vidinte Idolanojn tiel multajn,  
Al Oliviro noble li parolas:  
«Belfrato, ni kun Francoj devas tie  
«Mortiĝi!» Tiam Graf' Roland' paliĝas,  
Kvarfoje laŭte krias: «Je Munĝojo!»  
Per korno sonorigas: «Por atako:»  
Per spronoj forte pikas Vejlantifon.  
Li tuj ekfrapos per tranĉega glavo. *Aŭdu.**

## 167

Roland' revenas sur batalan kampon;  
1870 Per Durendalo li kuraĝe frapas.  
Distranĉas li Faldrunon de la Pujlo,  
Kaj dudek kvar plej glorajn Idolanojn.  
Neniam estos tia batalanto!  
Kiele cervoj saltas antaŭ hundoj  
Tiele Idolanoj kuras de li.  
Ĉefepiskopo diras: «Mirindaĵo!  
«Ĉi-tio estas inda je bravulo  
«Bonarmiĝinta kaj rajdanta noble!  
«Li estu en batal' fiero, forta;  
1880 «Alie, ja, nenion li valoras;  
«Fariĝu li monaĥ' en monaĥejo,  
«Pro niaj pekoj ĉiam li preĝadu!»  
—Rolando diras: «Frapu; ne indulgu!»  
Aŭdinte tion, Francoj rebatalas.  
Kristanoj multe domaĝiĝis tie! *Aŭdu.*

p. 84

## 168

Nenian savon atendante, viro  
Kuraĝe sin defendas en batalo.  
Pro tio, Francoj fieriĝas kvazaŭ  
Leonoj. Jen Marsil' je nobla ŝajno!  
1890 Li rajdas sur ĉevalo Gainuno,  
*(Ĝi estas rapidmova pli ol falko),*  
Per spronoj pikas kaj Bevunon frapas,  
*(Ĉi estas Estr' de Belno kaj Diguno).*  
Li ŝildon rompas kaj kirason ŝiras,  
*Majstrece* lin senvivan ĵetas teren;  
Ivonon, Ivorion kaj Girardon  
De Rusiluno ankaŭ li mortigas.  
Ne malproksime estas Graf' Rolando;  
Li tiam diras: «Dio vin malbenu!  
«Ĉar vi malrajte mortigadis miajn  
1900 «Amikojn, tuj per bato vi elpagos;  
«Kun mia glavo vi ekkonatiĝos!»  
Li kuraĝege ekatakas Reĝon,  
Distranĉas lian dekstran manradikon,  
Distranĉas ankaŭ kapon de la blonda  
Ĵurfalo, propra filo de Marsilo.  
Kaj Idolanoj: «Helpu al ni, Maho!  
«Ho! Dioj niaj! Venĝu nin al Karlo!  
«Li lasis ĉe ni tiajn anojn, kiuj,  
«Eĉ antaŭ morto, kampon ne fordonos!»

1910 Kaj ankaŭ diras: «He! Ni kuru for!» Jen  
Forkuras cent mil viroj... kiu povus  
Haltigi ilin?... Ili ne revenos...

p. 85

### 169

*Marsil' seniĝis je la dekstra mano.  
Li tiam teren ĵetas sian ŝildon,  
Per akraj spronoj li ĉevalon pikas,  
Forlasas bridon, kaj al Hispanujo  
Forkuras kun dudek mil Idolanoj  
Vunditaj; ili ĉiuj diras unu  
Al la alia: «Nev' de Karlo venkis!»* Aŭdu.

### 170

Por kio servas? Jes, Marsil' forkuras;  
Sed restas lia onklo, *la Kalifo*.  
Li, Estro de Kartaĝ', Alfern', Garmajo,  
Etiopujo malbenita tero,  
Kaj ankaŭ Estro de la nigra gento  
Je naz' dikega kaj orelo larĝa.  
Jes! pli ol kvindek mil el ili, tie  
1920 Rajdadas fierege, kolerege,  
Kaj krias idolanan kunvenvorton.  
—Rolando diras: «Tuj ni oferiĝos!  
«Mi scias... ni ne longe plu vivados...  
«Malben' al *kiu* vivon ne pagigos  
«Karege!... Estroj, frapu per la glavoj,  
«Defendu viajn morton, vivon, por ke  
«Ne estu honto al Francujo dolĉa.  
«Se Karlo venos sur la batalejon,  
«Se vidos li mortintajn Sarazenojn,  
1930 «Po unu el la niaj ... dek kvin ilin,  
«Imperiestro povos nin nur beni!»

Aŭdu.

p. 86

Morto de Oliviro.

### 171

Rolando vidas malbenitan genton,  
Pli nigran ol la inko, kaj montrantan  
Blankaĵon ian nur sur la dentaro.  
Li tiam diras: «Mi ja estas certa,  
«Kaj vidas mi, ke ni hodiaŭ mortos!  
«Refrapu, Francoj, mi frapegas ree!»  
—Kaj Olivir': «Malben' al prokrastantoj!»  
Jen Francoj interĵetas sin antaŭen.

Aŭdu.

### 172

1940 Je vido de malmulto da Francaro  
Hispanoj kuraĝigas sin, ĝojegas,  
Kaj diras: «Karlo estas malpravega!»  
*Kalifo* rajdas sur ĉeval' flavruĝa;  
Li pikas ĝin per siaj oraj spronoj.  
El malantaŭe, mezen de la dorso,  
Li frapas Oliviron, rompas blankan  
Kirason, kaj trans korpon puŝas haston.  
Li diras: «Por vi, jen mortiga bato!  
«Malprava Karlo lasis vin ĉi-tie;  
1950 «Li malutilis al vi, sed li pentos,  
«Ĉar mi la miajn plene venĝis al vi!»

Aŭdu.

### 173

Eksentas Olivir', ke vundo estas  
Mortiga; *li sin venĝi ne prokrastas*;  
Per hela ŝtala Haltekler', kalifon  
Li frapas sur la oran pintan kaskon;  
El ĝi dissemas *ŝtonojn* kaj kristalojn,

Distranĉas kapon ĝis la dentoj; glavon  
 Svinginte, li faligas lin senvivan,  
 Kaj diras: «Idolan' al vi malbeno!  
 «Eblege Karlo iomete perdis,  
 1960 «Sed al l' edzino, al virino ia,  
 «En via lando, vi ne fanfaronos,  
 «Ke vi al *Karlo* prenis *eĉ* moneron,  
 «Aŭ lin seniĝis je mi aŭ alia!»  
 —Kaj ankaŭ diras li: «Rolando, helpu!» *Aŭdu.*

## 174

Eksentas Olivir', ke vundo estas  
 Mortiga; li ne haltas por venĝado.  
*Per Haltekler', li forte bataladas,*  
 En la amaso li kuraĝe frapas,  
 Distranĉas bulajn ŝildojn, kaj pikstangojn,  
 Piedojn, manojn, *ŝultrojn* kaj brustkestojn.  
 1970 Lin kiu vidus Sarazenojn tranĉi,  
 Mortinton sur mortinton jeti *teren*,  
 Nur povus pensi pri kuraĝo vera!  
 Li memoriĝas pri deviz' de Karlo:  
 «Munĝojo!» krias li per forta voĉo;  
 Rolandon, fraton kaj amikon vokas:  
 «Kolego, venu pli proksimen je mi!  
 «Hodiaŭ dolorege ni disiĝos!»  
*Kaj ambaŭ ploras unu pri l' alia!* *Aŭdu.*

## 175

Roland' rigardas Oliviron, kies  
 Vizaĝ' paliĝis kaj senkoloriĝis;  
 1980 Elfluas *el la* brusto ruĝa sango  
 Falanta teren kvazaŭ per riveroj!  
 Rolando diras: «Dio! Kion fari!  
 «Amiko! Ve, pri via grandanimo!  
 «Neniam estos iu samvalora!  
 «Francujo dolĉa! Vi tuj vidviniĝos  
 «Je kuraĝuloj, kaj vi honte *falos!*  
 «Imperiestro grande domaĝiĝos!»  
 Rolando tiam svenas sur ĉevalo! *Aŭdu.*

## 176

Rolando tie svenas sur ĉevalo,  
 1990 Kaj Olivir' sangadas el la vundo  
 Mortiga, ĝis vidado konfuziĝas;  
 Proksime, malproksime, li ne povas  
 Plu eldistingi *kiun ajn* vivantan.  
 Jen, kun Rolando li ekrenkontiĝas.  
 Li frapas oran kaj juvelan kaskon,  
 Kaj ĝin distranĉas ĝis la nazŝirmilo.  
 Feliĉe, glavo ne eniras kapon.  
 Roland' je tiu bato, lin rigardas,  
 Kaj dolĉe, kvietege, al li diras:  
 2000 «Amik', ĉu vi intence faris tion?  
 «Roland' mi *estas*, kaj vin mi amegas.  
 «Vi ne elvokis min al dubatalo!»  
 —Kaj Olivir': «Mi aŭdas, sed ne vidas  
 «Vin parolantan! Dio vin rigardu!  
 «Mi frapis vin! Pardonu tion al mi!»  
 —Roland': «Negrava bato! jes, mi al vi  
 «Pardonas nun, kaj antaŭ Dio ankaŭ!»  
 Salutas ambaŭ unu la alian;  
 Kun tia amo ili sin disigas. *Aŭdu.*

## 177

2010 Eksentas Olivir' ke mort' lin premas;  
 Okuloj vidturniĝas en la kapo!  
 Li plu ne aŭdas kaj li plu ne vidas!  
 Li piediras, kaj kuŝiĝas teren,  
 Kaj laŭte petas pri pardon' de pekoj,

Manplektas al ĉiel', al Dio preĝas,  
 Por ke li donu al li Paradizon,  
 Li benu Karlon kaj Francujon dolĉan,  
 Rolandon karan al li pli ol ĉiujn...  
 Sed haltas koro, kaj kliniĝas kapo;  
 2020 Li falas teren tute sterniĝinta...  
 Jen grafo mortis!... Jen finiĝis ĉio!...  
 Rolando ploras kaj sopiras pri li!  
 Pli plendan homon vi neniam vidos! *Aŭdu.*

### 178

Rolando, *kiam li amikon vidas*  
 Senvivan, kun vizaĝ' *al Oriento,*  
*Ne povas sin deteni je plorado*  
*Kaj ĝemo;* dolĉe li sopiras pri li:  
 «Amiko, ve, pro via kuraĝeco!  
 «Ni jarojn, tagojn, kune kunvivadis!  
 «Ne malutilis unu al l' alia!  
 2030 «Vi mortis!... Mi dolore vin postvivas!»  
 Je tiuj vortoj, la markizo svenas  
 Sur la ĉeval' nomata Vejlantifo;  
 Sed oraj piedingoj lin subtenas,  
 Kaj ĉiuflanken li ne povas fali. *Aŭdu.*

### 179

Sed jen, apenaŭ li rekonsciiĝis  
 El sveno, maldolĉege li revivas,  
 Ĉar li ekvidas grandan malfeliĉon!  
 Li perdis ĉiujn Francojn, mortiĝintajn  
 Krom du: Ĉefepiskop' kaj Galtiero  
 2040 De Humo. Ĉi malsupreniris monton [7]  
 Sur kiu li Hispanojn bataladis.  
 Anaro mortis, Idolanoj venkis;  
 Li vole aŭ nevole reen venis,  
 Kaj krias al Roland': «Sinjoro nobla!  
 «Ĝentila! Kie estas vi, bravulo?  
 «Vi ĉeestante, mi neniam timis;  
 «Mi Galtier' akiris Maelguton,  
 «Mi nevo de grandaĝa blanka Druo,  
 «Mi kunhelpint' al viaj heroaĵoj,  
 «*Mi bataladis Sarazenojn tiel,*  
 2050 «Ke hasto ekrompiĝis, ankaŭ ŝildo  
 «Peciĝis kaj kiraso disŝiriĝis!  
 «Vundita *estas* mi per lancoj, mi tuj  
 «Mortiĝos, sed terure vendis vivon!»  
 Je tiu vort' Rolando lin *rekonis,*  
 Per spronoj pikas kaj galopas al li. *Aŭdu.*

p. 90

[7] Pri tiu epizodo estas parolate ĉe verso 812-a kaj post verso 1411.

### 180

Rolando diras: «*Nobla Galtiero,*  
 «*Vi bataladis idolanan genton,*  
 «*Sed ĉar vi estas brava kaj kuraĝa,*  
 «*Mil anojn el plej bonaj vi alprenis;*  
 «*Redonu ilin al mi; ili estis*  
 «*La miaj, kaj nun mi bezonas ilin!*»  
 —*Sed Galtier': «Vi plu ne vidos ilin*  
 «*Lasintajn sur terura kampo, kie*  
 «*Ni trovis tiel multajn Sarazenojn,*  
 «*Erminojn, Turkojn, Gajojn, Kanananojn,*  
 «*Kaj bravajn Balisanojn sur arabaj*  
 «*Ĉevaloj rapidmovaj rajdadantaj!*  
 «*Ni bataladis tiel, ke pri tio*  
 «*Nenia idolano fanfaronos;*  
 «*Sesdek mil mortis; ili kuŝas tere...*  
 «*Ha! ni nin venĝis per tranĉegaj glavoj!*  
 «*Sed, ve, ni perdis ĉiujn niajn Francojn!*

p. 91

«Kiraso mia disrompiĝis! Vundoj  
 «De brusto kaj de ventro ruĝan sangon  
 «Ŝprucigas el mi kvazaŭ per riveroj!  
 «Jen tuta mia korpo malfortiĝas!  
 «Mi vere sentas, ke mi tuj mortiĝos!...  
 «Mi estas via, ĉar vi estas l' Estro...  
 «Se mi forkuris, min vi ne mallaŭdu!»  
 —Rolando diras: «Tion mi ne faros!  
 «Sed al mi helpu, tiel longe kiel  
 «Vi vivas!» Li kolere ŝvitas, ĝemas,  
 Eltranĉas de si veŝtopecon; per ĝi  
 Al Galtiero li bandaĝas bruston. Aŭdu.

### 181

Rolando dolorege koleradas,  
 Kaj forte frapas en interpuŝego.  
 Hispanojn dudek kvin li mem mortigas;  
 Ses, Galtiero; kvin Ĉefepiskopo.  
 2060 Kaj Idolanoj: «Tiuj teruregaj!  
 «Ni gardu nin, ke ili elturniĝu.  
 «Al forkuranto estu honto! Honto  
 «Precipe al preterlasonta ilin!»  
 Hispanoj rekomencas kriadadi,  
 Kaj ĉiufanke ĉirkaŭstaras Francojn.  
 Al ili helpu Dio, Li Memvero! Aŭdu.

p. 92

Karlo alvojiras.

### 182

Rolando estas brava kaj fiera,  
 Kaj Galtiero Huma, nobla estro,  
 Ĉefepiskopo ankaŭ kuraĝulo.  
 Ja, ne forlasus unu la alian.  
 2070 Ĉirkaŭe, ili frapas Idolanojn.  
 Mil Sarazenoj de nun piediras,  
 Kaj kvardek mil rajdadas por batali;  
 Sed ili ne kuraĝas proksimiĝi;  
 El malproksime ĵetas lancojn, hastojn,  
 Sagegojn, hokajn sagojn, ponardegojn.  
 En la komenc' mortiĝis Galtiero,  
 Turpin' de Rejms' vundiĝis sur la kapo  
 Ĉar lia ŝildo disŝiriĝis, kasko  
 Rompiĝis kaj kiraso disfendiĝis;  
 2080 Eniĝis en la bruston kvar pikstangoj;  
 Ĉevalo lia mortas sub rajdanto.  
 Ĉefepiskopo falas! Malfeliĉe!...  
 Al ili helpu Di', Ĉielĝlorulo! Aŭdu.

### 183

Turpin' eksentas, ke li malfortiĝas  
 Pro kvar pikstangobatoj tra la brusto;  
 Li brave iom releviĝas, serĉas  
 Rolandon per rigard', al li alkuras,  
 Kaj diras nur: «Ne estas mi venkita!  
 «Bravul' fordonas vivon, sed ne glavon!»  
 Almason, sian ŝtalan glavon, tiras,  
 2090 En la amas' pli ol mil fojojn frapas.  
 Atestis Karl': «Turpin' senĉese frapis,  
 «Ĉar kuŝis ĉirkaŭ li kvarcent mortintoj;  
 «El ili estis jen vunditaj, jen dis-  
 «tranĉitaj, jen je kapo senigitaj!»  
 Ĉi-tion diras Gest', kaj ĉeestinto  
 Barono Sankta Gilo, miraklisto,  
 En Laŭna monaĥejo priskribinte.  
 Nur malklerulo tion ĉi ne scias. Aŭdu.

p. 93

### 184

Rolando graf' kuraĝe bataladas,  
2100 Ŝvitadas sur varmega tuta korpo,  
Suferas teruregan kapdoloron.  
(Tempio *krevis* dum sonorigado).  
Li volus scii ĉu alvenos Karlo;  
Reprenas Olifanton, sed malforte  
Ĝin sonorigas... Karlo, tie, haltas,  
Aŭskultas, kaj: «Sinjoroj, malfeliĉo!  
«Hodiaŭ nev' Rolando mankos al ni!  
«Laŭ sonorig', li ne longtempe vivos!  
«Al li ni rapidrajdu sur ĉevaloj;  
2110 «Nun, ĉiuj kornoj de anar' sonoru!»  
Sesdek mil kornojn ili sonorigas;  
Tiele, ke ripetatas montoj, valoj...  
Ekaŭdas Idolanoj, kaj malĝojas,  
Kaj diras: «Reĝo Karlo nun alvenas!» *Aŭdu.*

### 185

Kaj ankaŭ: «Jen Imperiestr' reiras!  
«Ĉar aŭdas ni sonorajn francajn kornojn.  
«Se Karl' alvenos, ni la venkon perdos,  
«Kaj se Roland' postvivos, la milito  
«Rekomenciĝos! Ve, por Hispanlando!»  
2120 Kuniĝas kvarcent armiĝintaj viroj  
El la anaro plej bonegaj; ili  
Rolandon ekatakas terurege.  
Ho! *kiom* grafo devas klopodadi! *Aŭdu.*

p. 94

### 186

Ilian alproksimiĝadon vidas  
Roland'; li fieriĝas, kuraĝiĝas;  
Li preta por ĝis morto *kontraŭstari*;  
*Ĉar mort' pli bona estas ol forkuro.*  
Li rajdas sur ĉevalo Vejlantifo,  
Li pikas ĝin per siaj oraj spronoj,  
Kaj meze de anaro batalegas.  
2130 Turpin' ĉefepiskopo kun li iras;  
—Kaj Sarazenoj: «Kuru for, *amikoj*,  
«De franca gent' ni aŭdis sonorkornojn!  
«Potenca Reĝo Karlo ree venas!» *Aŭdu.*

### 187

Rolando graf' ne ŝatas malbravulojn,  
Nek malbonulojn, nek *fanfaronulojn*,  
Malŝatas ankaŭ estrojn ne fidelajn.  
Li diras al Turpin' ĉefepiskopo:  
«Sinjor' mi rajdas kaj vi piediras!  
«Pro amo al vi, mi piedestaras;  
2140 «Ni, kune prenos bonon kaj malbonon;  
«Por kiu ajn, ja, mi vin ne forlasos!  
«Ni ambaŭ reataku Idolanojn;  
«Plej bonajn batojn frapas Durendalo!»  
Ĉefepiskopo: «Jen batala veto!  
«*Ci-tio estos por ni, certe, lasta!*  
«Ĉar Karlo venas, li nin plene venĝos!» *Aŭdu.*

p. 95

### 188

Nun Idolanoj diras: «Ni naskiĝis  
«Por malfeliĉo! Ve! En tiu tago  
«Malĝoja, ni Sinjorojn, Estrojn perdis!  
«Jen glora Karlo venas kun anaro!  
2150 «Ni aŭdas sonorantajn francajn kornojn,  
«Kaj grandan krian bruon de «Munĝojo»!  
«Rolandon, pli ol kiu ajn fieran  
«Neniu povas venki; ni frapadu  
«El malproksime, kaj lin lasu tere!»  
Alĵetas ili hastojn, ponardegojn,  
Pikstangojn, lancojn kaj barbulajn sagojn;  
Pecigas, fendas ŝildon de Rolando,



Disrompas, *senornamas* la kirason  
Ne povas ili vundi lian korpon;  
2160 Sed Vejlantif' ricevis tridek vundojn,  
Kaj ĝi sub grafo *falas* mortigita!..  
Forkuras Idolanoj kaj forlasas  
Rolandon solan kaj piedirantan! *Aŭdu.*

### 189

*Forkuras tremegantaj Idolanoj,  
Kaj al si diras: «Nin Rolando venkis!  
«Imperiestro iras malantaŭen!  
«De franca gento aŭdu sonorkornojn!  
«Ĉar venas Karlo, li alportas morton!  
«Li venkis tiom da potencaj Reĝoj!  
«Marsil' ne povos certe nin defendi,  
«Ni perdos gloran Hispanujon, se ne  
«Emir' mem venos ĝin defendi por ni!»* *Aŭdu.*

p. 96

Lasta beno de Ĉefepiskopo.

### 190

Forkuras Idolanoj kun kolero,  
Kaj rapidiras al Hispanolando.  
Rolando graf' ne persekutas ilin,  
Ĉar li ĉevalon Vejlantifon perdis,  
Kaj vole aŭ nevole piediras.  
Li helpas al Turpin' Ĉefepiskopo.  
2170 Sur lia kap' deligas oran kaskon,  
Detiras blankan subkirason, ŝiras  
Ĉemizon por *bandaĝi* larĝajn vundojn;  
Kaj tiam ame li lin ĉirkaŭprenas,  
Lin dolĉe sternas sur la verdan herbon,  
Kaj, kortuŝite, diras al li jenajn:  
«Nobela! Donu al mi forpermeson;  
«Kolegoj, kiujn ni tre amis, estas  
«Mortintaj! Ni ne lasu ilin tie!  
«Mi volus serĉi kaj rekoni ilin,  
2180 «Kaj meti ilin antaŭ vin, laŭ vico!»  
Ĉefepiskopo: «Iru kaj revenu!  
«Pro Dio! kampo estas via... mia!» *Aŭdu.*

### 191

Roland' trairas sola batalejon,  
Li serĉas jen sur valo, jen sur monto;  
*Li trovas Ivorion kaj Ivonon,*  
Gerinon kaj amikon Gerieron,  
*Engelieron grafon de Gaskujo.*  
Otunon ankaŭ, kaj Berengieron,  
Ansejson ankaŭ kune kun Sansun', kaj  
Girard' la grandaĝul' de Rusiluno.  
2190 Ĉi-tiujn dek baronojn li forportas,  
Returnen iras al ĉefepiskopo;  
Kaj antaŭ li, laŭ vico, sternas ilin!  
Ĉefepiskopo sin deteni plori  
Ne povas, levas manon por benadi,  
Kaj diras: «Malfeliĉaj Estroj! Viajn  
«Animojn Glora Dio benu, ilin  
«Ricevu en ĉielajn sanktajn florojn!  
«Min malĝojigas propra morto, ĉar mi  
«Imperiestron grandan plu ne vidos!» *Aŭdu.*

p. 97

### 192

2200 Roland' returnen iras en la kampon  
*Jen, apud roz' sovaĝa, sub abio,*  
Amikon Oliviron li retrovas,  
Kaj tiam ame li lin ĉirkaŭprenas.  
Laŭ povo, li revenas, kaj l' amikon

Sur ŝildon metas apud la aliaj.  
Ĉefepiskopo benas, senpekigas!  
Ho ve! la larmoj! Ho ve! la korŝiro!  
Rolando diras: «Olivir'! Karulo!  
«Vi filo de *bonega graŝ* Reniro,  
«Limlandoestro *ĝis river' de Ĝenno!*  
2210 «Por rompi lancon kaj pecigi ŝildon,  
«*Por trapenetri, ŝiri feraĵn vestojn,*  
«Por prave konsiliĝi kun bonuloj,  
«Por venki, neniigi perfidulojn,  
«Neniu estis, ja, pli taŭga ol vi!» *Aŭdu.*

### 193

Rolando Graf' vidinte ĉiujn estrojn  
Mortintajn, ankaŭ karan Oliviron,  
En koro ekpremiĝas kaj ekploras,  
Senkoloriĝas; tia estas lia  
Doloro, ke li plu ne povas stari,  
2220 Kaj vole aŭ nevole svenefalas!  
—Ĉefepiskop': «Barono malfeliĉa!» *Aŭdu.*

### 194

Ĉefepiskop' vidinte lian svenon,  
Ŝiriĝas tiel kiel iam eble!  
Etendas manon, prenas Olifanton.  
El Rencesvala rivereto akvon  
Li volas ĉerpi, por ke l' grafo trinku.  
*Penege li sin levas*, per paŝetoj  
Ŝanceliĝante li sin ŝovas tien...  
Sed li malforte tiel... li ne povas  
Antaŭeniri... li tro perdis sangon!...  
2230 Ve! antaŭ ol li faros tridek paŝojn,  
La koro haltas!... li antaŭen falas!...  
Ve! Jen maldolĉegaĵoj de la morto!... *Aŭdu.*

### 195

Rolando Graf' rekonsciiĝas tiam;  
Li sin levetas!... Ho, doloro tranĉa!  
Antaŭen, malantaŭen li rigardas,  
Trans la amikojn sur la verda herbo...  
Li vidas tere noblan la baronon,  
Ĉefepiskopon, Dian rajtigiton!  
Ĉi-tiu sin kulpigas, suprenlevas  
2240 Okulojn, kaj manplektas al ĉielo;  
Li preĝas: «Dio donu Paradizon!»...  
Turpino mortis *por la serv'* al Karlo;  
Per glavfrapegoj, belaj predikadoj,  
Li ĉiam bataladis Idolanojn!  
Al li redonu Dio sanktan benon! *Aŭdu.*

### 196

*Roland' vidinte, ke li mortis, se ne  
Pro Olivir' neniam pli sopiris!  
Li tiam diras korŝirantan vorton:  
«Ho! Karlo de Francujo! kiel eble  
«Rajdadu plej rapide! Ĉar el niaj  
«En Rencesval' fariĝis granda perdo!  
«Sed Reĝ' Marsilo perdis siajn anojn...  
«Po unu el ni, ili mortis kvardek...»* *Aŭdu.*

### 197

Roland' Ĉefepiskopon vidas tere!  
Sur lia ventr' intestoj malvolviĝas,  
Cerbaĵo moviĝetas sur la frunto!  
Roland' sur bruston, meze inter ŝultroj,  
2250 Plektigas la du blankajn, belajn *manojn*,  
Kaj, laŭ kutimo de la land', ekplendas:  
«Nobela Estro! Nun mi vin fordonas

«En manojn de Glorulo de Ĉielo!  
«Neniu pli fervore servis al Li,  
«*Neniam*, de la apostolaj tempoj,  
«Profeto tia leĝon gardis, homojn  
«Konvertis! Kvietiĝu la animo  
«Fluganta tra la Paradizajn pordojn!» *Aŭdu.*

## Morto de Rolando.

### 198

Ĉeestas morto! Ĝin Rolando sentas!  
2260 Elfluas la cerbaĵo tra oreloj!  
Por samgentuloj li alpreĝas Dion  
Kaj por si mem Anĝelon Gabrielon.  
Li prenas Olifanton (ne riproĉu)  
Kaj ankaŭ tenas glavon Durendalon.  
Pli longe ol forĵeto per pafarko,  
Sur fremda kampo li antaŭenkuras;  
Monteton li suriras; sub du arboj  
Belkreskaj kuŝas kvar marmoraj ŝtonoj;  
Sur verdan herbon li renverse falas;  
Li svenas *tie*, ĉar alvenas morto! *Aŭdu.*

p. 100

### 199

Montaro estas alta, arboj altaj;  
Ĉi-tie brilas kvar marmoraj ŝtonoj;  
Sur verda herbo Graf' Rolando svenas.  
Lin tamen observadas Sarazeno  
Mortŝajniĝanta tere inter ĉiuj,  
Vizaĝ' kaj korpo sangomakulataj.  
Ĉi-tiu ekleviĝas kaj alkuras.  
Li estas bela, forta kaj tre brava,  
Fiera, kaj mortige furioza.  
2280 Armaĵon, korpon de Roland' li prenas,  
Kaj krias: «Jen venkita nev' de Karlo;  
«Jen glavo, mi ĝin portos Arabujon!»  
*Li prenas ĝin kaj tiras lian barbon.*  
Tirite tiel, Graf' rekonsciiĝas. *Aŭdu.*

### 200

Rolando Grafo sentas ŝtelan movon;  
Okulojn li malfermas kaj nur diras:  
«Mi scias... vi ne estas el la niaj!»  
Per Olifanto, ĉiam prigardata,  
Li frapas sur juvelan oran kaskon,  
Li rompas ŝtalon, kapon, ankaŭ ostojn  
2290 El kap' la du okulojn elsaltigas,  
Faligas mortigiton sur la teron,  
Kaj: «Senkorulo! kiel vi kuraĝis  
«Min, prave aŭ malprave, ekataki?  
«Pri tio ĉiuj juĝos vin malsaĝa;  
«Fendita estas Olifantrandaĵo,  
«Belŝtonoj kaj oraĵoj falis el ĝi?» *Aŭdu.*

p. 101

### 201

Eksentas nun Roland', ke mort' lin premas!  
Li staras sur piedoj, kaj plej eble  
Penadas; (Ve! vizaĝ' senkoloriĝis;).  
Li elingigas glavon Durendalon,  
2300 Starantan antaŭ li ŝtonegon *brunan*  
Dekfoje frapas kun kolero tranĉa;  
Tuj ŝtalo sonas, forta, ne rompita.  
Li diras: «Sankta Manjo, helpu al mi!  
«Vi, Durendalo mia! Malfeliĉo!  
«Foriras mi! Ve! kio vi fariĝos!  
«Per vi, mi, tiom batalinte venkis,  
«Akiris tiom da reĝlandoj vastaj,

- «Regataj nun de blankabarba Karlo,  
«Vin ne heredoprenu forkuranto!  
«*Neniu de mi viva vin forprenos!*  
2310 «Mi brave vin portadis; similulo  
«Libera en Francujo plu ne vivos!» *Aŭdu.*

## 202

- Rolando frapas *Sardanian* ŝtonon;  
Tuj ŝtalo sonas, forta, ne rompita.  
Vidinte glavon ne rompeblan, Grafo  
En propra koro pri ĝi ekkompatas:  
«Ho Durendalo! kiel hela, blanka!  
«Ho! kiel vi je sun' flamiĝas, *brilas!*  
«En Moriana valo estis Karlo;  
«Anĝel' de Dio de Ĉiel' ordonas,  
2320 «Ke li vin donu al kuraĝa grafo;  
«Kaj nobla, glora Reĝ' vin donis al mi,  
«Per vi, mi venkis *Anĝon*, Britanujon,  
«Per vi mi venkis Pejton kaj Mainon,  
«Kaj per vi, la liberan Normandujon,  
«Per vi, Provencon kaj Akitanujon,  
«Lombardon, ankaŭ tutan Romanujon,  
«Per vi, Flandrujon tutan, Bajerlandon,  
«Kaj *Bugerion*, kaj Polujon tutan,  
«Kostentinnoblon submetiĝan al li,  
2330 «Saksujon sklavan laŭ bontrovo lia,  
«Per vi, Eskujon, Galon kaj Irlandon,  
«Anglujon, kie estas lia hejmo;  
«Kaj kiom da prenitaj landoj, teroj,  
«De mi al Karl' blankhara akiritaj!  
«Pri tiu glavo mi dolore ĝemas!  
«Mi mortu, ĝi ne restu al fremdulo!  
«De tia hont' Francujon Dio gardu!» *Aŭdu.*

## 203

- Rolando frapas dubebrunan ŝtonon;  
Pli ol mi povus diri, ĝin disrompas;  
2340 Tuj glavo sonas forta, ne rompebla,  
El ŝton', aeron tranĉas al ĉielo.  
Vidinte Grafo, ke li ĝin ne rompos,  
Dolĉege, kore, pri ĝi li plendadas:  
«Ho, Durendalo! tiel bela, sankta!  
«En bulo kuŝas sanktrestaĵoj: dento  
«De Sankta Petro, sang' de Sankta Baĉjo,  
«Harar' de Lia Moŝto San Denizo,  
«Peceto de vestaĵ' de Sankta Manjo;  
«Malrajte vin posedus Idolanoj!  
2350 «Ĉar nur Kristano estas inda je vi!  
«*Per vi mi finis tiom da bataloj!*  
«Per vi mi prenis tiom da vastlandoj  
«Tenataj nun de florbarbulo Karlo,  
«Per kiuj l' Estro estas forta, riĉa!  
«Neniam tenu vin malkuraĝulo!  
«*De tia hont' Francujon Dio gardu!*» *Aŭdu.*

## 204

- Rolando sentas, ke alestas morto;  
*De l' kapo en la koron ĝi penetras!*  
Li kuras, sub abion li sin ĵetas;  
Sur verdan herbon li sin ventresternas,  
Sub sin li metas Olifanton, glavon.  
2360 Vizaĝon turnas al la fremda gento.  
Li faris tion, ĉar li volas vere  
Sciigi al Francaro kaj al Karlo,  
Ke li, kuraĝa grafo, mortis brave.  
Pri siaj kulpoj li repetas Dion,  
Pri pekoj al ĉiel' li montras ganton...  
*Anĝeloj venas al renkonto de li.* *Aŭdu.*

## 205

Rolando sentas, ke finiĝas vivo;  
 Li *kuŝas* sur altaĵ' al Hispanujo,  
 Kaj per la mano frapas al si bruston:  
 «El mia kulpo, Dio, Potenculo!  
 2370 «Pri miaj grandaj kaj malgrandaj pekoj!  
 «Pri ĉiuj, kiuj estas de naskiĝo  
 «Ĝis tiu tago de mortiĝo mia!»  
 Al Dio li prezentas dekstran ganton...  
 Anĝeloj de ĉiel', malsupreniris. *Aŭdu.*

p. 104

## 206

Rolando Grafo kuŝas sub abio,  
 Al Hispanujo li direktis frunton.  
 Li ekmemoras pri la pasintaĵoj,  
 Pri ĉiuj landoj, *kiujn* li akiris,  
 Pri parencaro, pri Francujo dolĉa,  
 2380 Pri Karlo, Reĝo kiu zorgis pri li,  
*Pri Francoj, al li tiel sindonemaj!*  
 Deteni larmojn, ĝemojn, li ne povas;  
 Sed sin mem li ne volas pli forgesi,  
 Kulpigas sin, de Di' pardonon petas:  
 «Ho! Vera Patr'! Neniam mensoginta!  
 «Per kiu San Lazaro reviviĝis,  
 «Kaj Daniel' saviĝis el leonoj,  
 «Animon mian savu el danĝeroj  
 «Pro pekoj, kiujn mi dum vivo faris!»  
 Al Dio li prezentas dekstran ganton...  
 2390 Ĝin prenas de li Sankta Gabrielo.  
 Kliniĝas lia kapo sur la brakon,  
 Manplekte, li foriris al finiĝo!...  
*Aŭsendas* Dio unu el keruboj,  
 Kaj sanktajn *Rafaelon*, Gabrielon,  
 Kaj Miĉjon de l' danĝer' sur maro. Grafan  
 Animon ili portas Paradizen. *Aŭdu.*

p. 105

## REVENĜOJ

Reveno de Karlo.

## 207

Rolando mortis... Di' animon lian  
 Ricevis.—Karl' en Rencesvalon venas.  
 Sur ĉiuj vojoj kaj vojetoj, spacoj  
 2400 De kamp', plataĵoj plej malvastaj, kuŝas  
 Korpaĵ' de Franco aŭ de Idolano.  
 Ekkrias Karlo: «Nev'! Vi kie estas!  
 «Kaj kie Olivir'! Ĉefepiskopo!  
 «Gerino! kaj l' amiko Geriero!  
 «Otuno! kaj Berengiero grafo!  
 «Ivono, Ivorio tiel karaj!  
 «Engeliero, estro de Gaskujo!  
 «Sansuno duko! kaj Ansejs' *fiera!*  
 «Girard' la grandaĝul' de Rusiluno!  
 2410 «Kaj dek du konsilistoj postgvardie  
 «Lasitaj!»—Sed por kio?—Ĉar neniu  
 Respondos!—Reĝo diras: «Ho! dolore  
 «Premiĝas mi, ĉar mi ne ekbatalis!»  
 Li kolerege tiras sian barbon;  
 Li, ankaŭ ĉiuj *bravaj* estroj ploras!  
 Dudek mil viroj svenas, falas teren!  
 Pri ili Duk' Naim' komplete plendas! *Aŭdu.*

p. 106

## 208

- En Rencesvalo ĉiuj malĝojegas!*  
 Jes, ĉiuj kavaliroj kaj baronoj  
 Pri ili kompatadas, kaj varmege
- 2420 Ploradas nun pri filoj, fratoj, nevoj,  
 Amikoj aŭ subulaj noblaj estroj!  
 Jes, grandanombro svenas, falas teren!  
 Sed Duk' Naimo, noble ekparolas;  
 L' unua, diras: «Via Reĝa Moŝto,  
 «*Rigardu* tien, je du mejloj de ni,  
 «Ĉu vi polvaĝojn vidas sur la vojoj?  
 «Ĉi-tio estas idolana gento!  
 Ekrajdu, kaj doloron tian venĝu!»  
 —Tuj Karl': «Jam ili estas malproksime!
- 2430 «Ni *iru* pro honor' kaj *rajto*! Ili  
 «Forprenis floron de Francujo dolĉa!»  
 —Parolas Reĝ' al Gebuino, Oto,  
 Tedbaldo Rejmisa kaj Miluno Grafo:  
 «Vi gardu kampon, valojn, montojn; lasu  
 «Mortintojn tie, kie ili kuŝas;  
 «Por ke ne venu besto aŭ leono,  
 «Ne venu ĉevalisto aŭ servisto,  
 «Aŭ kiu ajn; pri tio bone zorgu  
 «Ĝis ni revenos per favor' de Dio!»
- 2440 Nun kvar baronoj dolĉe, ame diras:  
 «Al Via Reĝa Moŝto ni obeos.»  
 Mil kavalirojn ili prenas kun si. *Aŭdu.*

Miraklo.

## 209

- Ordonas Reĝo sonorigi kornojn;  
 Li noble rajdas antaŭ anarego,  
 Hispanajn *postmarŝantojn* ili *trovas*,  
 Kaj fervorege persekutas ilin. p. 107  
 Ekvidas Reĝ', ke baldaŭ vesperiĝos.  
 Li piediras sur herbejo verda,  
 Li genufleksas kaj petegas Dion,  
 2450 Ke por li Li ordonu—Suno *haltu*,  
 Kaj nokto malfruiĝu, tago daŭru—  
 Jen tuj Anĝelo al kutimiĝinta  
 Paroli kun la Reĝo diras jenajn:  
 «Rajdadu, Karlo, lumo ne malestos;  
 «Vi perdis floron de Francujo, Dio  
 «Ĉi-tion scias, vin vi povas venĝi  
 «Al krima gento!.. Tiam Reĝ' ekrajdas. *Aŭdu.*

## 210

- Por Karlo, Dio faras mirindaĵon;  
 Haltigas sunon en ĉiel'. Fremduloj  
 2460 Forkuras. Francoj persekutas ilin,  
 Atingas ilin en Tenebra-Valo,  
 Ĝis Saragus' kun battoj persekutas,  
 Terure frapas kaj mortigas ilin,  
 Sur ĉiuj vojoj ilin haltiginte.  
 Rivero Sebr' irejon kontraŭbaras;  
 Profunda akvo kaj terura fluo!  
 Malestas ŝipo, barko, transirilo.  
 Fremduloj preĝas *Mahon*, kaj Tervagon,  
 Kaj *Apolonon por al ili helpi*.  
 En Sebron ili ĵetas sin, sed savon  
 2470 Ne trovos. Pro armaĵ' tro multepeza  
 Profunde subakviĝas grandanombro;  
 Aliaj pene naĝas laŭ fluego;  
 La plej feliĉaj maldolĉege trinkas;  
 Sed, fine, ĉiuj dronas terurege...  
 Jen Francoj: «*Vidu* venĝon de Rolando!» *Aŭdu.* p. 108

Bivako.

211

Ĉar vidis Karlo ĉiujn Idolanojn  
Aŭ mortigitajn aŭ dronintajn, (grandan  
Akiron prenis liaj kavaliroj),  
Li noble piediras de ĉevalo,  
2480 Li genufleksas, kaj al Dio dankas...  
Kuŝiĝis suno, kiam li stariĝas...  
Li diras: «Ni pasigu nokton ie,  
Ĉar tro malfrue estas por reveni  
«Al Rencesvalo, de ĉevaloj lacaj  
«Formetu selojn, bridojn, lasu ilin  
«Sensoifigi sin en la herbejoj.»  
—Kaj Francoj: «Prava estas Via Moŝto!» *Aŭdu.*

212

Imperiestro haltas tie; Francoj  
Okupas *inter Sebro kaj Valterno*,  
2490 Kaj formatinte selojn de ĉevaloj,  
Forprenas de la kapoj orajn bridojn,  
Kaj lasas bestojn sur herbejo verda.  
Ne povas fari pli ol tion Francoj  
Senfortaj; ili sur la ter' ekdormas...  
Dum tiu nokto, oni ne gvardias. *Aŭdu.*

213

La Reĝo nun kuŝiĝas sur herbejon,  
Lancegon metas apud sian kapon.  
Ĉar li ne volas dormi ne armita,  
Li sin vestigas per kiraso blanka,  
2500 Sur kapo ligas oran kaskon, zonas  
Nekompareblan glavon «Ĝojulinon»,  
(Gi tridekfoje diverskoloriĝas  
Dum taĝo)—Vi ja *aŭdis* pri la lanco  
Trapenetranta jam sur kruco Nian-  
Sinjoron; dank' al Dio, Karl' posedas  
Feraĵon ĝian, kiun li enmetis  
En glavprenilon. Pro honor' kaj eco,  
Li donis al ĝi nomon «Ĝojulino».  
Baronoj francaj tion ne forgesus;  
2510 De ĝia nom' «Munĝojo» venis krio.  
Pro tio, ja, neniu ilin venkos. *Aŭdu.*

p. 109

Lastaj sonĝoj de Karlo.

214

La nokto estas hela, luno lumas...  
Kuŝiĝis Karlo; li dolore pensas  
Pri Oliviro, pri Rolando kaj pri  
La dek du konsilistoj, ĉiuj Francoj  
En Rencesval' mortintaj, sangverŝintaj!  
Ve! Li ne povas sin deteni plori!  
Li petas Dion, Li animojn savu.  
Sed laca Reĝo multsuferas, fine,  
2520 Dolore premegita li ekdormas.  
Dormadas ĉie Francoj sur herbejoj;  
Ne eĉ ĉeval' kapablas stari; kaj ĝi  
Por manĝi herbon, restas kuŝiĝinta!  
Spertulo granda kiu korŝiriĝis! *Aŭdu.*

p. 110

215

Dormadas Karl', dolore premegita;  
Alsendas Dio Sanktan Gabrielon

- Komisiitan pri *la zorg'* de Karlo;  
 Anĝel' pasigas nokton apud Reĝo,  
 Per sonĝo lin sciigas, ke al Francoj  
 2530 Batal' terura ekfariĝos; al li  
 Gravegan sencon de vidaĵ' klarigas.  
 Okulojn al ĉiel' suprenlevinte,  
 Ekvidas Karlo tondrojn, frostojn, ventojn,  
 Kaj fulmotondrojn, renversegojn, fajrojn,  
 Kaj flamojn pretigitajn.—Jen, subite  
 Sur francan genton ĉio defaladas!  
 Jen ekbruliĝas pom-fraksenaj lancoj,  
 Jen ekflamiĝas la orbulaj ŝildoj,  
 Rompiĝas stangoj de tranĉegaj hastoj,  
 2540 Grincadas ŝtalaj kaskoj kaj kiraso!  
 Al Francoj kiom da dolor'! Jen kuras,  
 Por ilin ŝiri, ursoj, leopardoj,  
 Serpentoj, kaj drakonoj, kaj diablaj  
 Estaĵoj, kaj pli ol tridek mil hundoj...  
 Jen ili ĉiuj ĵetas sin sur Francojn...  
 Jen Francoj krias: «Karlo, Karlo, helpu!»  
 Dolore kaj komplate, Reĝo volus  
 Alkuri tien, sed jen kontraŭaĵo:  
 Al li el la arbar' leono kuras;  
 2550 Grandega kaj fiere terurega,  
 Kruela besto Reĝon mem atakas,  
 Kaj *ambaŭ* bataladas brust' ĉe brusto!  
 Sed li ne scias, kiu falos, kiu  
 Faligos!.. Tamen Reĝo ne vekigiĝas. *Aŭdu.*

## 216

- Post tiu sonĝo, Karl' denove sonĝas.  
 Li, en Francuj', en Ajkso, sur perono,  
 Duoble katenitan urson tenas.  
 Jen venas el Ardeno ankaŭ tridek  
 Aliaj, parolantaj kiel homoj,  
 2560 Dirante: «Reĝo, ĝin redonu al ni;  
 «Malrajte estas, ke vi ĝin retenu;  
 «Ni devas helpi al parenco nia!»  
 El la palaco *kuras nobla hundo*;  
 Plej grandan el la bestoj ĝi atakas  
 Sur verda herbo, apud kunestantoj.  
 Ĉeestas Reĝ' al stranga batiĝado;  
 Sed li ne scias, kiu falos, kiu  
 Faligos!... ĉion-ĉi l' Anĝelo montras.  
 Dormadas Karlo ĝis morgaŭa fruo. *Aŭdu.*

## Marsilo en Saraguso.

## 217

- 2570 Marsil' kurante venas Saraguson,  
 Sub ombr' de olivujo piediras;  
 Li sin senigas je kiraso, glavo,  
 Kaj kasko, kun dolor' sur verdan herbon  
 Sin kuŝas; el tranĉita dekstra mano  
 Defluas sango; li malĝojas... svenas...  
 Jen, apud li, edzino Bramimundo  
 Plore gas, krias, korŝirite plendas;  
 Pli ol tridek mil viroj, kun ŝi, tie  
 Malbenas Karlon kaj Francujon dolĉan,  
 2580 Aliras al la niĉ' de Apolona  
 Statuo, kaj per plendoj bruegas:  
 «Malbona Dio! Kial vi alportis  
 «Malgloron? Kial vi forlasis reĝon?  
 «Ĉu kompensaĵ' al viaj fideluloj?»  
 Forprenas de statuo sceptron, kronon,  
 Pendigas ĝin je manoj *al* kolono,  
 Renverse ĝin turnigas sub piedojn,  
 Ĝin frapas per bastonoj kaj pecigas.  
 Forprenas de Tervago karbunkolon,  
 2590 Kaj Mahon ĵetas ili en fosaĵon.



Ĝin mordas surpaŝantaj aproj, hundoj!  
*Neniam Dioj tiel malŝatiĝis! Aŭdu.*

## 218

Marsil' de sveno nun rekonsciiĝas.  
Lin oni portas en arkaĵan ĉambron,  
(Skrib-desegnaĵoj kuŝas sur la muroj).  
Reĝino Bramimundo ploregadas,  
Kapharojn siajn tiras, kaj plendegas,  
Kaj laŭte ekparolas vortojn jenajn:  
«Ho, Saraguso! Vi ja nun seniĝis  
«Je nobla Reĝo, kiu vin posedis!  
2600 «Ho! Niaj Dioj estas perfiduloj!  
«Ĉar ili en batalo nin forlasis!  
«Emiro restas al ni! Ĉu kuraĝos  
«Li bataladi kontraŭ brava gento,  
«Kuraĝa, ne timante eĉ la morton?  
«Imperiestro ĝia, florbarbulo,  
«Multnobla estas, eĉ bravega; li ja  
«Neniam ekforkuros el batalo!  
«Domaĝe, ke ne iu lin mortigu!» *Aŭdu.*

p. 113

Alveno de Emiro Baliganzo.

## 219

Imperiestro forte kaj potence  
2610 En Hispanujo restis dum sep jaroj.  
Li prenis tie urbojn kaj kastelojn.  
Marsilo Reĝ' malkvietiĝis pro li.  
Unuan jaron, Reĝ' por help' petskribis  
Al Reĝ' de Babiluno, Baliganzo,  
(Emiro grandaĝulo, longvivinta,  
Pli ol Homero, pli ol Virgilio),  
Li venu Saraguson, helpu al li,  
Se ne... Marsil' forlasos siajn Diojn,  
Kaj ĉiujn adoratajn Idolaĵojn,  
2620 Kristan' fariĝos, interkonsentiĝos  
Kun Reĝo Karlo.—Pro malproksimiĝo,  
Ĝis nun malestas Baliganzo; tamen  
El kvardek landoj li kundungis anojn,  
Pretigis grandan marveturilaron,  
Boatojn, barkojn, ŝipojn kaj ŝipetojn;  
Al marhaven' Aleksandrio, fine,  
Li kunvenigis tutan la ŝiparon.  
En Majo, (proksimiĝas la somero),  
Li marforveturigas anaregon. *Aŭdu.*

## 220

2630 Sennombra estas fremda anarego.  
Rapide, ŝiparmeoj sin direktas,  
Fornaĝas; sur la mastoj, sur la altaj  
Velstangoj, multaj lampoj, fokusvitroj,  
El supre ĉirkaŭĵetas lumon tian,  
Ke tra la nokto plibeliĝas maro.  
Ŝipar' alproksimiĝas Hispanujon,  
Rebrilas kaj lumiĝas tuta lando.  
Pri tio al Marsil' sciigo flugas:  
«*En Hispanujon venis Baliganzo;*  
«*Armeon li kondukas el plej belaj,*  
«*Kaj dek sep reĝoj kun li ĝin komandas!*»  
*Ho, vera Patro! Dio! Gardu Karlon*  
*En bataleg' dolora, terurega! Aŭdu.*

p. 114

## 221

Ne haltas tie idolana gento;  
2640 De l' maro ĝi eniras sur riveroj;  
Marbrison kaj Marbruson ĝi transiras;

Sur Sebro kontraŭflue naĝas tuta  
Ŝiparo; *sur la mastoj, sur la longaj*  
*Velstangoj*, multaj lampoj, fokusvitroj  
Brilege lumigadas tra la nokto.  
Ĉi-tagon ĝi eniras Saraguson. *Aŭdu.*

## 222

La tago estas hela; suno brilas.  
Emir' eliras el la ŝipo; marŝas  
Espaneliz' ĉe lia dekstra flanko,  
Kaj dek sep Reĝoj sekvas ilin, Grafojn  
2650 Kaj Dukojn kiu povas kunkalkuli?  
Sub ombro de laŭrarbo, je l' kampmezo,  
Sur verdan herbon oni metas blankan  
Tapiŝon kaj elefantostan seĝon.  
Sur ĝin sidiĝas fremda Baliganzo.  
Ĉirkaŭe, *ĉiuj* Idolanoj staras.  
Unue, Baliganzo ekparolas:  
«Aŭskultu, bravaj, noblaj kavaliroj;  
«Imperiestro Karlo, Estr' de Francoj  
«Nutraĵon manĝos nur se mi permesos!  
2660 «En Hispanujo li min tro militis;  
«Mi *volas* iri ĝis Francujo dolĉa  
«Por lin batali. Mi neniam haltos,  
«Se ne li mortis aŭ obeis!»—Sian  
Genuon frapas li per dekstra ganto. *Aŭdu.*

p. 115

## Senditoj de Baliganzo.

## 223

Ĉar li ĉi-tion diris, li obstinas.  
Ol ĉiujn riĉegaĵojn sub ĉiel', li  
Preferas iri Ajkson, kie Karlo  
Regadas. *Gent'* lin laŭdas kaj aprobas.  
Nun, li alvokas du el kavaliroj;  
2670 Ĉi, fratoj, Klarifan' kaj Klariano:  
«Vi estas filoj de Maltraĵo Reĝo;  
«Volonte, ofte, sendojn li plenumis.  
«Mi volas, ke vi iru Saraguson;  
«Vi al Marsil', je mia nomo, diru:  
«Mi venis helpi al li kontraŭ Francoj.  
«Ho! Se mi trovos ilin, batalego  
«Fariĝos! Prenu l' orbroditan ganton,  
«Vestigu per ĝi lian dekstran manon.  
«Forportu ankaŭ tiun *orbastonon*.  
2680 «Saluton lian ricevinte, mi tuj  
«Francujon iros por ataki Karlon.  
«Se Karl' rifuzos submetiĝi al mi,  
«Kaj malkonfesi la kristanan leĝon,  
«El lia kapo mi fortiros kronon!»  
—Kaj ili: «Prava estas via Moŝto!» *Aŭdu.*

p. 116

## 224

Kaj Baliganzo: «Nu! Baronoj, rajdu;  
«Forportu, vi, bastonon; kaj vi, ganton.»  
—Kaj ili: «Ni obeos, Via Moŝto  
«Emira!»—Ili rajdas Saraguson,  
2690 Trapaŝas sub dek pordoj kaj kvar pontoj,  
Trairas stratojn plenajn je urbanoj.  
Proksimiĝinte al altaĵ' de l' urbo  
Ekaŭdas ili grandan bruon apud  
Palaco: tie multaj Idolanoj  
Ploradas, kaj kriadas, kaj ĝemadas,  
Kaj plendas kontraŭ siaj Dioj, Maho,  
Tervago, Apolono, kies helpo  
Malestis; kaj ekkrias: «Ho! Ve al ni!  
«*Sur* nin faladis honto, malfeliĉo!  
2700 «Marsilon Reĝon perdis ni hieraŭ!

«Rolando tranĉis al li dekstran manon!  
«Neniel vivas plu ĵurfal' blondulo!  
«Tuj Francoj prenos tutan Hispanujon!»  
Nun du senditoj iras al palaco. *Aŭdu.*

## 225

Sub olivujo, du servistoj prenas  
Per bridoj la ĉevalojn; kaj senditoj  
Piedirantaj tenas sin per vesto,  
Suriras la ŝtuparon de palaco,  
Eniras en l' arkaĵan ĉambron, kaj tuj  
2710 Salutas Reĝon ame sed malpie:  
«Tervago kaj Sinjoro nia Maho  
«Kaj Apolono, kiuj nin protektas,  
«Reĝinan, Reĝan Moŝtojn savu, gardu!»  
—Sed Bramimund': «Ho! kia malsagaĵo!  
«Diaĵoj niaj estas malbravuloj!  
«En Rencesvalo ili malutilis,  
«Forlasis niajn Estrojn mortiĝantajn,  
«Forlasis edzon mian en batalo!  
«De lia brako mankas dekstra mano!  
2720 «Ĝin al li tranĉis nobla Graf' Rolando!  
«Tuj Karlo prenos tutan Hispanujon!  
«Ve, malfeliĉa! Kio mi fariĝos?  
«Domaĝe, ke ne iu min mortigu!» *Aŭdu.*

p. 117

## 226

Kaj Klarian': «Reĝina Via Moŝto,  
«Aŭskultu! Baliganz' min sendis al vi;  
«Li diras: «Mi vin savos, Reĝ' Marsilo.»—  
«Li sendas al vi ganton kaj bastonon.  
«Nun sur rivero Sebro ni posedas  
«Kvar mil boatojn kaj rapidajn ŝipojn,  
2730 «Neniu povus kunkalkuli barkojn.  
«Emiro estas riĉa kaj potenca;  
«Francujen li persekutados Karlon,  
«Kaj Karlo submetiĝos aŭ mortiĝos!»  
—Reĝin': «Vi ne bezonos iri tien,  
«Ĉar vi renkontos Francojn pli proksime.  
«Ĉi-tie ili estas de sep jaroj;  
«Imperiestro estas nobla, brava,  
«Li mortos antaŭ ol forkuri; kun li  
«Kompare, Reĝoj estas nur infanoj!  
«Neniun nunvivantan Karlo timas!» *Aŭdu.*

## 227

Marsilo, al Reĝino: «Vi, silentu!»  
Kaj, al Senditoj: «Estroj, mi parolos!...  
«Vi vidas!... mi mortige korŝiriĝas!  
«Ne filo, nek filin', nek heredonto  
«Post mi alestos! Filo mortigiĝis  
«Hieraŭ! Via Estro min vizitu.  
«Li havas rajton sur Hispanolandon;  
«Mi ĝin al li fordonos, se li volos.  
«Li nur ĝin ekdefendu kontraŭ Francoj.  
2750 «Mi mem lin bonkonsilos kontraŭ Karlo.  
«Li estos elvenkinta post monato.  
«De Saragus' ŝlosilojn al li portu,  
«Kaj diru: «Mi konsilas, li *profitos!*»  
—*Kaj ili:* «Prava estas Via Moŝto!» *Aŭdu.*

p. 118

## 228

Marsilo diras: «Estro Karlo al mi  
«Mortigis anojn, dezertigis landon,  
«Per almlito ruinigis urbojn;  
«*Li kun anaro haltis apud Sebro,*  
«De tie ĉi sep mejlojn mi kalkulis.  
2760 «Vi diru al Emir': *Li alkonduku*  
«*Anaron sian tien, kie Francojn*

«*Li trovos*. Diru ankaŭ: Li preparu  
«Batalon, *kiun Francoj ne rifuzos*.»  
Li donas la ŝlosilojn de la urbo.  
Senditoj lin salutas, petas de li  
La forpermeson kaj returnen iras. *Aŭdu*.

## Reiro de Senditoj.

### 229

La du senditoj rajdas sur ĉevaloj,  
Eliras senprokraste el la urbo,  
*Tre* ekscitite iras al Emiro,  
De Saragus' ŝlosilojn *al li* donas. p. 119  
Jen Baliganzo diras: «Kion trovis  
2770 «Vi? Kie estas Reĝo postulita?»  
Kaj Klarian': «Mortige li vundiĝis!  
«Hieraŭ Karl' trapaŝis Intermontojn,  
«Por reen veni al Francujo dolĉa.  
«Li metis korteganan postgardion,  
«Rolando Graf', la nevo, restis en ĝi,  
«Kun Oliviro, dek du konsilistoj,  
«Kaj dek dumil bravuloj de Francujo.  
«Marsilo Reĝo bataladis ilin,  
«*Li renkontiĝis* kun Rolando, kiu  
2780 «Per Durendalo lin frapegis tiel,  
«Ke li distranĉis lian dekstran manon,  
«Mortigis ankaŭ lian karan filon,  
«Kaj la baronojn kondukitaĵn tien!  
«Marsil' ne povis resti kaj forkuris;  
«Imperiestro lin persekutadis,  
«Nun Reĝo petas, ke vi helpu al li,  
«Kaj li fordonas al vi Hispanujon!»  
Pri tio, Baliganzo ekpripensas,  
Kaj, pro doloro, preskaŭ freneziĝas! *Aŭdu*.

### 230

2790 Kaj Klariano: «Via Moŝt' Emira,  
«Hieraŭ, apud Rencesvalo, oni  
«Batalis. Oliviro kaj Rolando,  
«Kaj dek du konsilistoj la amataj,  
«Kaj dudek mil Francanoj mortis tie;  
«Sed Reĝ' Marsilo perdis dekstran manon,  
«Lin Karlo terurege persekutis,  
«Eĉ unu viro plu ne restas tie,  
«Ĉar ĉiuj mortis, aŭ en Sebron dronis!  
«Sur bordon, Francoj metis la tendaron;  
2800 «Jen ili haltis, tre proksime de ni,  
«Kaj se vi volos, ili ne foriros!»  
Jen Baliganzo, kun rigard' fiera,  
Kaj koro plena je videbla ĝojo,  
De trono tuj leviĝas. Li stariĝas,  
Kaj diras: «Vi, baronoj, ne prokrastu!  
«Eliru el la ŝipoj kaj ekrajdu!  
«Se ne forkuros la maljuna Karlo,  
«Hodiaŭ ni Marsilon venĝos al li.  
«Al Reĝ' pro dekstra man', mi donos kapon!» *Aŭdu*. p. 120

## Vojaĝo de Baliganzo.

### 231

2810 El ŝipoj elirinte, Idolanoj  
Ekrajdas sur ĉevaloj kaj sur muloj,  
Antaŭenrajdas, (ĉu ne pravaj ili?)  
Ekiriginte ilin, Baliganzo  
Alvokas tuj amikon Gemalfinon:  
«Ĉar mi ordonas, *regu* la anaron.»

Sur sia brunĉevalo li ekrajdas,  
Foriras kune kun kvar el la Dukoj,  
Ĝis Saraguso li senhalte rajdas;  
Malsupreniras sur marmoran ŝtupon.  
2820 Kvar grafoj piedingon al li tenas.  
Ŝtuparon de palac' li supreniras;  
Renkonten de li, iras Bramimundo;  
Ŝi diras: «Kia malfeliĉo sur min!  
«Mi honte edzon mian perdis, nevo  
«*De Karlo lin mortigis, malglorigis!*»  
Ŝi falas antaŭ li; ŝin li subtenas;  
Malĝoje ambaŭ iras en ĉambregon.     *Aŭdu.*

p. 121

### 232

Je vid' de Baliganzo, Reĝ' Marsilo  
Alvokas du hispanajn Sarazenojn:  
«Min prenu sub la brakoj, min relevu!»  
2830 Li prenas ganton per maldekstra mano,  
Kaj al li diras: «Reĝ', Sinjor', Emiro,  
«Mi *donas* al vi tutan *mian* landon;  
«Mi donas Saraguson, ĉirkaŭaĵon;  
«Mi perdis min mem, ankaŭ *tutan* ganton!»  
—Emiro: «Mi pri tio malĝojegas!  
«Kun vi mi ne longtempe parolados,  
«Ĉar certe Karl' min ne atendos tie!  
«Nun tamen mi ricevas vian ganton!»  
Li dolorege ploras kaj eliras,  
2840 Malsupreniras la ŝtuparon, rajdas,  
Per spronoj pikas al la gento, tiel  
Rajdadas ĝis la fronto de l' anaro,  
Kaj *oftajn* fojojn krias: «Idolanoj!  
«Antaŭen! Ĉar jam nun forkuras Francoj!»     *Aŭdu.*

## Karlo en Rencesvalo.

### 233

Je la tagiĝ' unua, frumatene  
Imperiestro Karl' vekiĝis; super  
Li, Sankta Gabriel', anĝel' gardanta,  
Etendis manon, faris krucan signon.  
*Sin levas* Reĝo; li formetas siajn  
2850 Armilojn; same faras kavaliroj.  
Jen ili ĉiuj rapidege rajdas  
Tra longaj vojoj kaj tra larĝaj kampoj,  
Por vidi teruregan malfeliĉon,  
En Rencesvalo, sur batala kampo!     *Aŭdu.*

p. 122

### 234

En Rencesvalon Karl' returnen *iras*.  
Je vido de mortintoj, li ekploras,  
Al Francoj diras: «Iru malrapide,  
«Mi volas iri sola antaŭ ĉiuj,  
«Por ke mi povu trovi nevon mian!  
2860 «En Ajkso, iam, en solena festo,  
«Kuraĝaj *knaboj* brave paroladis  
«Pri noblaj, fortaj batoj de militoj;  
«Rolando, (mi lin aŭdis) diris, ke se  
«En Fremdolando iam li mortiĝus,  
«Li kuŝos antaŭ anoj kaj amikoj,  
«Kun la vizaĝ' al malamiko, tiel  
«Li montros, ke li noble, brave mortis!»  
Pli longe ol forĵeto de baston', li  
Antaŭen iras, supreniras monton.     *Aŭdu.*

### 235

2870 Imperiestro serĉas sian nevon;  
Li paŝas sur herbejo, kies floroj

Ruĝiĝis per la sango de baronoj,  
Kaj, kortuŝite, li nur plori povas!  
Jen, *supre*, sub du arboj, li rekonas  
Sur la tri ŝtonoj batojn de Rolando;  
Sur verda herbo, li ekvidas nevon!...  
Se Karlo ekkoleras, vi ne miru!  
Piedirante, ne haltante, Reĝo  
*Al Grafo* kuras, kaj lin ĉirkaŭprenas  
Kaj dolorege svenas sur la korpo! *Aŭdu.*

p. 123

### 236

Imperiestro nun rekonsciiĝas;  
Naimo Duko kun Aslino Grafo,  
Gefrejz' de Anĵo, lia frat' *Tiero*  
Sidigas Estron Karlon sub abio.  
Li vidas tere korpon de la nevo,  
Kaj kortuŝite li sopiras pri li:  
«*Amik' Roland'*, al vi kompatu Dio!  
«Neniam oni vidis similulon  
«Por regi, fini tiajn batalegojn!  
2890 «Ve! Mia gloro de nun dekliniĝis!»  
Ne povas Karlo sin deteni sveni! *Aŭdu.*

### 237

Ĉar Reĝo Karlo ĵus rekonsciiĝis,  
Per manoj, kvar baronoj lin subtenas.  
Li vidas tere nevan korpon, kies  
Mieno fieriĝis kaj paliĝis,  
Okuloj renversiĝis, malheliĝis!  
Jen kore, ame, Karlo plendas pri li:  
«*Amik' Roland'!* Vin Dio metu inter  
«Glorulojn de Ĉiel', en sanktajn florojn!  
2900 «En Hispanujon vi *por* morti venis!  
«Ve! Ĉiutage mi plorados pri vi!  
«Foriros de mi forto kaj honoro!  
«Neniu plu starigos mian gloron!  
«Mi plu ne havas eĉ amikon! Inter  
«Parencoj, kiu estus inda je vi!»  
Li per du manoj tiras siajn harojn,  
*Kaj kortuŝite svenas sur la nevo!*  
Tiele malĝojegas cent mil Francoj,  
Ke ili ĉiuj varme ploregadas! *Aŭdu.*

p. 124

### 238

«*Amik' Roland'*, mi iros al Francujo!  
2910 «Min, post reveno Laŭnon, en Palaco,  
«Se el diversaj Regnoj, fremdaj homoj  
«Demandos: «kie estas Grafa Estro?»  
«Mi diros: «Li en Hispanujo mortis!»  
«Mi malĝojege regos mian Regnon!  
«Mi ĉiutage ploros kaj plendados!» *Aŭdu.*

### 239

«*Amik' Rolando*, brava, belejuna,  
«Se post reiro Ajkson, en kapelo,  
«Fremduloj venos kaj demandas pri vi;  
«Mi diros kun malĝojo kaj korŝiro:  
2920 «Ve, mortis nevo, kiu *ĉiam* venkis!»  
«Ribelos baldaŭ kontraŭ mi Hungaroj,  
«Bulgaroj, Saksoj, kiom da aliaj!...  
«Romanoj, anoj de Palermo, Pujlo,  
«Kaj ankaŭ de Afriko, Kaliferno!  
«Doloro kaj malĝojo pligrandiĝos!  
«Ĉu iu povus tiel alkonduki  
«Anaron kiel vi ĵus *mortiginta!*  
«Francujo *dolĉa*, vi orfin' fariĝis!  
«Ve! Pro doloro, volus mi ne esti!»  
2930 Li tiam tiras sian blankan barbon,  
Kaj ankaŭ, per du manoj, la kapharojn!

240

«Amik' Rolando, *vi la vivon perdis!*  
«Animo via loĝu en Ĉielo!  
«Ve! Mortiginto *malhonoris dolĉan*  
«*Francujon!* Pro dolor' mi nun vivadi  
«Ne volus! Pro mi, tuta gento mortis!  
«Favoru Dio, Fil' de Sankta Manjo,  
«Je la trair' en Sizraj Intermontoj,  
2940 «Disiĝu el la korp' animo mia,  
«Kaj ĝi aliĝu inter la aliaj,  
«Dum kuŝos korpo ĉe iliaj korpoj!»  
Li ploras, tiras sian blankan barbon!  
—Kaj Duk' Naimo: «Karlo korŝiriĝas!» Aŭdu.

p. 125

241

Gefrejz' de Anĵo: «Via Reĝa Moŝto  
«Detenu sin pri malĝojeg'! Pli bone  
«Mi serĉu tra la kamp' korpaĵojn, kiujn  
«Mortigis Idolanoj! Vi ordonu  
«Por enfosigi ilin ĉiujn kune!»  
Jen Reĝo diras: «Sonorigu kornon!» Aŭdu.

242

Gefrejz' de Anĵo sonorigas kornon.  
Ĉar Karl' ordonis, Francoj piediras,  
Translokas kaj kunmetas en fosaĵon  
Amikojn ĉiujn, kiujn ili trovis.  
Ĉeestas episkopoj, kanonikoj,  
Monaĥoj, pastroj kaj abatoj; ili  
Je Dio benas kaj mortpreĝojn kantas,  
Bruligas mirhon kaj aromojn; ĉiuj  
Fervore balancadas fumilaĵojn.  
2960 Belege oni enterigas ilin!...  
Nun Francoj lasas ilin. (Ĉu ne pravaj?). Aŭdu.

243

Ordonas Karlo apartigi l' nevon  
Kaj Oliviron kaj Ĉefepiskopon  
Turpinon; oni prenas l' internaĵojn;  
La korojn oni metas en silktukon,  
Kaj korpojn en marmorajn blankajn ĉerkojn.  
De l' tri baronoj oni lavas korpojn  
Per vino kunmiksita kun ruĝpipro,  
Kaj volvas ilin en cervfeloj. Reĝo  
2970 Ordonas al Tedbaldo, Gebuino,  
Miluno Grafo kaj Oton' Markizo:  
«Konduku ilin per tri veturiloj!»  
Sur ilin oni metas silktolaĵon. Aŭdu.

p. 126

Alveno de fremda anaro.

244

*Post enterig' de Estroj kaj Baronoj,*  
*Krom tri por porti ilin ĝis Blaivo,*  
Pretiĝas Ĉestro Karlo por foriri.  
Sed jen antaŭgvardio idolana  
Aperas. Je Emiro, du senditoj  
El front' eliras, pri batal' sciigas:  
«Fiera Reĝ' forkuri vi ne povos;  
«Ĉar Baliganzo rajdis, li ĉeestas  
2980 «Kun bela anareg' de Arabujo.  
«Hodiaŭ, ni ekvidos ĉu vi estas  
«Bravulo!» Karlo tiras sian barbon,  
Memoras pri dolor' kaj ruiniĝo

*De l' tago de batal' en Rencesvalo;*  
Noblege anaregon li rigardas  
Kaj laŭte, forte krias: «Francaj Estroj!  
«Armilojn prenu, rajdu, kaj antaŭen!» *Aŭdu.*

p. 127

## 245

L' unua, Karlo prenas armilaron,  
Vestiĝas per kiraso, ligas kaskon,  
Kaj zonas glavon Ĝojulinon, kies  
Helec' *blindigas* kiel sunradio;  
2990 Al kol' pendigas ŝildon de *Girundo*,  
Ekprenas lancon (en Blandun' faritan),  
Ekrajdas sur ĉevalo Tencenduro,  
(Li ĝin akiris ĉe Marsunaj bordoj  
Malpalon de Nerbuno mortiginte),  
Li lasas bridojn kaj per spronoj pikas:  
Tuj ekgalopas antaŭ *cent* mil viroj,  
Alvokas Dion. Roman apostolon...  
*Post preĝo, li ne timas batalorton.*  
Kaj Francoj: «Tia viro devas reĝi!» *Aŭdu.*

## 246

Sur tuta valo, Francoj piediras.  
3000 Pli ol cent mil sin armevestas kune.  
Ho! Kiel la armaĵoj estas brilaj  
Ĉevaloj viglaj kaj armiloj belaj!  
Standardoj pendas ĝis la kaskoj; Francoj  
Lertege rajdas. Ho! se ili trovos  
Fremdulojn, batalego ekfariĝos!  
Vidinte ilin tiel pretajn, Karlo  
Alvokas Joseranon de Provenco,  
Naimon Dukon, kaj Antelmon estron  
De Majnso: «Kiu ne al ili fidus?»  
3010 «Jes, malesperi estus malsaĝaĵo!  
«Se ne forkuros Idolanoj, ili  
«Elpagos kare morton de Rolando!»  
Respondas Duk' Naimo: «Dio volu!» *Aŭdu.*

p. 128

Formado de Franca anaro.

## 247

Alvokas Karl' Rabelon kaj Ginmanon;  
Li diras: «Jen ordono; Vi, Rolandon  
«Kaj Oliviron anstataŭos—unu  
«Alprenos glavon, kaj l' alia kornon.  
«Nun antaŭ anarego vi kuniru,  
«Kaj kune kun vi dek kvinmil el Francoj,  
3020 «El la plej bravaj, viglaj, ĉiuj junaj;  
«Post ili iru dek kvin mil aliaj,  
«Kun estroj Gebuino kaj Loranto.»  
Naimo Duk' kaj Joserano Grafo  
Tuj ekpretigas tiujn du korpusojn.  
Fremduloj venu! Kia batalego!  
*Per tranĉaj glavoj kiom da bategoj!* *Aŭdu.*

## 248

Konsistas nur el Francoj du unuaj  
Korpusoj; oni fondas nun la trian.  
En tiun ĉi eniras Bajeranoj.  
Ilia nombro estas tridek *mi*loj.  
3030 Ja, de batalo ne forkuros ili  
De Karl' el plej amataj sub ĉielo,  
Krom Francoj, kiuj venkas reĝolandojn.  
Ogiro de Danujo brave prenas  
Estrecon. Kiel bela la anaro! *Aŭdu.*

## 249



*Jam* Estro Karlo havas tri korpusojn;  
Naimo Duko fondas nun la kvaran.  
Konsistas ĝi el la plej kuraĝuloj  
El anoj de Germana *limolando*.  
Laŭ l' diro, ili estas dudek miloj;  
3040 Ĉevaloj fortaj, kaj armiloj bonaj;  
Kaj malgraŭ morto, ili ne forkuros.  
Hermano, Duk' de Trac' kondukas ilin;  
Li mortos pli ol fari malbravaĵon. *Aŭdu.*

p. 129

## 250

Naimo Duk' kaj Ĵoserano Grafo  
Korpuson kvinan fondas el Normanoj.  
Laŭ l' diro, ili estas dudek miloj;  
Armiloj belaj, bonĉevaloj viglaj.  
Eĉ antaŭ morto ne kapitulacos  
Ĉi-tiuj *plej* obstinaj *kiel eble*.  
3050 Ilia Estro, grandaĝul' Riŝardo,  
Batalos forte per tranĉega hasto. *Aŭdu.*

## 251

Britanoj fondas la korpuson sesan.  
Ilia nombro estas *kvardek* miloj,  
Kaj ili noble rajdas sur ĉevaloj,  
Kun hastoj longaj kaj standardoj rektaj!  
Sinjor' ilia, Oelduno, donas  
Estrecon al du grafoj, Neveluno,  
Tedbaldo Rejmsa, kaj markizo Oto:  
«Konduku genton, mi ĝin al vi donas.»  
*Kaj la tri Estroj diras: «Ni obeos!»* *Aŭdu.*

## 252

3060 Imperiestro havas ses korpusojn.  
Naimo Duko fondas nun la sepan,  
El anoj de Alverno kaj de Pejto.  
Ilia nombro estas kvardek miloj,  
Ĉevaloj bonaj kaj armiloj belaj!  
En valo, sur altaĵo, ilin benas  
Imperiestro per la dekstra mano.  
Godselm' kaj Ĵoseran' kondukas ilin. *Aŭdu.*

p. 130

## 253

Naimo fondas nun korpuson okan,  
El anoj de Flandrujo kaj de Frizo.  
3070 Ilia nombro estas kvardek miloj.  
Ja, ili ne forkuros el batalo.  
«Plenumos ili mian servon», diras  
La Reĝ'. Rembald', Hamuno de Galico  
Majstrece gvidos ilin al batalo. *Aŭdu.*

## 254

Naimo Duk' kaj Ĵoserano Grafo  
Korpuson naŭan fondas el bravuloj  
El Loheranoj kaj el Burginanoj.  
Ilia nombro estas kvindek miloj.  
Ho! belaj kaskoj kaj kiraso, *glavoj*  
*Ĉe flanko, kaj duobla ŝild' al kolo,*  
3080 Mallongaj stangoj de fortegaj hastoj!  
Se ne forkuras Idolanoj, ili  
Ricevos fortajn batojn en batalo!  
Arguna Duk', Tiero, gvidas ilin. *Aŭdu.*

## 255

Baronoj de Francujo fondas dekan  
Korpuson; ili estas cent mil el plej  
Bonegaj kaj agemaj; eksteraj  
Fiera, kapo bela, barbo blanka!

Vestiĝis ili per kiras' duobla,  
Kaj zonis francajn aŭ hispanajn glavojn;  
3090 Sur ŝildoj diversdistingigaj signoj.  
*Ilij hastoj kaj pikstangoj fortaj!*  
*Ĝis ungoj ili armis sin per retaj*  
*Fervestoj*, rajdas, petas al batalo,  
«Munĝoj'», ekkrias. Antaŭ Karlo portas  
Gefrejz' de Anĵ' standardon. Ĝi en tempo  
De Sankta Petro estis «Romanino»;  
Sed ĝia nomo estas nun «Munĝojo». *Aŭdu.*

p. 131

Preĝo de Karlo.

## 256

La Reĝo, de ĉevalo, piediras.  
Li genufleksas sur la verda herbo,  
Al suno leviĝanta li rigardas,  
Al Dio preĝas el tutkoro, diras:  
3100 «Ho, Vera Patro! Vi hodiaŭ helpu!  
«Ho, Vi savinte ja de mort' Jonason  
«For el baleno, kiu lin *englutis!*  
«Ho, Vi savinte reĝon de Ninivo,  
«*Kaj urbon, ankaŭ tutan lian genton!*  
«Savinte Danielon de terura  
«Turmento en fosajo kun leonoj!  
«Savinte el la fajro tri infanojn!  
«Hodiaŭ, Via Amo zorgu pri mi!  
«Mi petas, Vi indigu faciligi,  
«Por ke hodiaŭ mi Rolandon venĝu!»  
3110 Li finis sian preĝon; li sin levas,  
Sur fruntan faras la favoran signon  
De kruco, kaj ekrajdas. Duk' Naimo  
Kaj Ĵoserano tenas piedingon.  
Li prenas ŝildon kaj tranĉegan lancon.  
Ho! Kiel bela, forta, nobla korpo!  
Ho! helvizaĝ'! fiera eksterajo!  
Li majstre sur ĉeval' antaŭenrajdas.  
Antaŭe, malantaŭe kornoj bruas,  
Supersonoras ĉiujn Olifanto.  
Sopiras pri Roland' kaj ploras Francoj! *Aŭdu.*

p. 132

Kunveno de anaroj.

## 257

Imperiestro noble rajdas, kaj li  
Sur la kiraso plilarĝigis barbon.  
Pro amo, ĉiuj Estroj same faras.  
Per tiu signo estas rekoneblaj  
La cent mil Francoj. Ili trairadas  
Ŝtonegojn, montojn kaj terurajn valojn,  
Eliras el krutegaj intermontoj,  
Alvenas en hispanan limolandon,  
Kaj haltas en *la mezo* de herbejo...  
3130 Al Baliganz' revenas la Senditoj;  
El ili Suliano diras jenajn:  
«Ni vidis fieregan Reĝon Karlon,  
«Terurajn liajn anojn, kiuj nepre  
«Vin ekatakos! Kuru al armiloj!»  
—Kaj Baliganz': «Ĝojego por bravuloj!  
«Por Idolanoj sonorigu kornojn!» *Aŭdu.*

## 258

Nun Idolanoj tra anaro tuta  
Bruegas per tamburoj kaj per kornoj  
Sonoraj, ili prenas armilaron.  
3140 Unua, Baliganzo, sin rapide

- Vestigas per kiras' je orsubaĵoj,  
 Sur kapo ligas orjuvelan kaskon,  
 Sur la maldekstran flankon zonas glavon.  
 Li, pro vanteco (ĉar li ankaŭ aŭdis  
 Paroli pri la glav' de Karlo), nomon  
 «*Mirindulino*» donis *al la sia*.  
 Ĉi-nomo estas lia kunvenvorto;  
 Per ĝi kriegas liaj kavaliroj.  
 Nun li pendigas al la kolo grandan  
 Kaj larĝan ŝildon je orbulo kaj je  
 3150 Randaĵo brila per kristaloj; ĝian  
 Rimenon belornamas ŝtof' desegna.  
 Li prenas lancon; ĝia nomo «Malto»,  
 Lignaĵo estas dika kiel trunko,  
 Feraĵo peze ŝarĝus unu mulon.  
 Nun li ekrajdas sur ĉeval'. Transmara  
 Markulo tenas lian piedingon.  
 Emiro per beleco de la korpo,  
 Fortegaj koksoj, kaj maldikaj flankoj,  
 Belformo kaj fortenco de la brusto  
 3160 Per altaj ŝultroj, kaj rigardo bela,  
 Per la vizaĝ' fiera kaj bukharoj,  
 Ekŝajnas tiel blanka kiel floroj  
 Someraj; ofte li kuraĝon pruvis.  
 Se li Kristano, kia *nobelulo!*  
 Ĝis sango li per spronoj pikas, rajdas  
 Galope, kaj risorte suprensaltas  
 Fosaĵon larĝan pli ol kvindek futojn.  
 Barbaroj krias: «Li defendos kampon!  
 «Se kontraŭstaros al li, Karlo, vole  
 3170 «Nevole, perdos vivon; Estro Karlo  
 «Malprudentiĝas, ĉar li restas tie!» *Aŭdu.*

## 259

- Emir' similas vere al barono;  
 (Blankiĝis lia barbo kiel floro),  
 El Idolanoj plej kuraĝa, kaj en  
 Batalo, fierega, terurega.  
 Malprim, lia filo, estas brava,  
 Li granda, forta kiel la prapatroj  
 Al patro diras: «Ni antaŭenrajdu!  
 «Ĉu eble ni kun Karlo renkontiĝu!»  
 3180 —Kaj Baliganz': «Jes, ĉar li estas brava;  
 «Per oftaj diroj oni laŭdas pri li,  
 «Sed li Rolandon, sian nevon, perdis,  
 «Kaj li ne povos kontraŭstari al ni!» *Aŭdu.*

## 260

- «Malprim' Karulo!» —diras Baliganzo,  
 «Hieraŭ mortis fidelul' Rolando,  
 «Kun nobla kaj kuraĝa Oliviro,  
 «Kaj dek du konsilistoj la amataj,  
 «Kaj dudek mil Francanoj de Francujo.  
 «Pri la aliaj... mi malŝatas ilin!  
 3190 «Imperiestro, ja, ĉi-tien venis;  
 «Sendito Sulian' sciigis tion,  
 «*Ke* Karlo *fondis* dek korpusojn grandajn.  
 «Bravuloj estas kornsonoriganta,  
 «Kaj tiu klare ripetanta post li;  
 «Rajdadas ili antaŭ la aliaj;  
 «Post ili venas dek kvinmil Francanoj,  
 «Junuloj, kiujn Karl' «Infanoj» nomas;  
 «Kaj poste, ankaŭ dek kvinmil aliaj!...  
 «Fiere ili ĉiuj batalados!»  
 —Malprim': «Permesu, ke mi ekataku!» *Aŭdu.*

## 261

- «Malprim' Karulo!» diras Baliganzo,  
 «Al via peto mi konsenton donas.  
 «Tuj iru por ataki Francojn, kun vi  
 «Kuniru Reĝo de Persuj' Torluo,

- «Kaj Reĝo de Leŭtizioj, Dapamorto.  
 «Se vi elvenkos Karlon, *kaj malhelpos*  
*«Ke Olifanto tiel bruegadu,*  
 «Mi donos al vi parton de la lando  
 «De Kerianto ĝis Markiza Valo.»  
 —Malprim': «Mi dankas Vian Reĝan Moŝton!»  
 3210 Li proksimiĝas kaj ricevas donon:  
 Ĝi estis tero jam al Reĝo Fluro...  
 Malprimo ĝin neniam povos vidi,  
 Reĝecon sur ĝi li neniam prenos! *Aŭdu.*

Formado de fremda anaro.

## 262

- Emiro rajdas tra anaro; ĉien  
 Lin sekvas lia filo, grandegulo,  
 Kun Reĝoj Dapamorto kaj Torluo.  
 El la anaro, ili fondas tridek  
 Korpusojn (tiel multaj estas anoj!)  
 En plej malgranda estos *kvindek* miloj  
 3220 Da viroj. La unuan fondas anoj  
 De Butentrototo (*patroland' de Judo*  
*Pro oro liverinta Dion*). Fondas  
 La duan dikkapegaj Micenanoj,  
 Haruloj sur la dorso kiel aproj;  
 La trian, Nubianoj kaj Blosanoj;  
 La kvaran, Esklavanoj kaj Brunsanoj;  
 La kvinan, Sorbresanoj kaj Sorsanoj;  
 La sesan, Erminanoj kaj Morsanoj;  
 La sepan, Ĵerikanoj; kaj la okan  
 Negranoj; kaj la naŭan, Dikeganoj;  
 3230 La dekan, fine, anoj de Balido-  
 La-forta, gent' malbona kaj malnobla.  
 Emir' alvokas per fervoraj preĝoj  
 De Mahomet' potencon kaj ĉeeston:  
 «Malprave rajdas Karlo de Francujo!  
 «Ni ekbatalos; li, se ne forkuros,  
 «Ne portos plu sur kapo oran kronon!» *Aŭdu.*

p. 136

## 263

- Nun Idolanoj fondas dek aliajn  
 Korpusojn; la unuan el malbelaj  
 Kanelianoj (el Valfujt' venintaj).  
 3240 La duan fondas Turkoj; kaj la trian  
 Persanoj; ili ankaŭ kun Pincaj  
 La kvaran; Avaranoj kaj Soltranoj  
 La kvinan; Ormalanoj, Eŭglezanoj  
 La sesan; anoj de Samul' la sepan;  
 La okan, Bruisanoj; Esklaversonoj  
 La naŭan; kaj la dekan anoj de la  
 Dezerta Oksianto, malamantaj  
 Sinjoron Dion, kaj plej perfiduloj.  
 Ilia haŭt', malmola kiel fero  
 3250 Ebligas lasi for kirason, kaskon;  
 Kruelelaj ili estas en batalo! *Aŭdu.*

## 264

- Emiro fondas ankaŭ dek korpusojn.  
 Unuan el Gajanoj de Malpruso;  
 El Hunsoj, duan; el Hungaroj, trian;  
 El anoj de Baldis'-la-longa, kvaran;  
 El anoj de Penusa Valo, kvinan;  
 El Marusanoj *kaj fojanoj*, sesan;  
 El Leŭsoj kaj el Astrimanoj, sepan;  
 El Argoj, okan; el Klarbanoj, naŭan;  
 3260 El Barbulanoj de *Valfundo*, dekan.  
 Ĉi-tiu gent' neniam amis Dion.  
 Skribaĵo franca kunkalkulis tridek

p. 137

**265**

Emiro estas bela kaj potenca  
Antaŭe rajdas Drakonstandardisto,  
Kaj standardistoj de Tervag' kaj Maho,  
Kaj figuraĵ' de perfidul' Apolo.  
Apude, *dek* Kanelianoj rajdas.  
3270 Kaj per laŭtvoĉo krias: «Kiu volas,  
«Ke niaj Dioj helpu al li, devas  
«Al ili preĝi, ankaŭ genufleksi!»  
Mallevas tiam Idolanoj kapon,  
Mentonon kaj helrebrilantajn kaskojn.  
—Kaj Francoj: «Malnobleĝaj! Vi tuj mortos!  
«Favoru Dio, por ke vin ni venku,  
«Al Estro Karl' hodiaŭ Li favoru,  
«Kaj al li donu venkon en batalo!» *Aŭdu.*

**266**

Emir' lertulo estas kaj klerulo;  
3280 Li vokas sian filon kaj du Reĝojn:  
«Baronoj noblaj, rajdu antaŭ ĉiuj,  
«Ĉar vi korpusojn ĉiujn kunkondukos,  
«Retenas mi, el la plej bonaj, nur tri,  
«Ĉi-tiuj estos Turkoj, Ormalanoj,  
«Gajanoj de Malpruso; plie, restos  
«Ĉe mia flanko gent' de Oksianto.  
«Mi ilin kontraŭmetos al Francanoj,  
«Kaj Karlo, se li volos min batali,  
«El lia kolo mi distranĉos kapon,  
«Nur tion rajte li postulus de mi!» *Aŭdu.*

p. 138

Pretiĝado por batalego.

**267**

Anaroj grandaj kaj korpusoj belaj!  
Malestas en la interspaco, monto,  
Monteto, valo, arbaret', arbaro;  
Facile ili povas sin rigardi  
Sur vasta ebenaĵ'. Jen Baliganzo:  
«Ekrajdu, Idolanoj, ekbatalu!»  
Standardon Oluferna Amborio  
Portadas; ĉiuj krias: «Munmirindo!»  
—Sed Francoj: «Dio volu ruinigi  
3300 «Hodiaŭ vin!—Munĝojo!», krias ili.  
Nun Karl' ordonas sonorigi kornojn,  
Jen Olifant' supersonoras ĉiujn.  
—Kaj Idolanoj: «Bela gent' de Karlo!  
«Ni forte, terurege batalados!» *Aŭdu.*

**268**

Sur granda ebenaĵo, larĝa lando,  
*Kunvenis anareĝ' grandega.* Ĉie  
Rebrilas oraj kaj juvelaj kaskoj,  
Fervestoj orsubŝtofaj, ŝildoj, hastoj,  
Standardoj sur la supro de pikstangoj!  
Jen ĉiuj kornoj klare sonorantaj!  
3310 Jen forta sonorad' de Olifanto!  
Emiro tiam vokas sian fraton  
Kanabon, reĝon de Florido, estron  
De lando ĝis Valsevro, kaj montrinte  
Al li de Karlo *dek* korpusojn, diras:  
«Francujo glora rajte fieriĝas!  
«Imperiestro noble rajdas, tie  
«Li estas inter ĉi-barbuloj, kiuj  
«Sur la kirasoj plilarĝigis barbon;

p. 139

«Ĝi estas tiel blanka kiel neĝo  
3320 «Sur frosto; ili frapos ja per lancoj,  
«Per glavoj; forte ni batalos; oni  
«Neniam vidus tian batalegon!»  
Kaj Baliganzo, je pli malproksime  
Ol ĵeto de baston' antaŭenrajdas,  
Kaj krias al anaro: «Idolanoj!  
«Antaŭen! Al vi mi direkton montras!»  
Li tiam svingas stangon de lancego,  
Kaj ŝajnas celi Karlon per feraĵo! *Aŭdu.*

## 269

Rigard' de Karlo iras sur Emiron,  
3330 Drakonon, flagon kaj standardon, kaj sur  
Arabajn anojn tiel multenombrajn.  
Jes! ili kovras tutan ebenaĵon,  
Krom loko okupata de Francanoj.  
Nun Reĝo de Francujo laŭte krias:  
«Baronoj francaj, vi kuraĝaj estas,  
«En militadoj tiom batalinte!  
«Jen Idolanoj! Ili perfiduloj,  
«Malbravaj estas, kaj ilia leĝo  
«Nur malŝatinda! Sed vin ne haltigu  
3340 «Ilia nombr' por ni ne grava! Sekvu  
«Min! *ĉar mi nepre ekatakos ilin!*»  
Nun Karl' per spronoj pikas Tencenduron;  
Ĉevalo faras kvar saltegojn; Francoj  
Ekkrias: «Kiel brava nia Estro!  
«Rajdadu, Reĝ', neniam ni vin lasos!» *Aŭdu.*

p. 140

## 270

La tago hela, ĉar la suno brilas!  
Anaroj grandaj, kaj rotegoj belaj!  
Jam nun kontraŭstariĝas du unuaj  
Korpusoj; jam Rabelo kaj Ginmano  
Forlasis bridojn al ĉevaloj viglaj,  
3350 Per spronoj pikas. Francoj ekgalopas,  
Kaj ekfrapegas per pikstangoj tranĉaj! *Aŭdu.*

## Dueloj.

## 271

Rabelo Graf', kuraĝa kavaliro,  
Per oraj spronoj pikas la ĉevalon;  
Torluon, reĝon de Persuj' li frapas.  
Nenia ŝildo nek kiraso povus  
Post tia bato resti ne rompita.  
Per ora lanc' vundita, Reĝo falas  
Sur *floran* arbetejaĵon. Francoj krias:  
«Al prava Karl' ni restu! Dio helpu!» *Aŭdu.*

## 272

3360 Ginman' atakas reĝon de Leŭtizoj;  
Disrompas li florornamitan ŝildon,  
Kirason. Pikstandard' trapikas korpon,  
Kaj Reĝ' mortinta falas. (Ĉu pri tio  
Vi ploras, ĉu vi ridas, Reĝo falis!)  
Je tia vido Francoj krias: «Frapu,  
«Baronoj, senprokraste; Karlo havas  
«La rajton kontraŭ *idolana* gento.  
«Ĉi-tio vere estas Dia juĝo!» *Aŭdu.*

p. 141

## 273

Malprimo rajdas sur ĉeval' tutblanka;  
3370 En mezon de Francanoj li sin ĵetas,  
Multegajn fortajn batojn li frapadas,

Mortinton sur mortinton li faligas.  
Jen Baliganz' ekkrias: «He! Baronoj,  
«Pri kiuj mi longtempe zorgis, vidu  
«Vi filon mian, *kiu* serĉas Karlon,  
«Provokas tiom da Baronoj... Ja li  
«Plej brava estas. Nun vi helpu al li  
«Per tranĉaj lancoj!»—Tiam Idolanoj  
Antaŭenkuras kaj terure frapas!  
3380 Varmega interpuŝo! Kaj premega  
Kaj miriginda batalego! Tian  
Nek poste, nek antaŭe oni vidis! *Aŭdu.*

## 274

Anaroj grandaj kaj rotegoj belaj!  
Korpusoj ĉiuj nun kontraŭstariĝas!  
Ho! terurege frapas Idolanoj;  
Ho, Dio! Kiom da rompitaĵoj hastoj,  
Da disŝiritaj ŝildoj kaj kiraso!  
Sur tero amasiĝis tiel multaj  
Mortintoj, ke verdherbaj folietoj  
3390 *Ruĝiĝis per la sango de vunditoj!*  
Emir' denove vokas siajn anojn:  
«Baronoj frapu nun Kristanan genton!»  
Batalo estas varma, terurega!  
Neniam oni vidis tian! Jes ĝis  
La *morto*, batalantoj ne disiĝos! *Aŭdu.*

## 275

Emir' ankoraŭ vokas sian genton:  
«Vi devas nur frapadi, Idolanoj;  
«Mi donos al vi belajn kaj agrablajn  
«Edzinojn, terojn, domojn kaj bienojn!»  
3400 —Kaj Idolanoj: «Ni frapadi devas!»  
Pro troaj frapoj ili perdas hastojn,  
Tuj pli ol cent mil glavojn elingigas!  
Grandega, terurega interpuŝo!  
Jes! Ĉeestantoj vidis batalegon! *Aŭdu.*

## 276

Imperiestro kuraĝigas Francojn:  
«Baronoj noblaj, mi vin amas, ankaŭ  
«Al vi mi fidas; ĉar por mi, vi multe  
«Batalis, landojn prenis, reĝojn venkis...  
«Mi scias... Mi kompanse ŝuldas al vi  
3410 «Arĝenton, terojn, eĉ la propran korpon...  
«Sed venĝu filojn, fratojn, anojn, kiuj  
«En Rencesval' *jus mortis*... Ĉar vi scias  
«Ni estas pravaj kontraŭ Idolanoj!»  
—Kaj Francoj: «Via Reĝa Moŝto prava!»  
*Al Karlo* dudek mil, per unu voĉo,  
Certigas, ke lin ili ne forlasos  
Eĉ malgraŭ la danĝeroj aŭ la morto.  
Jen tiam ĉiuj frapas per pikstangoj,  
Kaj senprokraste batas per la glavoj.  
Batal' terure miriginda estas! *Aŭdu.*

## 277

Malprim' *baron'*, tra batalejo rajdas,  
Li terurege frapas sur Francanojn;  
Jen Duk' Naim' fiere lin rigardas,  
Kaj lin atakas per kuraĝa bato;  
De lia ŝild' supraĵon li disrompas,  
Disŝiras subkirason, lin trapikas  
Per flavkolora flago, kaj sur sepcent  
Aliajn *lin faligas* mortigitan. *Aŭdu.*

## 278

Kanabo Reĝo, frato de Emiro

- 3430 Per spronoj forte pikas la ĉevalon,  
Eltiras glavon je kristalprenilo,  
Naimon frapas sur la princan kaskon,  
Per tranĉa ŝtalo ĝin disigas, ankaŭ  
Disrompas kvin el kaskaj rimenetoj.  
Al Duko ne utilas ferplataja  
Subkasko, ĉar subaĵo ĝis la karno  
Tranĉiĝis kaj pecaĵo falas teren.  
Per tia bato Duk' senkonsciigigas;  
Li estus mem falinta se ne Dio
- 3440 Protektus. Li je l' kolo ĉirkaŭprenas  
Ĉevalon. Sed, se Idolano frapos  
Denove, nobelulo nepre mortos.  
Jen venas Karlo de Francuj' por helpo. *Aŭdu.*

## 279

Naimo Duk' ekstreme danĝeriĝas,  
Ĉar Idolan' rapidas reataki.  
Sed Karl': «Malnobla, Vi pri tio pentos!»  
Kaj kuraĝege Karlo lin atakas,  
Disrompas ŝildon kontraŭ lia brusto,  
Disŝiras mentonumon de kiraso,  
*Per lanc' trapikas korpon*, lin faligas  
Senvivan de malokupita selo. *Aŭdu.*

## 280

- Dolore premeĝigas Reĝo Karlo  
Vidinte antaŭ si Naimon *Dukon*  
Vunditan, kies sang' makulas verdan  
Herbaĵon. Tiam Karlo diras jenajn:  
«Sinjor' Naimo, apud mi nun rajdu.  
«Ĵus mortis malnoblulo atakinta;  
«Per lanco mi trapikis lian bruston!»  
—Kaj Duk': «Mi kredas Vian Reĝan Moŝton;  
«Se mi ne mortos, mi plenumos ŝuldon!»
- 3460 Konfide, ame, ili kune rajdas,  
Kaj ankaŭ dudek mil Francanoj, ĉiuj  
Terure kaj fiere bataladas. *Aŭdu.*

## 281

- Emir' tra batalejo rajdas, *tenas*  
*En mano sian grandan, tranĉan lancon;*  
Sin ĵetas sur Ginmanon Grafon, rompas  
Sur lia koro lian blankan ŝildon,  
Disŝiras la subaĵon de kiraso,  
Distranĉas bruston, flankojn; lin mortintan  
Faligas de ĉeval'; mortigas ankaŭ  
Loranton, Gebuinon kaj Riŝardon
- 3470 Grandaĝan estron de Normanoj. Krias  
Fremduloj: «Brava batalant'! Terura  
«Mirindulino! Nu, baronoj, frapu!» *Aŭdu.*

## 282

Arabaj kavaliroj estas belaj!  
Basklanoj, Argoj, Oksianoj frapas  
En interpuŝo per teruraj lancoj!  
Sed Francoj ne forkuros; tial, multe  
Da viroj ambaŭflanke mortas, kaj ĝis  
Vespero, oni forte batalados.  
Baronoj francaj amasege mortas!  
Ho! Kiom da doloroj, ĝis finiĝo! *Aŭdu.*

## 283

Fortege frapas Francoj kaj Araboj;  
Pecigas ili glavojn kaj pikstangojn!  
Ho, ve! Je l' vido de rompitaĵoj ŝildoj,  
Je l' aŭdo de la kaskoj kaj de blankaj  
Kirasoj bruegantaj kontraŭ ŝildoj,



Je l' vido de falantaj kavaliroj,  
 Je l' aŭd' de plendaj ĝemoj de mortantoj,  
 Ho! Kiu ne premiĝus per korŝiro!  
 Ve! Terurega estas batalego!

3490 Alvokas Baliganzo Apolonon,  
 Tervagon, Mahometon: «Niaj Dioj!  
 «Sinjoroj! Mi plenumis Vian servon!  
 «Mi vin glorigos per statuoj oraj  
 «*Se vi bonvolos helpi kontraŭ Karlon!*»  
 Amiko lia, Gemalfin' sciigas  
 Novaĵojn plej malbonajn: «Via Moŝto  
 «Emira! Tago por vi pereiga!  
 «Ĉar vi Malprimon, vian filon, perdis!  
 «Kanabo, via frato, ankaŭ mortis!

3500 «Prosperis al du Francoj frapi ilin!  
 «Laŭ mia juĝ', el tiuj estas Karlo,  
 «Altkreska kaj fiera, tiel blanka  
 «Per barbo kiel floro en Aprilo!»  
 Emiro nun mallevas mentonumon  
 De kask'; sur bruston ekkliniĝas kapo...  
 Pro doloreg' li pensas, ke li mortas...  
 Al si li vokas Janglon la transmaran. *Aŭdu.*

p. 146

## 284

Emiro diras: «Jangl', alproksimiĝu!  
 «Vi estas brava, klera kaj al viaj

3510 «Konsiloj ĉiam mi *alkonformiĝis*.  
 «Nu! diru kion pensas vi pri Francoj  
 «Kaj pri Araboj? Ĉu ni venkos?»—Janglo:  
 «Emira Via Moŝto ne saviĝos!  
 «Ne kredu, ke vin savos viaj Dioj,  
 «Fiera estas Karlo, liaj anoj  
 «Kuraĝaj kaj plej taŭgaj por batalo!  
 «Alvoku tamen Oksianojn, Turkojn,  
 «Arabojn, Enfrunanojn kaj Gajanojn,  
 «Por senprokraste fari devan agon!» *Aŭdu.*

Kunigo de fremda anaro.

## 285

3520 Emiro sur kiras' larĝigas harojn  
 De barbo tiel blanka kiel floro  
 Krataga; li neniel volus halti;  
 Al buŝo metas klaran sonorkornon;  
 Ĝin sonorigas. Ĉiuj Idolanoj  
 Lin aŭdas. Li korpusojn kunvenigas.  
 Bruege eklekadas Oksianoj,  
 Bojadas Argojanoj kiel hundoj.  
 Freneziĝantaj ĉiuj serĉas Francojn,  
 Sin ĵetas mezen de Francanoj, ilin  
 Disigas! Jen sep mil mortintoj falas! *Aŭdu.*

p. 147

## 286

Ogiro estas brava, ĉar neniam  
 Pli bona ol li portis la kirason.  
 Li vidas Francojn disigitajn, vokas  
 Tieron dukon de Argun', Gefrejzon  
 De Anĵo, ankaŭ grafon Ĵoseranon;  
 Al Karl' fiere diras: «Vidu, kiom  
 «Mortigas Idolanoj viajn virojn!  
 «Forprenu Dio vian kronon, se vi  
 «Ne venĝos la malgloron per bategoj!»

3540 Neniu eĉ respondas; sed jen ĉiuj  
 Per spronoj pikas kaj forlasas bridojn,  
 Kaj serĉas, kaj batalas Idolanojn. *Aŭdu.*

## 287

Terure frapas Reĝo Karlo, Duko  
 Naimo, kaj Ogiro de Danuj', kaj  
 Gefrejz' de Anĵo, reĝa standardisto.  
 Ogiro de Danujo, plej terure,  
 Per spronoj pikas, bridojn lasas, jen li  
 Sin ĵetas sur la Drakonstandardiston,  
 Per unu bat' faligas la Drakonon  
 3550 Kaj flagon de Emiro. Baliganzo  
 Ekvidas sian flagon, kaj standardon  
 De Mahometo ekĵetitajn teren,  
 Sen ia defendant', kaj ekpripensas,  
 Ke rajto estas, malgraŭ li, al Karlo.  
 Jen Idolanoj *malpli kuraĝiĝas*,  
 Jen Karl' *al Francoj* diras: «Ĉu, pro Dio,  
 «Vi helpos al mi?»—Ekrespondas Francoj:  
 «Demando tia estus insultaĵo!  
 «Malben' al kiu ne batados varme!» *Aŭdu.*

p. 148

## Duelo inter Karlo kaj Baliganzo.

### 288

3560 La tago malheliĝas; vesperiĝas;  
 Per glavoj frapas Francoj, Idolanoj.  
 Kunvenigintaj ilin Estroj estas  
 Bravegaj, *sed* memoras kunvenvorton.  
 Ekkrias Baliganzo: «Munmirindo!»  
 —«Munĝojo!», krias glora Reĝo Karlo.  
 Sin ili konas per laŭtvoĉoj klaraj;  
 En interpuŝo ambaŭ renkontiĝas,  
 Sin ĵetas, frapas unu la alian  
 Per lancoj sur florornamitajn ŝildojn,  
 3570 Disrompas ŝildojn sub la larĝa bulo,  
 Disŝiras la subaĵon de kiraso...  
 Sed, pli terura bato ne sukcesas.  
 Rompiĝis selrimenoj; renversiĝas  
 Du seloj... kaj du reĝoj *falas* teren...  
 Rapide ili restariĝas; ambaŭ  
 Fiere tiras glavon el la ingo...  
 Jes, tiu dubatalo ne finiĝos  
 Nur se mortigos unu la alian! *Aŭdu.*

### 289

Bravulo, Karlo de Francujo dolĉa.  
 3580 Sed Baliganzo lin neniel timas.  
*Li diras: «Vi mortigis mian filon,  
 «Malrajte vi okupas mian landon,  
 «Sed submetiĝu, mi ĝin al vi donos!»*  
 Per glavoj helaj ili kontraŭstaras,  
 Multfoje forte frapas ŝildojn, kies  
 Ŝiriĝas leda ligna duoblaĵo;  
 Elfalas najloj, disrompiĝas buloj;  
 Senpere ili frapas sur kirasojn.  
 Fajreroj ŝprucas el la helaj kaskoj!  
 Jes, tiu dubatalo ne finiĝos  
 Nur se mortiĝis unu aŭ l' alia! *Aŭdu.*

p. 149

### 290

Emiro diras: «Karlo! Vi pripensu,  
 3590 «Decidu, ke vi petu pri pardono.  
 «Mi scias, vi mortigis filon mian,  
 «Malrajte vi postulas teron mian,  
 «Vi submetiĝu, mi ĝin donos al vi,  
 «De tie ĉi ĝis Orient' obea.»  
 Sed Karlo diras: «Kia hontigaĵo!  
 «Al Idolano mi ne ŝuldas pacon  
 «Nek amon! Vi akceptu Dian leĝon,  
 «Kristan' fariĝu kaj tuj *mi* vin amos;  
 «Sed kredu, servu Ĉiopovan Reĝon!»

3600 —Kaj Baliganz': «Mi aŭdas sensencaĵojn!  
«*Per tranĉa glavo mi pli volas morti!*» *Aŭdu.*

## 291

Emiro estas terurege forta.  
Li frapas Karlon sur brunŝtalan kaskon;  
Sur kapo li ĝin fendas kaj disrompas;  
La ŝtalo tranĉas harojn, kaj fortranĉas  
El la kapkarno pecon larĝan pli ol  
Manplat'; kranio tie malkovriĝas.  
Jen Karlo ŝanceliĝas, preskaŭ falas!  
Sed Dio volas, ke li vivas, restas  
3610 Venkinto. Sankta Gabriel' alvenas,  
Kaj diras: «Gloro Reĝ'! Vi kion faras?» *Aŭdu.*

## 292

Aŭdinte sanktan voĉon de l' Anĝelo,  
Ne timas Karlo minacantan morton,  
Kaj koro plifortiĝas. Li Emiron  
Frapegas tuj per glavo de Francujo;  
Ekrompas brilŝtonornamitan kaskon,  
Disrompas kapon, kaj distranĉas cerbon,  
*Kaj tutan la vizaĝon ĝis blankbarbo;*  
Faliĝas lin mortintan senespere...  
3620 «Munĝojo!», krias li, por sin konigi.  
Jen Duk' Naim' alkuras, Tencenduron  
Kondukas; Karl' ekrajdas; Idolanoj  
Nun forkuradas!... Tion Dio volas!  
Nun Francoj trafis celon de l' milito. *Aŭdu.*

## 293

Ĉar Dio volas, Idolanoj kuras  
For. Ilin persekutas Karl' kaj Francoj.  
Jen Reĝo: «Estroj! venĝu la suferojn!  
«Kun ĝojo nun frapadu, ĉar mi, antaŭ  
«Nelonge, vidis vin plorantajn!»—Francoj:  
3630 «Ĉi estas rajto! Via Reĝa Moŝt'!» kaj  
Plej forte kiel eble ili frapas...  
Saviĝis nur malmultaj Idolanoj. *Aŭdu.*

Morto de Marsilo.

## 294

Dum tag' varmega kaj tra polvo densa  
Nun Idolanoj forkuradas; Francoj  
Ĝis Saraguso persekutas ilin.  
Sur supron de la Turo supreniris  
Reĝino Bramimund' kun korteguloj,  
Kaj kanonikoj ne amantaj Dion,  
Ne sakramentigitaj herezuloj,  
3640 Ne tonsuritaj. Tuj Reĝino vidas  
Malvenkon; *al Marsil' sciigas pri ĝi:*  
«He! Nobla Reĝ', ne venkis niaj anoj!  
«Emir' malglore mortis!» Ŝin aŭdinte,  
Marsil' al muro turnas, kaŝas kapon...  
Li ploras... Pro korŝiro li mortiĝas...  
Sed ĉar li ne puriĝis de la pekoj,  
Diabloj prenas for animon lian. *Aŭdu.*

## 295

Jam mortis Idolanoj, kaj nur kelkaj  
*Forkuris.* Karlo venkis en batalo.  
3650 Disĵetiginte pordon de la urbo,  
Li scias, ke ĝin oni ne defendos  
Plu; tiam gent' eniras Saraguson  
Prenitan. Tie ĉi venkintoj nokton

Pasigas. Fieriĝas Reĝ' blankbarba.  
Reĝin' al li fordonas turojn, kvindek  
Malgrandajn kaj dek grandajn. Ellaboras  
Mirinde tiu, kiun Dio helpas. *Aŭdu.*

## 296

- Nun mallumiĝis tago; vesperiĝas;  
Heliĝas luno, treme brilas steloj.  
3660 Imperiestro regas Saraguson.  
Mil Francoj, laŭ l' ordon', trairas urbon,  
Disĵetas per hakiloj, fermarteloj  
Preĝejoj idolanajn kaj hebreajn,  
Pecigas *Mahon*, ĉiujn idolaĵojn;  
Ne restas plu mensoga sorĉa ia  
Postsigno. Reĝo kredas Dion, volas  
Plenumi Lian servon. Episkopoj  
Sanktigas akvon, en baptejon puŝas  
La Idolanojn.... Se rifuzos iu,  
3670 Li mortu per pendiĝo, fajr', aŭ glavo!  
Kristanaj ekfariĝas pli ol cent mil  
Baptitoj; sed Reĝin' aparte estas  
Kaptita; oni prenos ŝin ĝis dolĉa  
Francujo. Reĝo volas ŝin konverti. *Aŭdu.*

p. 152

## 297

- For nokto; jen leviĝas hela tago.  
Provizas Karlo Saragusajn turojn,  
Restigas tie mil bravegajn anojn,  
Por gardi urbon al Imperiestro.  
*Ekrajdas* Reĝo, ĉiuj liaj anoj,  
3680 Kaj Bramimundo malliberigita.  
Intencas li nur bonfaradi al ŝi...  
Reiras ĉiuj ĝoje kaj glorege.  
Perforte ili paŝas tra Nerbuno,  
Al *nobla* urb' Burdelo iras. Karlo  
Almetas sur altaron de barono  
Sanktul' Sevrino Olifanton plenan  
Je ormoneroj. Tie pilgrimantoj  
Ĝin povas vidi. Reĝo per ŝipegoj  
Trairas sur Girundo, ĝis Blaivo;  
3690 Kondukas nevon, Oliviron, ankaŭ  
Ĉefepiskopon tiel saĝan, bravan.  
En blankajn ĉerkojn oni metas ilin  
Ĉe San Roman'. Nun ili estas tie...  
Por ili Francoj preĝas per multnomoj  
Al Dio? Karl' transrajdas valojn, montojn,  
Ĝis Ajkso; li ne haltas en rajdado;  
Alvenas tien kaj malsupreniras  
Ĉe pordo de palaco. En ĉambregon  
Irinte, li kunvokas konsilistojn,  
3700 Saksanojn, Bajeranojn, Loheranojn,  
Frizanojn, Alemanojn, Burginanojn,  
Pejtanojn kaj Britanojn kaj Normanojn,  
Kaj la plej prudentulojn en Francujo.  
Tuj komenciĝos juĝo kontraŭ Genon. *Aŭdu.*

p. 153

Morto de Aldo.

## 298

- El Hispanujo venis Estro Karlo  
Al Ajkso, urb' plej bona en Francujo.  
En ĉambregon de palaco li eniras;  
*Fraŭlino* bela, Aldo, al li venas.  
Ŝi diras: «Kie estas Estr' Rolando  
3710 «Ĵurinta min, ke li edziĝos kun mi?»  
Sed Reĝo ekpremiĝas pro doloro!  
Li ploras, tiras sian blankan barbon,  
«Fratino! Pri mortinto vi demandas!

«Mi lin kompensos al vi, Karulino!  
«Pli bonan ol Ludviko mi ne konas;  
«Li, mia filo, estros miajn terojn!»  
Respondas Aldo: «Stranga parolado!  
«Min gardu Di', Sanktuloj kaj Anĝeloj,  
«Ke vivos mi post morto de Rolando!»  
3720 Ŝi ekpaliĝas, svenas antaŭ Karlo!...  
Ŝi mortis!... Dio! Prenu la animon!...  
Baronoj francaj ĝemas, ploras pri ŝi! *Aŭdu.*

### 299

Ĵus bela Aldo iris al finiĝo!  
La Reĝo pensas, ke ŝi nur svenadas;  
Li kompatadas pri ŝi, ploras larmojn;  
Li prenas ŝiajn manojn, ŝin subtenas,  
Sed kap' de Ald' kliniĝas sur la ŝultrojn!  
Nun, kiam Karlo vidas ŝin mortintan,  
Li tuj venigas kvar grafinojn, kiuj  
3730 En monaĥejon baldaŭ ŝin forportas,  
Kaj gardas korpon ĝis la plentagiĝo.  
Ŝin oni bele metis sub altaron;  
Funebron grandan Reĝo faris al ŝi. *Aŭdu.*

Dua puno al Geno.

### 300

Imperiestro ĵus revenis Ajkson.  
Nun katenata perfidulo Geno  
Alkondukiĝas al palac' de urbo.  
Sergentoj lin alligas kontraŭ fosto,  
Kunligas liajn manojn per cervfelaj  
Rimenoj, frapas lin per skurĝoj kaj per  
3740 Bastonoj, (al li justa pun'); atendas  
Li tiel dolorege juĝkunsidon. *Aŭdu.*

Juĝa kunsido kontraŭ Genon.

### 301

Laŭ priskribaĵo sur antikva Gesto  
Kunvokis Karl', el ĉiuj landoj, virojn.  
Kunvenis ili en kapelon Ajksan,  
Dum ĝlora tago de solena festo  
De San Silvestro, laŭ la dir' de kelkaj.  
Nun komenciĝas juĝo; kaj novaĵojn  
Pri Gen' perfida, vi tuj eksciigis....  
La Reĝ' ordonas: «Lin konduku al mi!» *Aŭdu.*

### 302

3750 Tuj diras Estro Karl': «Baronoj noblaj,  
«Vi juĝu Genon laŭ la justa rajto!  
«Li venis Hispanujon kun l' anaro;  
«De mi li prenis dudek mil Francanojn,  
«Kaj nevon, kiun vi plu ne revidos,  
«Kaj Oliviron noblan kaj ĝentilan,  
«Kaj dek du konsilistojn... por riĉiĝi!»  
Sed Gen': «Malben' al mi, se mi ne jesus!  
«*Roland'* min domaĝigis je arĝento  
«Kaj or'; mi tial volis danĝeriĝon  
3760 «Kaj morton lian. Tio?... ne perfido!»  
Jen Francoj: «Ni pri tio konsiliĝos!» *Aŭdu.*

### 303

Nun staras Geno antaŭ Reĝo. Per la  
Korpaĵo vigla kaj mieno bela,

Se li verema estus, ŝajnus nobla!  
Ĉirkaŭe, li rigardas Francojn, ĉiujn  
Juĝontojn, kaj apude, siajn tridek  
Parencojn. Jen li per laŭtvoĉo diras:  
«Pro Dio, petas mi, baronoj, aŭdu!  
«Mi estis en l' anar' kun Reĝo, kaj mi  
3770 «Plenumis lian servon fide, ame.  
«Rolando, lia nev', min ekmalamis,  
«Li volis puŝi min al mort' dolora!  
«Mi iris kun sendaĵ' al Reĝ' Marsilo!  
«Nur pro lerteco mia mi ne mortis!  
«Rolandon bravan, Oliviron, ĉiujn  
«Iliajn anojn tiam mi provokis,  
«Min aŭdis Karlo kaj baronoj noblaj.  
«Ĉi-tio estis venĝo... ne perfido!»  
Jen Francoj: «Ni pri tio konsiliĝos!» *Aŭdu.*

p. 156

### 304

3780 Vidinte, ke juĝego komenciĝas,  
*Kunvokas* Geno tridek el parencoj;  
El ili la plej rimarkinda estas  
Sorenca kastelestro, Pinabelo.  
Li estas plej ŝatinda, ĉu li devas  
Kontraŭparoli aŭ kontraŭbatali.  
Ekdiras al li Gen': «*Mi fidas* al vi.  
«Eltiru min de morto, de malgloro!»  
—Kaj Pinabelo: «Jes, mi vin defendos!  
«Se franco vin kondamnos al la morto  
3790 «Aŭ min batalos (laŭ l' ordono reĝa),  
«Per ŝtala glavo mi lin malpravigos!»  
Jen antaŭ li sin klinas grafo Geno. *Aŭdu.*

### 305

Nun konsiliĝas Saksoj, Bajeranoj,  
Kaj Francoj, kaj Pejtnoj, kaj Normanoj,  
Grandnombraj Alemano kaj Tejdanoj.  
Pli malseveraj estas Alvernanoj,  
Pli bonintencaj kontraŭ Pinabelo.  
Ĉar ili diras: «Kial ni daŭrigu?  
«Forlasu ni la juĝon, kaj ni petu  
3800 «La Reĝon, ke al Geno li pardonu!  
«Lin Geno servos de nun ame, fide;  
«Rolando mortis, vi lin plu ne vidos,  
«Eĉ per elspez' de oro kaj arĝento!  
«*Ja*, dubatalo estus malsaĝaĵo!»  
Baronoj ĉiuj jesas, krome unu:  
Tiero, frat' de Lia Moŝt' Gefrejzo. *Aŭdu.*

p. 157

### 306

Al Karl' irinte, la baronoj diras:  
«Ni petas Vian Reĝan Moŝton, por ke  
«Al grafo Geno de nun vi pardonu;  
